

Zagreba Esperantisto

ISSN 1846-5021

GAZETO DE
ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ

Հոտհանձնարի
ՅՈՒՆԵՍԿՕ-Ի ՄԱՍՆԱԿԱՆ

Ĉi-numere legu pri:
LUCIJA BORČIĆ NE PLU INTER NI
UZE HAVAS PROPAN KUNVENEJON
HISTORIEROJ DE ESPERANTO EN VARAŽDIN
SCIENCA STUDIO PRI TOMO MARETIĆ PRESATA
REZULTOJ DE LA LITERATURA
KONKURSO "IVO ROTKVIĆ 2015"
KROATAJ ESPERANTISTOJ
BEZONAS "KRESKO"-n
TIEL AKTIVAS BJELOVARANOJ!

2-3
2015

Eldonanto:

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj
HR-10000 Zagreb, Goljak 43

Ĉefa kaj respondeca redaktoro:

Radenko Milošević
Goljak 43
HR-10000 Zagreb
radenko.milosevic@zg.htnet.hr

Plenumredaktoro:

Josip Pleadin
B. Jelačića 138 A
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
josip.pleadin@gmail.com

Ekspedejo:

DEC, Bana Jelačića 138 A
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
dec.kroatio@gmail.com
zagreba.esperantisto@gmail.com

Redakcianoj:

Krešimir Barković, Snježana
Habulin, Marija Jerković, Jozo
Marević, Radenko Milošević,
Josip Pleadin

Presis:

Tiskara Horvat, Bjelovar

Jarabono (6 numeroj):

120,00 kunaoj / 18,00 eŭroj

Pagebla al konto de Dokumenta Esperanto-Centro:

HR5023600001102158381

aŭ al UEA-konto:

deoc-f

RESUMO

Ĉi tiu (duobla) numero de "Zagreba Esperantisto" prezentas resumon de niaj aktivecoj en la dua duono de 2015. Tiun jaron markis la epiteto de "la plej malfacila" en la 8-jara historio de UZE. Se mankis al ni grandaj rezultoj, en 2015 ni tamen solvis la plej gravan problemon: UZE ricevis propran kunvenejon, kiu troviĝas tre proksime al la Zamenhofa strato, simbolo de la Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Zagrebo en 1953. Kaj precize je la 8-a datreveno de la fondiĝo de UZE, la UZE-anoj por la unua fojo kunvenis en la nova ejo, disponigita de la zagreba urba kvartalo Medveščak.

Kvankam evidentas, ke la kroatian movadon skuas diversaj problemoj, ekde perdo de ŝtataj subvencioj kaj malaktiviĝo de la membraro, ĝis malfondo de societoj – la movado ankoraŭ ne cedas. Dank' al fervoraj individuoj, kiuj laboras en diversaj kampoj, la aktivecoj, kvankam malpli intensaj ol antaŭe, ankoraŭ multas. Bjelovaranoj eĉ notas konsiderindajn sukcesojn en la rilatoj kun sia medio, dum samtempe internacia kunlaboro kun ILEI ne donis fruktojn, sed rezultigis gravajn problemojn al la bonvolemaj aktivuloj de kvar kroatiaj societoj. Ĉu nur hazarda miskompreno aŭ malprofesia neglekto de partneraj rilatoj, tio ne plu gravas. Je la demando ĉu denove kunlabori kun ILEI, la kvar kroatiaj societoj unusone respondas: Ne, dankon!

Per la decido de sia asembleo el septembro 2015, estis malfondita Esperanto-societo "Božidar Vančik" en Varaždin, kies radikoj devenas el la 1930-aj jaroj. La Movado en novembro perdis ankoraŭ unu veteranon: en sia 94-a vivojaro forpasis Lucija Borčić, Honora Membro de UEA kaj verŝajne la plej aktiva tradukanto, kiu dum 50 jaroj tradukis aŭ kuntradukis tridekon da libroj, kaj kies vivoferko estas du ampleksaj vortaroj por kroatoj.

Grandan parton de ĉi tiu numero okupas la verkoj premiitaj en la dua Literatura konkurso "Ivo Rotkvić", kiu fariĝis vere internacia.

Sur la internacia scenejo en 2015 okazis la 100-a Universala Kongreso de Esperanto en Francio, omaĝante la landon, kiu antaŭ 110 jaroj gastigis la unuan kongreson de la monda esperantistaro. El gravaj eventoj de la pasinta somero ni nombru nur kelkajn, kiuj povus havi gravajn konsekvencojn por UEA: foriro de Osmo Buller el la posteno de ĝenerala direktoro de UEA, kiun anstataŭigis Veronika Poór, kaj la klopodoj pri sendependiĝo de TEJO.

Dum ni okupigis pri la aferoj de Esperantujo, Eŭropan union alfluis sinsekvaj ondoj de centmiloj da migrantoj el Sirio, Afganio, Irako kaj aliaj landoj, trafitaj de la militaj kruelaĵoj. Alemanŭ por momento ni forgesu aliajn aferojn, kaj direktu niajn preĝojn al tiuj malfeliĉaj homoj, akceptataj nek en siaj landoj, nek en landoj de Eŭropo, al kiu ili alprotas malstabilecon.

UZE HAVAS PROPRAN KUNVENEJON

Radenko Milošević



Komence de decembro 2015, Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj (UZE) ricevis ŝlosilojn de sia kunveno, kiun, post multaj klopodoj, al ĝi disponigis la zagreba urba komunumo Medveščak. La kunveno troviĝas en **Radnički dol n-ro 1**, kie UZE okazigos siajn regulajn kunvenojn kaj aliajn programojn (prelegojn, kursojn) ĉiusabate ekde la 11h00.

La kunveno troviĝas tre proksime al la **Zamenhofa strato** kaj estas facile atingebla per tramo el Placo de banuso Jelačić, la koro de Zagrebo.

Post la malfeliĉa malfondo de la plej longdaŭra zagreba Esperanto-societo "Bude Borjan", kiu okazis la 20-an de aprilo 2011, UZE proponis, ke oni daŭre okazigu diverstemajn prelegojn kaj kunvenojn, kiel praktikis "Bude Borjan" dum 60 jaroj. Kvankam en Zagrebo krom UZE ekzistas ankaŭ Esperanto-societo "Tibor Sekelj", Kroata Fervojiista Esperanto-Asocio (KFEA), Studenta Esperanto-Klubo (SEK) kaj Unuiĝo de Prelegantoj

de Esperanto (UPE), kvalitaj programoj draste reduktiĝis. UZE volas reaktivigi ĉiujn esperantistojn, kiuj sentas sian respondecon pri Esperanto en Zagrebo. Havigo de propra kunveno faciligos tiun mision, kaj UZE invitas ĉiujn zagrebajn (kaj eksterzagrebajn!) esperantistojn partopreni la programojn, ĉar membreco en UZE ne estos nepra kondiĉo por tio. Bonvenas ĉiuj, kiuj volas renkonti samideanojn, prelegi aŭ aŭskulti, lerni kaj praktiki la lingvon, nepre en bona etoso.

Se vi volas regule ricevadi informojn pri niaj programoj, sendu vian konfirman retmesaĝon al: zagreba.esperantisto@gmail.com

Por la unua fojo UZE-anoj kunvenis en la nova ejo la 12-an de decembro 2015, precize je la oka datreveno de sia fondiĝo. Tiufoje ili diskutis pri la projekto KRESKO (KRoata ESperanta KOlegaro). La aktivecoj de UZE en la nova ejo intensiĝos en 2016. Eksterlandaj esperantistoj, vizitontaj Zagrebon, estas petataj anonci sian alvenon kaj laŭeble gastprelegi ĉe ni.



REGULA JARKUNVENO DE UZE

✍ Josip Pleadin



Sian regulan jarkunvenon Unuiĝo de Zagrebaĵ Esperantistoj (UZE) okazigis la 28-an de septembro 2015 en la ejo de Kroatia Ekonomia Ĉambro – Zagreba Ĉambro.

Krom la kutimaj jarraportoj por 2014 (pri la laboro kaj financoj), kiuj estis unuanime akceptitaj, la ĉefa temo estis akcepto de nova Statuto de UZE. Akcepto de la Statuto estis nepre necesa, ĉar ĝis la 30-a de septembro ĉiuj asocioj en Kroatio devis adapti sian laboron al la preskriboj de la nova Leĝo pri asocioj.

Prezidanto de UZE Radenko Milošević transdonis la necesajn dokumentojn al la zagreba oficejo por ĝenerala administrado la 29-an de septembro, kaj tiamaniere UZE ĝustatempe registriĝis laŭ la nova Leĝo pri asocioj.

Dum la jarkunveno Radenko Milošević estis elektita ankaŭ kiel likvidanto de UZE.

Speciale por ĉi tiu jarkunveno estis preparita statistiko pri la membraro de UZE por la periodo 2007-2015.

Estis tralegita peto de Tihomir Lovrić pri eksmembrigo, kiun oni unuanime akceptis.

Marija Jerković sciigis la ĉestantojn, ke per speciala petskribo ni turnis nin al urbaj instancoj, klopodante havigi ejon por niaj regulaj kunvenoj.

Josip Pleadin prezentis la ideon pri KRESKO, kiu devus solvi la problemon de pasiviĝo de la membraro, tre evidenta kaj aktuala β^odum 2014.

Kaj la raportoj kaj la malaktiviĝinta membraro, markis la jaron 2014 kiel la plej malfacilan laborjaron de UZE ekde sia fondiĝo en 2007.

MEMBROSTATISTIKO DE
UNUIĜO DE ZAGREBAĴ ESPERANTISTOJ (UZE) 2007-2015

Jaro	Membris	Ekmembris	Mortis	Stato jarfine
2007	13	-	-	13
2008	7	-	-	20
2009	1	1	-	20
2010	3	-	-	23
2011	7	-	3	27
2012	1	-	-	28
2013	3	4	1	26
2014	2	-	-	28
2015	0	1	-	27

Kroataj esperantistoj bezonas **KRESKO-n**

KRESKO estas **KRoata ESperantista KOlegaro**.

KRESKO ne estas nova organizaĵo, sed **libera tribuno kaj malferma diskutejo**. **KRESKO-n** ankoraŭ en 2013 kune planis Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj (UZE) kaj Dokumenta Esperanto-Centro (DEC).

KRESKO siajn ideojn bazas sur la fakto, ke Esperanto estas nenies posedaĵo. Pri ĝi povas okupiĝi ĉiu persono, societo, grupo aŭ asocio memstare aŭ membre, individue aŭ kolektive.

KRESKO celas:

1. Plioftigi renkontiĝojn de ĉiuj kroataj esperantistoj, kiuj sentas respondecon pri la stato de Esperanto en Kroatio, senkonsidere ĉu ili apartenas al iu grupo, societo aŭ asocio, aŭ aktivas kiel individuoj.
2. Malferme diskuti pri problemoj kaj trovadi solvojn akcepteblajn por ĉiuj.
3. Kolegece informi pri propraj kaj informiĝi pri alies planoj kaj ideoj, por povi kunordigi la agadon sen konkurenci kaj por trovi komunajn interesojn.
4. Subteni aktivecojn de aliaj per partopreno, kunlaboro, kunorganizado, kunfinancado kaj je aliaj manieroj.
5. Permesi al ĉiu demokrate diskuti, laŭdi aŭ kritiki en kultura dialogo.
6. Anstataŭigi miskomprenojn, ofendojn kaj kverelojn per kunlaboro, komprenemo, helpo kaj estimo montrata al aliaj.

Se viaj celoj kongruas kun la celoj de KRESKO, vi estas bonvena en nian rondon!

Bonvolu proponi temojn por diskutado, skizu mallonge viajn opiniojn pri Esperanto en Kroatio, listigu la plej gravajn problemojn, kiujn vi vidas, kaj proponu la manieron kiel solvi ilin.

zagreba.esperantisto@gmail.com

KRESKO bezonas vin!



IAER SLOVENA-KROATA RENKONTIĜO

 Josip Pleadin kaj Anton Mihelič

 Josip Pleadin kaj Mario Vetrih



Anoncante la "Esperanto-tagon", kiun la monda esperantistaro festas la 26-an de julio kiel la daton kiam aperis la Unua libro de Esperanto, en la slovena urbo Brežice la 25-an de julio okazis **Internacia Amika Esperantista Renkontiĝo (IAER)**. Je unu tago ĝi anticipis ankaŭ la unikan aranĝon, la 100-an Universalan Kongreson de Esperanto, kiu la 26-an de julio komenciĝis en la franca urbo Lillo. La IAER-aranĝo ne pretendis esti granda, sed tamen bedaŭrinde, ke ĝi ne sukcesis vekti almenaŭ pli grandan intereson ĉe la najbarlandaj esperantistoj de Italio, Aŭstrio kaj Hungario. Kialoj por tio sendube estas pluraj: la menciita Universala Kongreso de Esperanto en Lillo, grandaj distancoj kaj financaj malfacilaĵoj ĉe Esperantaj ligoj, societoj kaj unuopuloj k.a.

La renkontiĝon tre fervore organizis (ankoraŭ) neformala Esperantista klubo de Posavje (EKP), kunlabore kun Slovenia Esperanto-Ligo (SIEL), sed evidentas, ke la ĉefan organizan rolon ludis prezidanto de EKP **Anton Mihelič**. La ĉefa temo de la aranĝo estis "**Regiona kunlaboro inter Esperantaj societoj**". Ĝi refreŝigis la ideojn de la translima esperantista kunlaboro, kia ekzistis en la pasinteco.

Efektive, la renkontiĝo en Brežice fariĝis slovena-kroata kunveno (kun unu partoprenanto el Bosnio kaj Hercegovino). Kiam la informo pri la organizado de IAER estis lanĉita, en Kroatio regis sufiĉe granda intereso por partopreni ĝin, kaj estis planitaj eĉ kelkaj grupvizitoj. Komunan busvojaĝon por 28 kroataj esperantistoj el diversaj urboj organizis Dokumenta Esperanto-Centro el Ĝurdevac, sed venis ankaŭ kelkaj aliaj kroatoj per aŭtomobiloj. Menciindas, ke estis reprezentitaj Bjelovara Esperantista Societo, Dokumenta Esperanto-Centro el Ĝurdevac, Esperanto-societo Sisak, Unuiĝo

de Prelegantoj de Esperanto kaj Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj el Zagrebo, Esperanto-societo "Mondo paca" el Velika Gorica, individuaj membroj de Kroata Esperanto-Ligo el Zagrebo, Esperanto-societo Rijeka k.a.

La labora parto de la programo de IAER okazis en la Urbodomo de Brežice, kiu afable malfermis sian pordon al la aranĝo. Post la ludado de "La Espero" kaj la enkonduka parolado de **Anton Mihelič**, la partoprenantojn salutis la vicurbestrino **Katja Čanžar**, kiu prezentis la Municipon de Brežice, aparte informante la aŭskultantojn pri la infrastrukturaj investoj en lernejojn, infanĝardenojn kaj en la evoluigon de turismo. Ŝi ankaŭ elstarigis la ĉi-momente plej grandan konstruejon en Slovenio, respektive la hidroelektrejon Brežice, la estontan sportparkon kaj akvocentron kaj la estontan hidroelektrejon Mokrice.

La prezidanto de SIEL **Janez Jug**, esprimis kelkajn pensojn pri la graveco de la renkontiĝo, post kio tre vigle pri la ĉefa temo diskutis pluraj ĉeestantoj. La centra mesaĝo de la enkonduka prelego kaj diskuto estis, ke oni devas esence plibonigi la intersocietan interŝanĝon de vizitoj per aktiva kunlaboro ĉe multaj jam tradiciaj kaj ankaŭ novaj esperantistaj aranĝoj en kampoj kiel edukado, kulturo, amuzo, turismo kaj sporto. Sed aparta atento devas esti dediĉita al reciproka informado kaj helpo ĉe plenumado de diversaj aktivecoj en esperantistaj societoj.

Anton Mihelič mal-longe informis pri EKP kaj en aparta prezento proponis eblajn kampojn por estonta kunlaboro. **Janez Zadavec** prezentis "Bograĉijada"-n, la urban feston de Lendava, en kiu jam tradicie partoprenas esperantistoj, kaj invitis la ĉeestantojn viziti ĝin.

En la kultura programo prezentigis la meza kanthoro de la **Kultura societo "Franc Bogovič"**

el Dobova, interalie tre bele per la Esperantigita slovena popolokanto "Ĝojigas min" (*Prav lepo je res na deželi*). Tri membroj de EKP (**Ivana Vatovec**, **Reneja Mihelič** kaj **Anton Mihelič**) recitis slovenan poezion de Srečko Kosovel en Esperanto. Ĉe la fino prezentigis la gastantaj Esperanto-asocioj kaj okazis diskuto. En la labora parto kroataj esperantistoj (**Josip Pleadin**, **Anto Mlinar**, **Roža Brletič-Višnjič**) informis la ĉeestantojn pri Esperanto-eventoj kaj aktivecoj en Kroatio, pri diversaj societoj kaj iliaj agadoj. Kroataj esperantistoj donacis diversajn Esperanto-eldonaĵojn por la biblioteko de EKP (ekz. UZE donacis la 30-numeran kompletan de "Zagreba Esperantisto" kaj librojn, KFEA la tipajn korformajn mielkukojn de Zagrebo kaj KEL la gazeton "Tempo"). **Miĉo Vrhovac** el Banja Luka prezentis la novan kantaron de serbaj kantoj en Esperanto, kaj eĉ tre simpatie kantis unu el ili (*Ima dana - lujn tagojn*), je ĝojo de la partoprenantoj.

En paŭzo la ĉeestantoj povis refreŝigi per manĝetoj kaj gustumado de lokaj kaj regionaj vinoj en la teretaĝo de la Urbodomo, dum kio okazis tostoj kaj bondeziroj, interparoloj kaj fotadoj. La frandaĵojn preparis aninoj de la EKP **Reneja Mihelič** kaj **Ivana Vatovec** kun afabla helpo de najbaroj.

Je la 14h00 komenciĝis iom pli ol duhora vizito al la Muzeo de Posavlje, situanta en la loka kastelo. En la kastela korto la gastoj estis akceptitaj kaj salutitaj de la direktorino de la muzeo sinjorino **Alenka Černelič Krošelj**, kiu poste kun sia kolego gvidis la vizitadon. Post la vizito de la muzeo **Ivana Vatovec** prezentis al la gastoj la ĉefajn karakterizaĵojn de la urbo Brežice. La muzeo montriĝis tre riĉa kaj interesa por vizitantoj. Post la vizitado de la muzeo, ĉiuj IAER-anoj veturis al la kamparana

bieno **Vimpolšek**, en kies korto la reprezentantoj de UZE disdonis al la ĉeestantoj malnovajn numerojn de "Zagreba Esperantisto". Plejparte la slovenaj esperantistoj kun agrabla suprizo prenis "Zagreban Esperantiston" por siaj societaj kaj privataj kolektoj kaj konfesis, ke la gazeto al ili estas nesufiĉe konata.

En la bona restoracio ĉe la familio **Vimpolšek** okazis komuna, sloventipa tagmanĝo, dum kaj post kiu la kunvenintoj daŭrigis interŝanĝi spertojn kaj informojn. Konklude, inter slovenaj kaj kroataj esperantistoj konfirmiĝis, ke la slovena esperantistaro nek sufiĉe konas nek vizitas la aranĝojn kaj aktivecojn, kiuj okazas en Kroatio. Ni invitis ilin al baldaŭ

okazontaj aranĝoj "Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo" (organizata de Bjelovara Esperantista Societo), "Verkista renkontiĝo" (organizata de Kroata Esperanto-Ligo), "Alp-adria konferenco" (organizata de Esperanto-societo Rijeka) kaj "Zamenhoftaga festo" (organizata de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj). Slovenaj esperantistoj estas invititaj partopreni ankaŭ la literaturan konkurson "Ivo Rotkvić", "Deklamkonkurson" kaj komunajn tradukprojektojn de DEC.

Malmultnombraj membroj de EKP, sub la gvido de la prezidanto **Anton Mihelič**, kiu portis la ĉefan ŝarĝon de la renkontiĝo, sukcesis organizi neriproĉeblan, enhavoriĉan internacian renkon-

tiĝon de esperantistoj, kiu povas esti ekzemplo por ĉiuj estontaj similaj renkontiĝoj.

La komenca malavantaĝo, ke anstataŭ vere internacia, IAER fariĝis dulanda renkontiĝo, poste montriĝis bonŝanca, ĉar la du najbaraj esperantistaroj povis senĝene dediĉi sin al reciproka analizado de atingoj, kio malfermas novajn vojojn por estonta kunlaboro. La aranĝo mem akiris tre simpatian "familiecan" etoson, kiu ofte perdiĝas en grandaj internaciaj aranĝoj. IAER ebligis, ke la ne pli ol 60-membra partoprenantaro interkonatiĝu kaj establu amikajn intersocietajn, sed ankaŭ personajn kontaktojn, kio ja estis celita kaj esprimata eĉ en ĝia titolo.

MANKIS IO POR ENTUZIASMIGI MIN

 Nicole Else

En la ILEI-konferenco en Ostendo (Belgio) partoprenis 138 homoj el 30 landoj. Estis agrable, ke la proporcio de partoprenantoj de ekster Eŭropo estis sufiĉe granda, kun 19 ĉinoj, 12 koreoj, 2 orient-timoranoj, pluraj el Nepalo, Afriko, ktp. Ankaŭ la meza aĝo de la partoprenantoj estis malpli alta ol en la ILEI-konferenco, kiun mi partoprenis antaŭ 2 jaroj en Herzberg, mi pensas. La plej juna estis nur 3-jara, sed tamen jam scipovis iom paroli en Esperanto. Ŝi venis kun siaj gepatroj el Danio. La konferenco okazis en nova junulargastejo. Estas ĉiam tre bone kiam la dormoĉambroj estas en la sama konstruaĵo kiel la kunvenejoj.

Okazis, kompreneble, multaj prelegoj dum la semajno. Mi ĉeestis prelegon de **Monika Molnar** pri eta svisa lernejo, kie ĉiuj lernantoj devas lerni Esperanton, de **Heidi Goes** pri Esperanto en



Nederlanda Hindio de 1920 ĝis 1940, de **Katalin Kováts** pri la risiko-kvizo de edukado.net, en kiu esperantistoj rajtas respondi al maksimume 3 demandoj tage pri kulturo de Esperanto, movado kaj la lingvo mem. Ankaŭ interesis min la prelego de **Giridhar Rao** pri la falsa promeso de la angla en Barato. Nur tre eta procento de la lernantoj povas

akiri bonan laboron dank' al la scio de la angla lingvo. **Usui Hiroyuki** estas japano, kiu laboras en Ĉinio por *El Popola Ĉinio* kaj li interese rakontis pri siaj spertoj. Mi ĉeestis ankaŭ interesan prelegon de ne-esperantisto **D-ro Moreels**. Li estas kuracisto en la organizo *Médecins sans frontières* (Kuracistoj sen landlimoj) kaj li parolis pri la temo *Ĉu milito povas esti justa*.

Je mardo okazis lingva festivalo en kiu 30 diversaj lingvoj estis prezentitaj. Kompreneble, multaj okazis samtempe, do oni povis ĉeesti maksimume 7, pro kio la elekto estis malfacila por iu kiel mi, kiu interesiĝas pri preskaŭ ĉiuj lingvoj. Bedaŭrindas la afero, ke tiu festivalo estis nur por la partoprenantoj kaj do la ekstera publiko ne povis uzi tiun okazon por ekscii pli pri lingvoj ĝenerale kaj pri Esperanto.

Kiel en multaj kongresoj,





merkredo estis rezervita por tuttagaj ekskursoj. Mi aliĝis al la ekskurso al Bruĝo, dum kiu, laŭ la programo, ni devis ludi kaj vagadi tra la urbo por solvi krimon. Tamen okazis problemeto. Mi estis la sola, kiu elektis tiun ekskurson kaj do ĝi ne okazis. Ĉu la esperantistoj estas tiom malludemaj? Do mi devis elekti alian ekskurson. Mi veturis al Antverpeno. Mi jam estis en Antverpeno por la UK, sed tio ja estis antaŭ iom da tempo, pli precize en 1982.

La vesperaj programoj eble povintus esti pli bonaj. Dum du vesperoj okazis nenio kio rilatas al Esperanto. Dum la lasta vespero

Mikaelo Bronŝtejn distris nin per kantoj.

Mi ŝatis, ke okazis programoj por la personoj, kiuj ne deziris partopreni en la bankedo. Dum la aŭstraliaj somerkursaroj kutime estas iom enuige por la personoj kiuj ne bankedas, ĉar tiam nenio okazas.

Iom ĝenis min, ke oni ne povis antaŭscii la programon. En la kongreslibro ofte estis simple la indiko "Aliaj prelegoj" sen ia ajn indiko pri la temo. Nur mallonge antaŭ la eventoj estis afiŝoj en la kongresejo kun la detala programo. Je la lastaj du tagoj okazis simpozio kaj tio signifis, ke dum tiuj du tagoj

estis ofte pluraj interesaj prelegoj samtempe, dum en la unuaj tagoj ne estis granda elekto.

Ne tiom plaĉis al mi la frandvespero je la unua tago, mi multe preferus interkonajn ludojn aŭ ion tian. Je la frandvespero ja estis granda elekto de manĝaĵoj el diversaj landoj, sed vi ja ne povas gustumi 30 diversajn manĝaĵojn! Mi pensas, ke ĝi ne estas la plej bona maniero interkonatiĝi. Mi preferus pli strukturitajn grupajn aktivecojn, en kiuj ni aŭdas ĉiujn diri almenaŭ kelkajn vortojn.

Entute, la konferenco ja ne estis malbona, sed mankis io por entuziasmiĝi min.



Historio de la Redakcia kompilo Esperanta literaturo

La plej grava libro eldonita en 2015 certe estas la longe atendata *Historio de la Esperanta literaturo* de la duopo Carlo Minnaja kaj Giorgio Silfer, aperinta sub la marko de LF-Koop en Svislando. La 748-paĝa volumego estis prezentita plurloke, kaj la kroata esperantistaro havis la eblecon konatiĝi kun ĝi rekte el la buŝo de ĝia ĉefaŭtoro **Carlo Minnaja**. Li prezentis la libron en la 13-a Renkontiĝo de Esperantlingvaj verkistoj kaj tradukistoj, kiu okazis la 12-an de septembro 2015 en la Bieno Njeguŝ (vilaĝo Hraŝčina) de Spomenka Ŝtimec. Pri la kroatoj, menciitaj en tiu verko, prelegis **Zlatoje Martinov** kaj la aŭtoron Minnaja intervjuis **Davor Klobuĉar**. Fragmentojn el la verko legis **Đivo Pulitika** kaj **Tihana Mikŝa**.

BOGRAĈFEST EN LENDAVA

La 29-an de aŭgusto 2015 okazis en Lendava, Slovenio la t.n. *bograĉfest* (=kaldronfesto). Inter la 110 teamoj, troviĝis ankaŭ la internacia teamo de esperantistoj (slovenaj esperantistoj el Lendava, Maribor kaj Ljubjana, hungaraj societanoj de "Juna koro" el Zalaegerszeg kaj hispana esperantistino). Kiel subtenantoj venis ankaŭ Reneja, Anton kaj Peter el la Esperantista klubo de Posavje el Brežice kaj Davorin el Prevalje. Esperantistoj partoprenis jam la 4-an fojon. La ĉefkuiristo estis Jovan, kiun helpis Ana kaj Eržika. Janez, Karlo kaj Davorin ankaŭ donis sian kontribuon.

Kio estas "bograĉ"? Ĝi estas hungardevena speco de gulaŝo, kuirita el tri specoj de viando (bovaĵo, porkaĵo kaj ĉasaĵo). Ĝi nomiĝas kiel kaldrono, en kiu oni kuiras ĝin.

La kuirado komenciĝis je la 9h00. La tablo, benkoj kaj ombrelego jam atendis nin. La esperantista stando havis la numeron 14, kaj ĝi staris apud la Fervojista muzeo. Tie jam kuŝis hejligno. Ni ornamis la tablon



per dolĉaĵoj, reklamfolioj kaj Esperanto-libroj. Poste ni ricevis sakon kun bovaĵo, porkaĵo kaj cervajo, cepojn, terpomojn, kelkajn verdajn kaj ruĝajn kapsikojn ktp. Ni ricevis ankaŭ kaldronon kun tripieda stativo. Preparado komenciĝis per senŝeligo de cepoj kaj ajloj, purigado de kapsikoj, tranĉado de viandon kaj bruligo de fajro. La aertemperaturo atingis 35 gradojn, do ni devis refreŝigi per

miksaĵo de vino kaj mineralakvo. Multaj preterirantoj haltis ĉe nia stando kaj demandis pri nia lingvo Esperanto. Kiel ĉiam, la kaldrono rapide malpleniĝis, ĉar la gulaŝo certe estis tre bongusta.

La kaldronfesto estas tre grava por esperantistoj, ĉar miloj da preterpasantoj vidis, ke Esperanto vivas! Inter la vizitantoj estis ankaŭ la eksa prezidento de Slovenio d-ro **Danilo Türk**.

LINGVA KAFEJO EN ZAGREBO



Granda tendo, starigita sur la zagreba *Eŭropa placo*, la 26-an de septembro gastigis *Lingvan kafejon*, kiun organizis la reprezentantoj de Eŭropa komisiono en Kroatio. La vizitantoj povis partopreni ekspresajn aŭ konversaciajn kursetojn de unu el la 16 proponitaj lingvoj. Inter la angla, bulgara, fina, franca, germana, hispana, irlanda, itala, japana, litova, makedona, rumana, rusa, slovena kaj sveda, estis prezentita ankaŭ Esperanto. La unuan kontakton pri Esperanto al interesiĝantoj ebligis **Judita Rey Hudeček**, **Filip Mikuličić** kaj **Andrea Horvat**.





FOIRO DE ASOCIOJ EN KARLOVAC

Planita por la 26-a de septembro, la *Foiro de asocioj* en Karlovac devis esti prokrastita pro la malbona vetero. Tamen ĝi tre sukcese okazis la 3-an de oktobro. La foiron jam tradicie kunorganizas la asocio *Carpe Diem* kaj Urbo Karlovac.

La ĉi-jara foiro estis organizita por la 7-a fojo, kaj ĝin partoprenis pli ol cent asocioj, kiuj okupiĝas pri diversaj sportaj, kulturaj, humanismaj kaj aliaj temoj.

Esperantistojn en la Foiro reprezentis nur unu homo – **Sreĉko Radulović** el Sisak/Varaždin, kiu mem prizorgis la standon kaj la reklam-materialojn.

Malgraŭ kelkfoja pluveto tiutage, la loĝantoj de Karlovac amase vizitis la urban promenejon, en kiu viciĝis standoj kun allogaj kaj interesaj enhavo.

Bedaŭrindas la fakto, ke el Karlovac por esperantistoj venas malĝojiga informo: la tiea societo "Viktor Mihovilić" pro manko da aktivuloj verŝajne malfondiĝos.

BIBLIOTEKA APOGO BACHRICH AL DEC

La fondaĵo "Biblioteka Apogo Honore al la Geedzj Maria kaj Johano Bachrich", kiun UEA starigis pasintjare per donaco de la gefiloj de ges-roj **Bachrich**, disdonis 1.500 eŭrojn kiel siajn ĉi-jarajn subvenciojn. La fondaĵo asignis subvenciojn al 8 el 11 petintoj. La Libroservo de UEA jam ekspedis al la sukcesintoj librojn aŭ aliajn eldonaĵojn laŭ iliaj dezirlistoj. Subvenciojn ricevis **Biblioteko Carlos Domingues de Brazila Esperanto-Ligo** (180 eŭroj), **Bulgara Esperanto-Asocio** (191 eŭroj), **Esperanto-biblioteko**

en Rumonge (Burundo; 377 eŭroj), **Biblioteko de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Svitavy** (133 eŭroj), **Filipina Esperanto-Junularo** (157 eŭroj), **Dokumenta Esperanto-Centro** (Kroatio; 145 eŭroj), **Esperanto Nicaragua** (158 eŭroj) kaj **Biblioteko de "La Ondo de Esperanto"** (Rusio; 156 eŭroj).

La *Biblioteka Apogo Bachrich* daŭrigas la tradicion de la iama *Biblioteka Apogo Thorsen*, kies bonhavan donacis ges-roj Roma kaj Poul Thorsen kaj kiu subtenis Esperanto-bibliotekojn ekde 1997 ĝis 2011.

Juan Eduardo Bachrich naskiĝis la 30-an de aprilo 1921 en Vieno, Aŭstrio kaj mortis la 28-an de februaro 2005 en Karakaso, Venezuelo. Li estis elstara venezuela esperantisto. Kiel aŭstro li nomiĝis **Johann Eduard Bachrich**, en Esperantio **Johano Bachrich**.

En 1937 li konatiĝis en Zagrebo kun **Ivo Lapenna** kaj eklernis Esperanton en 1938 en Zemun, Jugoslavio. Ekde 1940 li studis en Budapeŝto kaj mallongan tempon kunlaboris kun tieaj esperantistoj.

En 1948 Bachrich elmigris al Venezuelo, kie li tuj komencis informi pri Esperanto per publikaj prelegoj kaj gazetartikoloj. Li fariĝis motoro de Venezuelana Esperanto-Asocio. En la jaro 1952 li fariĝis loka delegito de UEA kaj fakdelegito pri plantkulturado. De 1974 ĝis 2001 li funkciis kiel peranto de UEA. Kiam en 1975 VEA estis leĝe registrita, **Johano Bachrich** fariĝis ĝia ĝenerala sekretario. De 1978 ĝis 1982 kaj denove ekde 1998 ĝis sia morto li estis observanto, de 1992 ĝis 1998 membro de la Komitato de UEA.



Juan Eduardo Bachrich

En 1992 **Bachrich** lanĉis la ideon pri amasa instruado de Esperanto per televido. Por atingi tiun celon li kontribuis al la realigo de la projektoj "Mazi en Gondolando" kaj "Esperanto: Pasporto al la tuta mondo". En la 85-a UK 2000 en Tel-Avivo la Komitato de UEA distingis lin per honora membreco de la Asocio.

RAKONTO PRI MATURIĜO KAJ PLIFORTIĜO

 Luiza Carol

*Mato Lovrak: “La trajno en la neĝo”
Bjelovara esperantista societo kaj
Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj, 2015,
ISBN 978-953-58525-0-6 kaj
ISBN 978-953-55418-8-2*



La romano “La trajno en la neĝo” de **Mato Lovrak** estas bone konata kaj aprezata de kroatlingvaj infanoj kaj adoleskuloj. Mi esperas, ke ankaŭ la junaj legantoj en Esperanto ĝuos la elkroatigitan version de tiu romano. Ankaŭ plenkreskuloj povos ĝui tiun romantikan beletraĵon kaj povos rakonti al siaj gefiloj aŭ genepoj (en la kazo, ke tiuj ankoraŭ malfacile legas en Esperanto) pri la aventuroj de la kroataj lernejoj vinkintaj grandajn malfacilaĵojn danke al siaj kuraĝo kaj solidareco.

Unuflanke, la romano estas realisma, ĉar la tuta etoso ankriĝas en la realon kaj la ĉefaj herooj estas ordinaraĵoj infanoj, kies vivoj fluas

normale, en kroata malriĉa vilaĝo antaŭ la dua mondmilito. Nek terura drako minacas nek aminda feino protektas la protagonistojn. Tamen, oni sentas agrablan parfumon de romantika fabelo legante la libron.

Samkiel multaj herooj de fabeloj (Fingreto, Haĉjo kaj Grenjo, Neĝulino, Aliso, Pinokjo, Dorotea k.a.), la herooj de Lovrak troviĝas en malkutimaj cirkonstancoj, kiam ili devas barakti kontraŭ teruraj malfacilaĵoj sen la helpo de siaj gepatroj kaj sen sia instruisto (kiu devis resti hospitaligita en la urbo). Blokiĝas en la neĝo la trajno portanta la infanojn hejmen, kaj tiuj helpas al la rapida malblokigo per siaj nudaj manoj, alfrontante la timigan malvarmegon. Sed ... ĉu nur la malmildega vetero minacas ilin? La ĉefaj luktoj de la junaj herooj direktiĝas enen de si mem. Por venki la eksterajn malfacilaĵojn, ili devas unue venki ene de si la egoismon, la malkuraĝon, la agresemon, la maldiligentecon, la dorlotiĝemon, la avarecon, la manĝavidecon, la vantecon, la envion, la mensogemon ... Mi ĵus listigis kelkajn el la plej gravaj monstroj embuskantaj ene de iliaj ankoraŭ nematuraj animoj. Kiel ogroj, drakoj aŭ malicaj sorĉistoj kaj sorĉistinoj, la malvirtoj minacas kaj tentas la junajn animojn. Sed la infanoj brave venkas ĉiujn malfacilaĵojn (ĉu ene de si, ĉu ĉirkaŭ si) kaj la romano finiĝas ĝojoplene, samkiel okazas en

fabeloj. Solidareco estas la “magia ŝlosilo”, kiun la infanoj lernas uzi, por reveni hejmen bonstate. Solidareco signifas kapablon agi kune, fidi unu la aliajn kaj konsenti pri grupa disciplino. Jen kion la infanoj sukcesis akiri dum sia aventuroplena vintra ekskurso per trajno.

Ĉu ili trovis la “magian ŝlosilon” solaj kaj tute hazarde? Fakte ne. Samkiel en fabeloj, ekzistas “la bona feino”, kiu donas bonajn konsilojn helpante la heroojn, ankaŭ en la romano de Lovrak aperas la saĝa instruisto, kies influo prilumas la vojon de la infanoj eĉ dum lia malĉeesto. Unu tagon, kelkan tempon antaŭ la vintra ekskurso, la instruisto proponas novan eksperimenton al la infanoj en la kvara jaro de lernado. Jen kiel okazas la evento:

“La lernantoj revarmiĝis post la malvarmo dumvoje, kaj la instruisto en la kvara klaso rakontis, ke nia popolo en la antikva tempo vivis en kooperativoj, kie ĉiu membro havis sian parton de laboro, kaj kie ĉiuj kune dividis laborfruktojn.



'Vidu, infanoj', li diris al la lernantoj, 'kial ni ne provu fari ion tian? Ni vidu. Ni faru la klasan kooperativon.'

La lernantoj streĉis atenton.

Oni devas elekti la estron. Ili devas ĉiuj egale labori, por ke ili havu la samajn taskojn kaj samajn rajtojn. Neniu rajtas havigi al si pli grandan rajton kaj altrudi ĝin perforte. Ili ĉiuj devas zorgi pri la klaso, kaj la instruisto ne povas enstrudiĝi. Li nur venados kaj trovos ĉion en ordo, puran, aranĝitan kaj kvietan.

Li diris al ili: 'Ĉu mi ordonu ĉion al vi kaj kontroli vin? Lernu mem fari interkonsenton pri tio, kio estas bezonata. Post unu semajno vi elektos la estron kaj prezidanton de via kooperativo.'

Tiu interesa pedagogia eksperimento pensigas min pri simila eksperimento, famega siatempe, realigita de la sovetia pedagogo **Anton Semjonoviĉ Makarenko** kaj priskribita en ties emociiga aŭtobiografia romano "La pedagogia poemo".

En la romano de Lovrak, la infanoj reagas entuziasme al la propono de la instruisto, kaj tuj organizas sin en "kooperativo", en kies kadro ili helpas unuj la aliajn plifortigi kaj plibonigi siajn karakterojn. Samkiel en fabeloj, aperas en la romano la neordinara imitinda heroo (la knabo Ljuban, kiun la infanoj elektas estro de sia "kooperativo") kaj la neordinara malimitinda heroo (la enviema kaj malica knabo Petro). Ne mankas ankaŭ la fabela "bela princino" endanĝerigita pro malbonaj cirkonstancoj kaj savita ĝustatempe de la brava protagonisto. La rolon de "bela princino" iel plenumas en la romano la knabino Draga, sed mi alte aprezas la faktan, ke la verkisto fokusas sian atenton sur la animan belecon de la knabino, ne sur ties eksteran aspekton. Malsimile al kliŝa fabela belulino, Draga tute ne estas pasiva kaj plorema sendefenda junulino. Pri ŝia fizika aspekto la aŭtoro eĉ ne komentas, ĉar tio ne

devas gravi en la ĉirkaŭteksto. La infanoj ne aprezas ŝin pro la koloro de ŝiaj okuloj aŭ pro la longeco de ŝia hararo. Ŝin oni alte estimas pro ŝiaj diligenteco, inteligenteco, honesteco ktp. Draga estas imitinda heroino, samkiel Ljuban estas imitinda heroo. Ŝi kaj Ljuban aperas en la romano kiel ideala imitinda paro kaj ilia romantika rilato iamaniere maturiĝas dum la aventuroplena vintra ekskurso.

Ĉu en la realo ekzistas tiom virtoplena kaj saĝa knabo kiel Ljuban, tiom mi pridubas. Se jes, tia eksterordinara knabo povus iĝi post 20-30 jaroj la ideala prezidanto de ajna lando. Samkiel en fabeloj, en romantikaj porinfanaj romanoj oni ne serĉu verŝajnecon sed imitindajn aŭ malimitindajn modelojn. Petro, la malimitinda modelo de la romano, estas tiom malvirtoplena, ke li fariĝas eĉ kompatinda, almenaŭ por plenkreskaj legantoj. Niatempe, se tiom malvirta infano ekzistus en reala familio de Eŭropo, la gepatroj petus la helpon de sperta psikologiisto. Verŝajne tiu konsilus la familion ne plu dorloti lin tiom multe. Kaj verŝajne la psikologiisto suspektus, ke la gepatroj de Petro ne tro amas unu la alian, ĉar eble Petro ne vidis sufiĉajn amgestojn en sia familio. Mi supozas, ke tia monstra egoismo malfacile povus aperi en animo de infano, kies gepatroj amas unu la alian ... El ĉiuj infanoj de la "kooperativo", Petro estas la plej malkapabla lukti kontraŭ siaj malvirtoj. Sed li ricevas de la vivo mem tre grandan punon: solecon. Tiun li ne povas elteni, tial en la fino li venkas sian orgojlon kaj pentoplene revenas en la grupon.

La blokigo de la trajno en neĝo dum terura vetero, la infanoj devas affronti nur unu nokton. Sed ĉiutage la vivo igas ilin sperti aliajn malfacilaĵojn: malriĉecon, maljustajn sociajn diferencojn inter la familioj, antaŭjuĝojn generitajn de maljusta socia vivo...

La romano komenciĝas per infanca konflikto kaj simbole finiĝas 4 jarojn poste per ĝoja interpaĉiĝo. La malnova konflikto

okazis kiam la infanoj ankoraŭ ne atingis la taŭgan aĝon por eniri la unuan klason de lernejo. Tiam, granda grupo de infanoj bruege ludis edziĝofeston, ĝis alia infangrupo fortimis kaj forpelis la "festantojn". Dum tiu evento, Draga ludis la novelzinon, Petro ludis la novelzon kaj Ljuban estis la estro de tiuj, kiuj lastmomente malhelpis la "geedziĝon". Okazis interbatalo post kiu Petro forfuĝis. Tiam Ljuban diris al Draga:

"Ni faris tion, ĉar vi ne invitis nin kunludi. Vi volis aranĝi la ludon sen ni! Ĉu ni estas friponoj, kiuj ne valoras same kiel vi, ĉar ni ne estas riĉaj?"

Tiaj vortoj en la buŝo de 5-6 jara sentema infano estas tre dolorigaj. Ili malkaŝas la eĥojn de konversacioj inter plenkreskuloj, kiujn la infanoj aŭdas en sia ĉirkaŭaĵo. Ili malkaŝas la ekzisto de suspektemo, antaŭjuĝo, maljusteco, envio, malrespektemo, malboneco ... Jen tuta aro da sociaj malbonaĵoj influantaj la vivojn de la infanoj.

Kiam la eta Ljuban decidis, ke Draga mem elektu la knabeton, kiu ludu la novelzon, Draga elektis ĝuste lin. Sed subite Ljuban hezitis, ekbalbutis, ne hastis konsenti ... kaj Draga ege ofendiĝis. Ŝia malpardonemo lastas tre longe (ĉu ĝi ne kaŝas fakte ŝian burĝonantan amon por Ljuban?).

La romano finiĝas 4 jarojn post tiu evento, kiam fin-fine Draga, Ljuban kaj Petro revenas hejmen de la stacidomo en la sama sledo, sentante sin repaciĝintaj.

Mi emociigis tiu romantika porinfana romano, kiun mi rekomendas al legantoj de ĉiuj aĝoj. La traduko de **Josip Pleadin** estas flua kaj bela, la eldono estas luksa, kun belkoloraj ilustraĵoj faritaj de lernantoj de la Elementa lernejo "Mato Lovrak", en la vilaĝo Veliki Grdevac. (Tiu ĉi estas la naskiĝloko de la aŭtoro, laŭ la informoj kiujn mi elĉerpis el la utila postfaco de la libro.) Mi tutkore gratulas la junajn pentristojn, iliajn instruistojn kaj ankaŭ la eldoniston, kiu iniciatis la ilustradon fare de infanoj.

SCIENCA STUDIO PRI LA KROATA LINGVISTO TOMO MARETIĆ

 Redakcia kompilo

Baldaŭ el la presejo eliros du ĝemelaj libroj. Temas pri la kroata originalo, titolita *Tomo MARETIĆ NA RASKRIŽJU FILOLOGIJE I JEZIČNE POLITIKE* kaj pri ĝia Esperanta traduko *Tomo MARETIĆ EN INTERKRUCIĜO DE FILOLOGIO KAJ LINGVA POLITIKO*. La pli aĝa el la ĝemeloj jam odoras je presfarbo, dum la malpli aĝa sekvos ĝin je unusemajna malfruo.

La nun aperanta verko pri la fama (sed ofte prisilentata kaj neŝatata) kroata lingvisto *Tomo MARETIĆ*, fakte estas scienca studo de kroata (inter)lingvisto kaj esperantologo prof. d-ro sci *Velimir PIŠKOREC* kaj lia kunlaborantino *Sanja JANKOVIĆ*.

Por efektivigo de kelkaj aferoj oni bezonas jardekojn, kaj tion tre bone ilustras ankaŭ la sorto de ĉi tiuj libroj.

Estas konate, ke *Tomo MARETIĆ* en la komenco de sia lingvistika kariero verkis la kroatlingvan traktajon *Misli o umjetnom svjetskom jeziku*. Ĝuste pro la lingvo en kiu ĉi tiu traktajo estis verkita, ĝi restis nekonata al alilandaj interlingvistoj kaj esperantologoj. Kiam ni tradukas la titolon, ni konstatas, ke temas pri *Pensoj pri artefarita mondlingvo*. Kaj tio jukas la intereson de interlingvistoj, ĉar ĝi estis verkita ankoraŭ en 1891! Do, ĝi estas unu el la plej fruaj verkoj pri artefaritaj lingvoj, kiun verkis jam konata lingvisto. Ne malpli implicas la fakto, ke MARETIĆ preparis ĝin por la solena kunveno de la zagreba Jugoslavia Akademio de la Sciencoj kaj Artoj kaj legis ĝin en tiu institucio la 10-an de decembro 1891.

Kroataj esperantistoj tiun traktajon konis jam delonge, kaj en la 1980-aj jaroj *Emilija LAPENNA*, *Franjo ŠLABEK* kaj aliaj, eĉ klopodis traduki ĝin, sed pro la faka lingvaĵo



la tradukado haltis ĉe la komencaj paĝoj, kaj la tiutempa Zagreba Esperanto-Ligo (ZEL), kiu volis eldoni ĝin, ne efektivigis la planon.

Post la fondiĝo de UZE, kiu estas idea daŭriganto de ZEL, tre baldaŭ eltiriĝis el la forgeso ankaŭ la verko de MARETIĆ. Jam en 2009 ĝia tradukado estis proponita al *Nikola RAŠIĆ*, sed la afero dum kelkaj jaroj restis neefektivigita pro la granda okupiteco de RAŠIĆ. Tiam prezidanto de UZE, s-ro *Milošević*, petis, ke *Josip Pleadin* traduku la MARETIĆAN traktajon. La unua traduko estis finpreta somere de 2012, sed ĉe la tradukinto ekzistis grandaj duboj pri diversaj lingvistikaj terminoj. Kiam la verko estis proponita al prof. *PIŠKOREC*, li iom post iom komencis enprofundiĝi en la temon, kaj trovis ĝin interesa por pli detala esploro pri MARETIĆ. Ekde tiam pasis ĉirkaŭ tri jaroj, kaj fine ni havas sciencan studon pri la laboro kaj rolo de la lingvisto *Tomo MARETIĆ*, cetere koanta kiel "kreinto" de la "serbo-kroata lingvo". Kaj verŝajne ĝuste

la serbrokroatismo kostis al MARETIĆ perdon de ĝenerala populareco en Kroatio, ĉar malgraŭ ĉio li estis grava lingvisto.

En la du libroj, kies aperon ni atendas pli-malpli jam 35-40 jarojn, krom la studo pri MARETIĆ, aperos represo de lia traktajo *Pensoj pri artefarita mondlingvo*, kiu prezentas analizon de la plej fruaj projektoj de artefarita lingvo. La intereso de MARETIĆ, krom pri kelkaj projektoj, kiuj perdiĝis el la lingva scenejo, estis direktita ankaŭ al kelkaj lingvoj, kiujn esperantistoj ofte mencias (ekz. volapuko). Apartan atenton MARETIĆ donis ankaŭ al Esperanto, kvankam li ne opiniis ĝin sia favorato por solvo de la problemoj pri planlingvoj. Malgraŭ tio, la konkludoj kaj tezoj de MARETIĆ estos tre interesaj por nuntempaj esperantistoj, aparte por lingvaj fakuloj kaj interlingvistoj.

Bonvenon do, al niaj ĝemeloj, gratulon al ilia "patro" prof. PIŠKOREC, kaj sinceran dankon al UZE, kiu entreprenis tiel gravan eldon-projekton.

DELIKATA EMOCIECO KAJ DUONKAŜITA DRAMO

Julian Modest: "La viro el la pasinteco"
Dokumenta Esperanto-Centro, 2015,

Julian Modest denove ĝojigis nin per sia nova rakontaro, kiu konsistas el 13 rakontoj. Estas neeble analizi ĉiun rakonton aparte; ili estas divestemaj kaj la literaturaj personoj (herooj) diferencas laŭ la pluraj propraj ecoj kaj destinoj. Sed kvankam la rakontoj estas laŭteme diversaj, ili havas la komunan trajton: per bela kaj simpla lingvaĵo, la aŭtoro prezentas al la gelegantaro nian (homan) rilaton al aliaj homoj (parencoj, gepatroj, gefiloj, kuzoj), same la rilaton al la peko, maljusto, homa malico; simple temas pri nia rilato al la vivo. Plejmulto da rakontoj, estas tiaj (Knabo kun kvin ridetoj, Amo, La peko, Ani) Sed la unua rakonto "La viro el la pasinteco", la titolo kiun portas la tuta rakontaro, literaturesence estas la plej kompleta, plej sukcese literature ellaborita kaj riĉigita per la filozofia, socia kaj psikologia planoj laŭ la veraj literaturaj kriterioj. Tial ni pritaksu ĝin kiel paradigmon de la tuta rakontaro.


La pasinteco estas la centra ideo de la rakonto: la ĉefa heroo troviĝas en iaspeca sinturno de la estanteco al la pasinteco. Kion do estas priskribite en la rakonto? La ĉefa heroo estas kokrita kaj forlasita edzo, eksa diplomato kiu perdis sian laboron. Lia malfidela edzino forfuĝis de la edzo al sia pli riĉa amanto lasante al li ankaŭ la du filojn. Poste la filoj tamen aliĝas al la nova familio de ilia patrino. La edzo, seniluziiginta, tute ĉagenita forlasas la urbon kaj foriras al montaro Rodopi kie aĉetas modestan arbaran dometon kaj ekloĝas tie. Pasis multaj jaroj kaj unu el la filoj volis trovi sian patron.

Li eĉ forgesis lian vizaĝon. Trovinte lin post multaj klopodoj, ekestis duoba seniluziigo: nenion komunan li havis kun la patro; same okazas kun la patro, li alvortis nur kelkajn frazojn al la filo kaj nenion pli li povis kun la filo paroli. Ili du estis nekonatoj, ili havis nek komunan temon, nek ajnan rilaton patro-filo. Ili ambaŭ, ĉiu por si mem, dolore konstatas ke ili definitive apartenas al la diversaj mondoj: la filo en la estanteco rigaradanta en la estantecon, kaj la patro restas nur en la pasinteco. La filo triste forlasas la montaron konsciiĝinta ke li por ĉiam perdis sian patron kiu, laŭ la fila sento, troviĝas ie en nedefinita spaco inter la hodiaŭo kaj la pasinteco.

Kiel oni nomu tiun spacon, tiun vakuon inter la pasinteco kaj la estanteco? Ĉu intertempo? La forlasita edzo do estas nur shajne vivanta en la hodiaŭo, li vivas en tiu ĉi intertempo. La intertempo la konata brita verkisto Julian Barnes en sia romano „La vivniveloj“ nomas „pasintnuntempo“. Multaj herooj de Modest en la estanteco travivis multajn seniluziigojn, animajn dolorojn, trompojn, mensogojn, gepatrajn divorcojn, malfidelecon geedzan... Forfuĝi kaj forgesi fariĝis ununura solvo por kiel-tiel daurigi la vivon. Forfuĝi kien? Verŝajne en la „pasintnuntempo“.

Modelo de tiuspeca rakontado troviĝas en preskaŭ ĉiuj liaj rakontoj en kiuj plektiĝas la pasinteco kun la estanteco. La ŝlosilaj rakont-motivoj portas la internan signifon kaj la simolan senton pri nerealgita homa feliĉo. Kaj la tuta afero ĉe Modest

 *Zlatoje Martinov*



admirinde aspektas samkiel la motivoj estas prenitaj de iu simbolisma sed ne realisma teksto! Estas evidente ke en la Modesta proza poetiko la plej ĉefan rolon ludas ĝuste fabulae, rakonthistorio, t.e. ago de la literaturaj herooj. Rakonto laŭ Modest ne devas esti nur malplena poetika ludado kiel en la postmodernisma prozo. Li kontraŭstaras literaturon kiu parolas pri tio „kiamaniere rakonti“, aŭ „ĉu entute oni povas rakonti“, same tiun kiu klopodas konvinki nin ke ghi „rakontos“. Anstataŭ tia (post) modernisma tendenco, Modest kiel verkisto redonas al la klasika rakonto ĝian antaŭan dignon, li tute neglektas literaturan verkadon de tn. „meta“- rakontojn.

Prozo de Julian Modest montras al la leganto delikatan emociecon, duonkaŝitan kaj kvietan dramatikon, sekretan internan vivon de la literaturaj herooj. Facila ŝanĝo de la rakonta ritmo estas adaptita al la animstato de la herooj; stile purigita kaj sugestiva rakonthistorio ebligas al Modest ke li interese kaj bele rakontu. En ĉi tiu literaturaliro troviĝas la sekreto de lia plurjara daŭro kaj sukceso ĉe la esperanta publiko.

RAPORTO TRA PERSONA PRISMO

 Nicole Else

Pri la jubilea 100-a Universala Kongreso de Esperanto raportas aŭstralia kongresanino.

Mi jam partoprenis en pluraj Universalaj Kongresoj, sed tio estis ĉefe fine de la 1970-aj kaj komence de la 1980-aj jaroj. Kvankam mi ŝatis ilin, mi sekve havis koŝmarojn. La tipa trajto de tiuj malbonaj sonĝoj estis, ke mi troviĝas en kongreso, deziras vidi miajn geamikojn, serĉas kaj serĉas ilin, sed ne trovas ilin en la homamaso. Post kiam mi translokiĝis al Aŭstralio, mi ne plu partoprenis en Universalaj Kongresoj krom en tiu, kiu okazis en Adelajdo en 1997. Tien mi veturis kun mia 6-jara filo kaj ĉeestis nur malmultajn kunvenojn, por ke mia filo ne tro enuu, kaj mi multe ekskursis kun li tra Adelajdo. Tio, mirige, okazis antaŭ 18 jaroj.

Fakte, mi naskiĝis tuj apud Lillo, kaj mia patro ankoraŭ loĝas je 20 minutoj for de la centro de Lillo per metroo. Mia patro tre deziris, ke mi vizitu lin, do ŝajnis al mi bona okazo kombini viziton al mia patro kun partopreno en la kongreso. Lillo mem tamen ne tre allogis min. Mi jam konis ĝin, ĉar mi studis tie dum 4 jaroj. Fakte, mi vere ne tiom bone konas Lillon, kvankam mi ofte estis en la centro de ĝi, sed krom tio mi ne multe vizitis ĝiajn diversajn kvartalojn. Tamen, dum la kongreso mi ne partoprenis ekskursojn, sed preferis pasigi mian tempon en la kongresejo mem.

Merkredo, kiel kutime, estis ekskursotago kaj la kongresejo estis fermita. Okazis diversaj ekskursoj, interalie al Parizo kaj Bulonjo-sur-maro. Tiu lasta estis tre multekosta, do mi decidis mem aĉeti trajnbileton kaj veturi trajne al Bulonjo. Aliaj esperantistoj havis la saman ideon kiel mi kaj do mi jam renkontis sufiĉe multajn esperantistojn en la trajno. En Bulonjo unue okazis ceremonio en la teatroj, kie okazis la unua Universala Kongreso en 1905. Tamen, en tiu teatro estas nur 400 sidlokoj, do rajtis ĉeesti nur tiuj, kiuj partoprenis en la oficiala ekskurso. Laŭ la programo, post tiu ceremonio devis okazi komuna piedirado al la placo Zamenhof. Mi rigardis sur la mapo kaj vidis, ke la placo Zamenhof estas tre proksima. Sed ne vere estis simpla piedirado, sed granda parado tra la stratoj de Bulonjo. Ni ne iris rekte al la placo Zamenhof. Ni ja estis preskaŭ 500 esperantistoj. La kvarcento da tiuj, kiuj ĉeestis la ceremonion, kaj eble preskaŭ centoj da



La aŭtorino kun afikaj kongresanoj.

tiuj, kiuj atingis Bulonjon per trajno aŭ aŭto. La trafiko estis haltigita, ni havis banderojn kaj multajn flagojn. La urbestro de Bulonjo estis inter ni. Ĉe la placo Zamenhof okazis oficiala inaŭguro de nova memorŝildo sub la busto de Zamenhof. Poste la urbestro invitis ĉiujn al la urbodomo. Esperanto-flago flirtis ĉe la supro de la urba turo. Post tio mi promenis sur la malnovaj urbaj muregoj kaj en la urbocentro, kiu estis plenplena de esperantistoj. Feliĉe, je tiu tago tute ne pluvis.

Dum la kongreso okazis multaj programeroj, kompreneble pluraj prelegoj samtempe, do eblis ĉeesti nur parton el ili. Krome, kelkaj salonoj ne estis sufiĉe grandaj kaj ne ĉiuj povis eniri. Ekzemple, mi deziris ĉeesti la koncerton de la duopo Kajto, sed proksimume 100 esperantistoj ne plu rajtis eniri, ĉar la ĉambro jam estis plenplena. Kaj mi estis unu el tiuj. Tamen la postan tagon mi alvenis frue por kant-ateliero kun ili kaj povis almenaŭ sperti tion. Por la teatraĵo “La vira semo” mi alvenis duonhoron antaŭ la komenco kaj la vico jam estis ege longa. Mi sukcesis eniri, sed aliaj ne. Mi ĉeestis la kunvenon kun la nuna redaktoro de la revuo *Esperanto*, prelegon pri suda Francio, prelegon pri

francaj kantistoj, dum kiu **Gijom Armide** kantis kaj en la franca kaj en Esperanto, prelegon de **Veronica Poór** pri iu komputilprogramo. Ŝi anstataŭos **Osmon Buller** en la posteno de la ĝenerala direktoro de UEA. **Katalin Kováts** informis pri nova programo de *U-talk* por lerni Esperanton per *iPad* aŭ saĝaj poŝtelefonoj. Bedaŭrinde, mia poŝtelefono estas “malsaĝa”! La bona trajto de tiu programeto estas, ke ĝi ne estas nur por anglalingvanoj, sed ebligas studi Esperanton surbaze de 128 diversaj lingvoj, inkluzive la kroatan. Estis kelkaj aliaj programeroj, kiujn mi tre deziris ĉeesti, sed ne povis, ĉar ili okazis samtempe kiel aliaj, ĉar mankis informoj en la kongreslibro, ĉar la komenĉo ŝanĝiĝis.

Kiel kutime, okazis solena malfermo kaj solena fermo. En la solena malfermo plej plaĉis al mi la parolado de la pranepino de **Zamenhof**. Ĉi-jare la nepo de **Zamenhof** venis kun sia filino kaj nepo. Mi kontente konstatis, ke kvankam la nepo de **Zamenhof** baldaŭ tro maljunos por reprezenti la familion **Zamenhof**, la filino **Margaret** transprenos la taskon kun entuziasmo. Ŝi lastatempe multe plibonigis sian ĝis nun tre limigitan scion de Esperanto. Ŝi uzis interalie la novan retan kurson *Duolingo* tiucele.

Dum la ferma ceremonio multaj esperantistoj eble komencis duondormi, kiam subite ĉiuj vekigis. La prezidanto de la LKK por la venontjara UK, **Petro Baláž**, parolis, kaj li komencis tre laŭdi sian koramikinon. Iom strange, ĉu ne? Tiam li elprenis el sia poŝo skatoleton kun ringo, genuis kaj petis fariĝi ŝia edzo. Feliĉe ŝi diris, ke ŝi akceptas. Do estis agrabla surprizo por ĉiuj!

Por mi la 100-a UK estis iom stranga kongreso, ĉar mi revidis multajn personojn, kiujn mi ne vidis dum pli ol 30 jaroj. Preskaŭ ĉiuj, kiuj kiel mi estis en la estraro de Junulara Esperantista Franca Organizo ĉirkaŭ 1980, ĉeestis la kongreson. Mi bone memoris gejunulojn kaj nun unu diris, ke ŝi jam havas du genepojn, alia diris, ke li baldaŭ emeritiĝos, ktp. En nia loka Esperanto-grupo estis filo de esperantista paro, kiu estis 12- aŭ 14-jara kiam mi lastfoje vidis lin. Nun alparolis min viro, kiu venontjare estos 50-jarulo. Kiu li estas, mi scivolemis? Mi rigardis lian nomŝildon kaj ekkonsciis, ke ja estas ia simileco inter li kaj la knabo, kiun mi konis antaŭ multaj jaroj.

Mi apenaŭ konatiĝis kun pli novaj esperantistoj aŭ nuntempe aktivaj esperantistoj. Inter la kunveno ili aŭ ne videblis aŭ povis nur unufraze saluti antaŭ ol kuri al venonta kunveno. Mi preferas renkontiĝojn kun multe malpli da partoprenantoj. Dum la kongreso okazis duonhoraj programeroj *Aŭtoroj sin prezentas*. Mi kontentis, ke mi ricevis la permeson prezenti mian libron pri lingvoj. Tamen en la kongreslibro ne estis informo pri tiuj programeroj. La informoj nur aperis en la kongresa kuriero. Mi esperis, ke per tiu prezentado

esperantistoj, kiuj ankoraŭ ne konas min, iom scios pri mi, sed bedaŭrinde tio ne okazis. Neniu ĉeestis krom kelkaj el miaj geamikoj, kiuj jam konis min. Ja estis multe pli famaj aŭtoroj, kiuj prezentis sin dum la kongreso, ekz. Marjorie Boulton. Mi iom ekscitiĝis, ke mi revidos ŝin, sed bedaŭrinde ŝi estis ege malparolema kaj la prezento estis ĉefe rememoroj de kelkaj ĉeestantoj.

Okazis ankaŭ futbala duonmatĉo inter esperantista teamo kaj alia. Kial nur duonmatĉo? Ĉar dum la meza paŭzo ludantoj el ambaŭ teamoj rimarkis, ke iliaj poŝtelefonoj, mono, ktp. estis ŝtelitaj! Do estis decide voki la policon kaj ne okazigi la duan duonon de la matĉo. Bedaŭrinde!

Konkludo: la UK estis historia okazo kun interesaj partoj, sed tamen ĝi ne instigas min partopreni en la venonta. Homamaso ne ĉiam estas avantaĝo.



La aŭtorino kun aŭstraliaj kongresanoj.

HISTORIEROJ DE ESPERANTO EN VARAŽDIN

 Josip Pleadin

Per ĉi tiu artikolo ni omaĝas la Esperanto-societon "Božidar Vanĉik" el Varaždín, kiu malfondiĝis per la decido de sia asembleo en septembro 2015.

LA HISTORIO RIPETIĜAS

Varaždín restis sen sia Esperanto-societo! Tiel tekstis la mallonga informo, kiun ni ricevis, sed kiu ankoraŭ ne estas publike diskonigita. Okazis do ankoraŭ unu bedaŭrinda malfondo!

Ĉu vi memoras la malfondon de la plej malnova kroata Esperanto-societo "Bude Borjan" en Zagrebo (vidu la artikolojn "La historia precedenco" en ZE n-ro 14, majo 2011, paĝo 3 kaj "Esperanto-societo Bude Borjan defintiive eksa" en ZE n-ro 18, novembro 2011, paĝo 137)? La historio ripetigias, eĉ la protagonistoj estas la samaj! La nekontestebla vero estas, ke pri la sortoj de ambaŭ malfonditaj societoj la ĉefan rolon ludis la sekretario de Kroata Esperanto-Ligo (KEL) **Spomenka Ŝtimec**, helpita de la nuna prezidanto de KEL **Anto Mlinar**, kiu estis oficiala likvidanto de la zagreba societo, kaj la unua persono informita de la protokolinto **Spomenka Ŝtimec** pri la malfondo de la societo en Varaždín.

La malfondo en Varaždín okazis surbaze de la artikolo 46 de la valida societa statuto. Proponis ĝin la lasta prezidantino de la societo, **Snježana Rusman**, ŝajne tute prave, ĉar la societo jam sufiĉe longe estis malaktiva. Sed, el la urĝeco de la afero ŝajnas, ke la vera kaŭzo de la

malfondo estis la mono posedita de la varaždina societo, kiu longe kuŝis neuzita en la konto ĉe "Zagrebačka banka". En sia retmesaĝo, sendita al la estraranoj de KEL la 22-an de septembro, **Spomenka Ŝtimec** skribis: "Hodiaŭ mi enpagis al la konto de KEL 5.900 kn de la Esperanto-Societo Varaždín okaze de ties fermiĝo. Anto (=Mlinar, rim. J.P.) bonvolu informi ke la mono venis por helpi al ni (=KEL, rim. J.P.) la vivon nun". Efektive, la preciza sumo de 5.922,90 kunaĵoj jam la 23-an de septembro troviĝis en la konto de KEL.

Per tio malaperis ankoraŭ unu el la plej malnovaj kroataj societoj, kiun ni volas omaĝi per ĉi tiu artikolo.

VARAŽDINAJ ESPERANTISTOJ EN LA ZAMENHOFAJ ADRESAROJ

Malmultaj scias, ke la unuaj varaždinaj esperantistoj estis **Milan Kamman** kaj **Josip Jedvaj**,

notitaj ankoraŭ en la *Zamenhofa adresaro*, serio 27, parto II de la 1-a de januaro 1906 ĝis la 1-a de januaro 1907 sub la numeroj 14379 kaj 14379. Kvankam pri tiuj du pioniroj ni konstatis, ke ili estis gimnazianoj kaj ke Esperanto verŝajne estis nur ilia junaĝa ŝatokupo, poste forlasita, ni devas menciigi ilin kiel la "unuajn hirundojn" de Esperanto en Varaždín.



14378. VARAŽDIN, Croation, Aŭstrujo. —
Milan Kamman.
14379. VARAŽDIN, Croation, Aŭstrujo. —
Josip Jedvaj.





Milan Kamman

Milan Kamman naskiĝis la 28-an de junio 1888 en Varaždin kaj mortis la 1-an de decembro 1962 en Zagrebo. Li finis gimnazion en Varaždin en 1907 kaj diplomiĝis pri naturaj sciencoj en 1911 ĉe la Filozofia fakultato de Zagrebo. Ekde 1909 li estis asistanto en la Zoologia-zootomia instituto kaj samtempe laboris en zoologiaj stacioj en Napolo kaj Triesto. En 1913 li estis instruisto en Ruma, en 1914 en Gospić kaj en 1915 en Varaždin. En la jaroj 1929-1933 li estis direktoro en la gimnazio de Varaždin, en 1933-1940 en la gimnazio de Nova Gradiška, poste lo profesoris en la gimnazio de Požega. Post la dua mondmilito li translokiĝis al Zagrebo, kie li laboris unue en la urba Fako pri klerigo, poste kiel mezlerneja profesoro kaj ekde 1946 ĝis pensiĝo en 1958 en la Kroata popola zoologia muzeo en Zagrebo (ekde 1950 kiel ĝia direktoro). Li estis konata kiel aŭtoro de multaj mezlernejaj lernolibroj kaj populariganto de scienco. En la mezlernejan edukadon li enkondukis modernajn instrumentadojn. Li estis fama pedagogo, zoologo kaj entomologo, kiu siajn artikolojn publikigadis en diversaj natursciencaj kaj pedagogiaj gazetoj kaj revuoj.

Josip Jedvaj naskiĝis la 20-an de februaro 1887 en Bednja kaj mortis en Zagrebo la 11-an de marto 1980. Li finis gimnazion en Varaždin en 1907, diplomiĝis pri slavistiko en la Filozofia fakultato de Zagrebo en 1912 (en 1908 li studis ankaŭ en Vieno kaj Prago). Li laboris kiel gimnazia profesoro en Vukovar (1912-1930) kaj poste ĝis pensiĝo en 1949 en la Dua klasika gimnazio en Zagrebo. Li estis membro de la centra redakto de "Kroata enciklopedio" (1941-1945) kaj vortaristo. Li famiĝis pro la scienca studo de la parolo de sia naskiĝloko Bednja (1956), kiu estas kajkava dialekto kun specifa fonologia sistemo, konservita praslava akcento kaj aliaj malnovaj influoj.



Josip Jedvaj

INTER LA DU MONDMILITOJ

Post la unua mondmilito, en Varaždin aktiva esperantistopioniro estis advokato **Vjekoslav (Slavko) Medvedović**, sed Esperanto-societo ankoraŭ ne ekzistis. Disvastiĝo de Esperanto komenciĝis per alveno de fraŭlino **Božena Mraz** el Zagrebo, kiu estis unu el



Božena Mraz

la plej viglaj membroj de Zagreba Esperantista Societo (ZES). Al Varaždin ŝi venis kiel instruistino en oktobro 1924, tuj post la finita Instruista virina faklernejo (Zagreb, 1924). La jaro 1924 estis ankaŭ la jaro de ŝia esperantistiĝo. Ŝi edziniĝis en 1929 kaj ekde tiam ŝi estis konata kiel **Božena Vanek** (aŭ **Vanjek**). En Varaždin ŝi laboris ĝis 1947, kaj post tio ŝi estis direktorino de internulejo en Zagrebo ĝis emeritiĝo en 1960. Ŝi mortis la 9-an de junio 1998 en Zagrebo kaj ŝia tombo troviĝas en la zagreba tombejo Mirogoj.

Jam en la jaro de sia alveno (1924), **Božena Mraz** gvidis kurson por 25 personoj, plejparte gimnazianoj kaj intelektuloj, sed tiu grupo daŭris nur unu jaron, kaj la gimnazianoj, post la finita studado, plejparte foriris el Varaždin. Tamen, tiu grupo okazigis en oktobro 1925 tre sukcesan amuzvesperon, pri kiu informas la gazeto "Konkordo" n-ro 10-11/1925.

Pli bona tempo por Esperanto venis en 1933, kiam la progresema laborista kultursocieto "**Sloboda**" aranĝis Esperanto-kurson por laboristoj, kiun gvidis **D-ro Vjekoslav Medvedović**. Jam en 1934 la societo "Sloboda" fondis sian Esperantan sekcion, kiu vigle



La kurso en "Sloboda"

funkciis, regule kunvenadis kaj en la jaroj 1934, 1935 kaj 1936 aranĝis kursojn, kiujn gvidis **Eduard Vrbanc**. Vrbanc naskiĝis la 5-an de januaro 1906 (en la leksikono de Marinko Gjivoje estas malĝuste menciita la jaro 1907) kaj mortis la 19-an de februaro 1991 en Varaždin. Profesie li estis kompostisto en la varaždina presejo, kaj Esperanton li lernis en 1933, en la jam menciita kurso de **Vjekoslav Medvedović**, en la kultur-kleriga societo "Sloboda". Dum pli ol 15 jaroj li estis prezidanto de la grafikista sindikato. En la societo "Sloboda" li propagandis Esperanton kaj gvidis kursojn (1934-1936), kaj poste ludis tre gravan rolon en la loka movado kiel societa prezidanto.

La 6-an de februaro 1939 **Eduard Vrbanc** kunvokis kunvenon de varaždinaj esperantistoj, celante fondi Esperanto-societon. La kunvenon krom **Eduard Vrbanc** partoprenis **Dragutin Masten**, **Josip Gjuras**, **Elizabeta Frntić**, **Janko Tevčić** kaj



Eduard Vrbanc

Stjepan Mežnarić el 12 invititoj. Vrbanc pretigis la regularon kaj la fondkunveno de **Esperantista societo en Varaždin** okazis la 12-an de marto 1939 en la filio de Privataj oficistoj, Padovčev trg 4.I. En la fondkunveno kolektiĝis la fondintoj Vrbanc, Masten kaj Ďuras kaj 20 simpatiantoj. En la fondkunveno

Vrbanc parolis pri la sekcio de Esperanto ĉe la societo "Sloboda", kiu ĉesis ekzisti. La fondkunvenon prezidis **Dragutin Masten**, kaj la propono pri fondo de societo, same kiel ĝia regularo, estis unuanime akceptitaj. La fondkunvenon partoprenis ankaŭ **Vjekoslav Medvedović**, kiu tre entuziasme parolis pri la ideo de Esperanto kaj skizis la historion de Esperanto en Varaždin. En la provizoran komitaton, funkciontan ĝis la unua jarkunveno, estis elektitaj **Vrbanc**, **Masten** kaj **Ďuras**. La regularo estis sendita al Reĝa banuslanda administrado de Sava banusejo en Zagrebo (Kraljevska banska uprava Savske banovine), kiu aprobis ĝin la 12-an de julio 1939.

La 17-an de januaro 1940 okazis la unua jarkunveno de la nova societo, dum kiu estis elektita administra komitato konsistanta el: **Eduard Vrbanc** (prezidanto), **Stjepan Mežnarić** (vicprezidanto), **Rudolf Sekulić** (sekretario), **Josip Ďuras** (kasisto), **Josip Žvorc**

KRALJEVSKA BANSKA UPRAVA SAVSKE BANOVINE
 UPRAVNO ODDELJENJE
 Pov II Broj 3.206/1939
 12. Jula 1939
 Zagreb



PRAVILA

Društva esperantista u Varaždinu.

I. Ime, sjedište, djelokrug i sredstva društva

Čl. 1.

Ime je društva: Društvo esperantista u Varaždinu (Esperantista societo en Varaždin)

Čl. 2.

Sjedište i djelokrug društva.

Sjedište je društva u Varaždinu, a djelokrug društvenog rada je teritorij varaždinski sa okolicom. Društvo nema vlastitog znaka, nego će rabiti opći esperantiki znak (petekokraka selena svijedca na bijelom polju). Društveni štampilj je okrugli sa naslovom: Društvo esperantista u Varaždinu Esperantista societo en Varaždin.

Čl. 3.

Svrha društva.

Društva je svrha:

- da širi međunarodni jezik esperanto i u tu svrhu otvara tečajev
- da održaje društvene sastanke,
- da osnuje društvene knjižnice i čitaonice,
- da podržaje usajzame veze sa svim esperantiskim društvima u svrhu unapređenja Esperanto, te njegove upotrebe u međunarodnom saobraćaju.

Čl. 4.

Sredstva društva.

Za postignuće svojih ciljeva društvo će namicati potrebna materijalna sredstva: a) prinosima članova, b) darovima i zapisima, c) prihodom od društvenih sastanaka, tečajeva, zabava i esperantiskih izložaba.

II. Članstvo društva.

Čl. 5.

Vrste članova.

Društvo imaće članove: a) redovite, b) podupirajuće, c) utemeljitelje, d) zaslužne.

Čl. 6.

Redoviti članovi.

Redoviti član može postati svaka neporočna osoba, koja govori međunarodni jezik Esperanto.

Čl. 7.

Podupirajući članovi.

Podupirajući član može biti svaka neporočna osoba ili društvo, koje želi podupirati svrhu društva.

Čl. 8.

Članovi utemeljitelji.

Član utemeljitelj može biti svako neporočno lice ili društvo, ako uplati jedamput za uvijek u blagajnu društva iznos od din 500.-

Supre: Regularo el 1939.

Supre dekstre: Aprobo de la banusejo.

Dekstre: Protokolo de la fondkunveno.

Ova se pravila odobravaju.

Po ovlaštenju vršilaca dužnosti bana
 Vršilac dužnosti načelnika upravnog odjeljenja
 Načelnik opšteg odjeljenja:



Olusovic

Čl. 1. Ime

osnovne skupštine Društva esperantista Varaždin u Varaždinu održane dana 12. rujna 1939. u prostorijama podružnice Priručnik namješteljka, Radovićev trg 4.5. kat, u 10 sati; prij. podne.

Me osnivaci: Eduard Urbanc, Slavko Markon, i Duras Josipa prisutni su 20 simpatizera i istomišljenika.

Dnevni red:

1. Otkrovenje skupštine
2. Osnivanje društva
3. Prihvatanje pravila
4. Dubro primenog vektora.

Od sarinica Dragutin elarten predanija prijedlog i razvija se na odasviri konstatare, da je skupština u redu prijedlogina i time je smatra otkrovenom molbi prijedloga da se osnuje društvo po debatoranju kćerka dnevno red, kakor bi obilo ovi jedinstvenog rasklupa da se osnuje društvo Esperantista u Varaždinu. Društvo naglašuje da je otkroven društvo potkrova da se u Varaždinu osnuje.

(bibliotekisto), **Katica Špoljar** kaj **Stanko Zorman** (membroj), kaj kontrolkomitato konsistanta el: **Slavko Medvedović**, **Mijo Kresonja** kaj **Stjepan Branilović**.

Unu semajnon poste, la 24-an de januaro 1940, okazis la unua regula kunveno de Esperantista societo en Varaždin, kaj sekvis ĝin ĉiumonataj kunvenoj ĝis la 24-a de julio 1940, post kiu ekestis preskaŭ kvinjara paŭzo, kaŭzita per politikaj kaj militaj cirkonstancoj. La 10-an de aprilo 1941 fondiĝis la kvisinga Sendependa Ŝtato Kroatio, kiu fariĝis satelita ŝtato de Germanio.

Pro la akcepto de la nazia ideologio, okazis diversaj perturboj, interalie estis malpermesita laboro de Esperantista societo en Varaždin.

Interesa epizodo okazis kun la varaždina advokato kaj pionira esperantisto **Vjekoslav Medvedović**. La 24-an de majo 1941, la ministro pri internaj aferoj de Sendependa Ŝtato Kroatio, **Andrija Artuković**, nomumis lin urbestro de urbo Varaždin, kaj **Medvedović**, kiu en la antaŭmilitaj jaroj pledis por Esperanto, subite fariĝis adepto de la ustaŝa registaro,

tre verŝajne por ne fariĝi viktimo de tiu reĝimo. Tio iomete klarigas la postmilitan ignoron de lia nomo, ĉar post la fiasko de Sendependa Ŝtato Kroatio, li estis mortpafita de partizanoj.

POST LA DUA MONDMILITO

La unua postmilita regula ĉefkunveno de Esperantista societo en Varaždin, kiu pro la malpermeso ne funkcii dum kelkaj jaroj, okazis la

22-an de aŭgusto 1945 sub prezido de Vrbaneĉ, kiu en la enkondukata parolado skizis la pasintajn historiajn cirkonstancojn, dum kiuj la societo perdis plurajn siajn membrojn. Dum tiu jarkunveno estis elektita nova administra komitato: **Eduard Vrbaneĉ** (prezidanto), **Božidar Vanĉik** (vicprezidanto), **Stjepan Đuras** (sekretario), **Ivan Hutinski** (kasisto), **Božena Vanek** (bibliotekisto), **Josip Tkalec** kaj **Franjo Majetiĉ** (komitatanoj). Kontrola komitato konsistis el **Dragutin Masten**, **Stjepan Mežnariĉ** kaj **Miroslav Vrabec**.

La 26-an de julio 1946 okazis regula ĉefkunveno kaj fondukunveno de nova Esperanto-societo en Varaždin. Tiujare la societo havis 34 membrojn (**Eduard Vrbaneĉ**, **Josip Đuras**, **Božena Vanjek**, **Stjepan Mežnariĉ**, **Ivan Koščec**, **Andela Koščec**, **Ivo Hutinski**, **Mira Hutinski**, **Jakob Cerovečki**, **Ivanka Cerovečki**, **Franjo Majetiĉ**, **Dr. Miho Moniĉ**,

Ivan Miletiĉ, **Dragutin Masten**, **Janko Tevžić**, **Zdravko Cepenec**, **Branko Mikulčić**, **Ivo Gašjeviĉ**, **Rajko Martek**, **Josip Reich**, **Anica Borovec**, **Milovan Mavar**, **Franjo Ĉus**, **Dubravka Mihaliĉ**, **Anica Požega**, **Eduard Slunjski**, **Mladen Mlinariĉ**, **Terezija Daljevec**, **Elizabeta Frntić**, **Stanka Bokarica**, **Bratomir Bajt**, **Jelka Horvat** kaj **Božidar Vanĉik**). La societanoj gvidis kursojn, revigligis la agadon kaj la societo aliĝis al Kroatia Esperanto-Ligo (KEL). La nova administra komitato konsistis el: **Eduard Vrbaneĉ** (prezidanto), **Božidar Vanĉik** (vicprezidanto), **Franjo Majetiĉ** (sekretario), **Ivo Hutinski** (unua kasisto), **Terezija Daljevec** (dua kasisto), **Anica Borovec** (bibliotekisto), **Ivan Gašjeviĉ** kaj **Stanka Bokarica** (komitatanoj), kaj kontrola komitato konsistis el: **Božena Vanek**, **Ivan Koščec** kaj **Stjepan Mežnariĉ**.

La plej grava evento en la historio de Esperantista societo en Varaždin certe estis organizado

de la 13-a jugoslavia Esperanto-kongreso (la unua postmilita) inter la 7-a kaj 9-a de junio 1947. Loka kongresa komitato konsistis el: **Božidar Vanĉik** (prezidanto), **Božena Vanek** (sekretario I), **Josip Gjurac** (sekretario II), **Ivan Koščec** (kasisto), **Franjo Majetiĉ** (teatraj aranĝoj) kaj **Eduard Vrbaneĉ** (grafikaj laboroj). La graveco de tiu kongreso estis multflanka. Jugoslaviaj esperantistoj kunvenis denove post naŭ senkongresaj kaj malkvietaj jaroj. Enkadre de la kongreso okazis ankaŭ la Dua Balkana Esperanto-konferenco kun partopreno de bulgaraj (13), rumanaj (4) kaj hungaraj (1) esperantistoj. Estis traktitaj gravaj demandoj, kiel komuna organo de jugoslaviaj esperantistoj kaj okazis jarkunveno de Jugoslavia Esperanto-Federacio, kiu elektis novan komitaton. Entute partoprenis ĉirkaŭ 300 kongresanoj. Pli detalan esploradon de la kongreso ebligos la dokumentoj pri la aranĝo, konservitaj ĉe Dokumentna Esperanto-Centro en Ĝurdevac.

PROTOKOLO

de la regula ĉefkunveno de "Esperanto-societo" en Varaždin kaj de la fondukunveno de nova "Esperanto-societo" en Varaždin, kiel filio de Kroatia Esperanto-Ligo okazinta la 26-an de julio 1946.

Ĉesintuloj:

Vrbaneĉ Eduard, Đuras Josip, Mežnariĉ Stjepan, Hutinski Ivan, Vanĉik Božidar, Majetiĉ Franjo, Mikulčić Branko, Gašjeviĉ Ivo, Borovec Anica i Daljevec Terezija.

I. La Prezidanto, s-ano Vrbaneĉ Eduard informis la kunvenon je la 8 vespero per kelkaj vortoj pri la klubo laboro en la pasinta jaro, de post la 16-a de julio 1945, kiam la klubo reaktivigis post kvarjara dumlito stago, kaj konstatare, ke la societo tiu jaro faris multe progresis.

II. La Sekretario unuvene elektas s-ano Majetiĉ Franjo kiel protokolanton de tiu ĉi ĉefkunveno.

III. La vicprezidanto s-ano Božidar Vanĉik raportas detale pri la klubo laboro, interalie menciante, ke okazis unu de li gvidita eleganta Esperanto-kurso, al kiu anarkribiĝis 53 personoj kaj komence finis ĉin 13 personoj, ke la klubo nombro nun la laste - jaro de 13 membroj kreskis ĉin 34 membroj el kiuj 27 regulaj 7 eksterordinaraj, kaj ke muntape okazis ĉiuvendredeke regulaj societaj kunvenoj, dum kiuj li gvidas dekurigan kurson por la membroj. Plue, li raportas, ke ĉin jaro ĝis nia societo aliĝis al Kroatia Esperanto-Ligo ke li, nome de nia societo estatis fondukunveno de Jugoslavia Esperanto-Federacio la 14-an de aprilo 1946 en Zagreb kiu fondis la reprezentantoj de Kroatia kaj Slovena ligoj, kaj ke li estas elektita kiel komitato de la Federacio.

IV. La sekretario Đuras Josip raportas, ke li estis tion okupita per siaj profesiaj laboroj, ke li tre mal multe povis labori por la societo, kaj ke li, ne povas doni detalan raporton pri klubo laboro.

V. La kasisto, Hutinski Ivo raportas, ke la klubo keso havas dinaron, kaj ke muntaj membroj malda al la societo por la membro-kotino.

VI. La bibliotekistino raportas fraza Vanĉik Božidar: "Ĉar la bibliotekistino Vanek Božena ne povis plenumi sian funkciojn, kaj ke li raportas ke la biblioteko konsistis solo el antaŭmilitaj esperantaj libroj, ke la societo ne povis pro malfacilaj kondiĉoj eksterlandon, merki novajn librojn, ke la societo estis por la biblioteko 3 ekemplaroj de "Esperanto-kroata vortaro" de Stevan Ĉivanović kaj stenoja por ĉi jaro revuo "Informacia Kulturo" el Sofio kiu regule venadas.

VII. La vicprezidanto proponas, ke la klubo aliĝu al Kroatia Esperanto-Ligo, ĉar tio alportos grandan utilon, ne nur al nia klubo, sed ankaŭ al la tuta lando Esperanto-movado, kaj ĉar ĉin nia kluboj estas lig membro de tiu ligo. Poste li legas, kaj detale venatas la Statuto de Kroatia Esperanto-Ligo.

VIII. La Ĉesintuloj kiel regulaj membroj de Kroatia Esperanto-Ligo leu ĉin de la Statuto de Kroatia Esperanto-Ligo unuvene decidis ke la Esperanto-societo en Varaždin aliĝas al Kroatia Esperanto-Ligo, kaj ĉar ĉin nia kluboj aliĝas al Kroatia Esperanto-Ligo, kaj ĉar ĉin nia kluboj aliĝas al Kroatia Esperanto-Ligo.

IX. La Vicprezidanto proponas, ke la klubo aliĝu al Kroatia Esperanto-Ligo, ĉar tio alportos grandan utilon, ne nur al nia klubo, sed ankaŭ al la tuta lando Esperanto-movado, kaj ĉar ĉin nia kluboj aliĝas al Kroatia Esperanto-Ligo, kaj ĉar ĉin nia kluboj aliĝas al Kroatia Esperanto-Ligo.

X. La partoprenantoj de la kunveno unuvene elektas jenan administrativan komitatojn:

Prezidanto: Vrbaneĉ Eduard
Vicprezidanto: Vanĉik Božidar
Sekretario: Majetiĉ Franjo
I-kasisto: Hutinski Ivo
II-kasistoj: Daljevec Terezija
Bibliotekistino: Borovec Anica
Komitatanoj: Gašjeviĉ Ivan
Bokarica Stanka

Kiel kontrola komitato estas unuvene elektitej:

Vanek Božena
Koščec Ivan
Mežnariĉ Stjepan.

XI. Laŭ § 10 de la Statuto de K.E.L. oni decidis, ke la klubo / filio / subskribitoj konatas estas 5 dinaroj.

XII. Eventualetoj.

- a/ Estas decidite, ke la komitatj kunsidoj de la administra komitato okazas regulu kunsido de ĉiu monato.
 - b/ S-ano Đuras Josip deklaras ke li donacos al la societo biblioteko kelkajn siajn esperantajn librojn.
 - ke la prezidanto Vrbaneĉ Eduard deklaras, ke li liveros al la societo ĉin necesajn kontrolilbrojn por la sekretarioj, kasistoj kaj bibliotekistaj laboroj.
 - d/ Estas decidite, ke la ĉia oficiala lingvo de la societo estas Esperanto.
- La prezidanto je la 9-a kaj 30 minutoj ferma la kunveno.

EN VARAŽDIN la 26-an de julio 1946.

Sekretario: P. H. Prezidanto:

Majetiĉ Franjo

La identecon de l supra kopio kun la originala konfirmas nome de Esperanto-societo en Varaždin.

Sekretario:

Majetiĉ Franjo



Vicprezidanto:

Vanĉik Božidar



La 13-a jugoslavia Esperanto-kongreso

En la postmilita periodo, la plej gravan kontribuon al la societo donis **Eduard Vrbanc**, **Božena Vanek** kaj antaŭ ĉio ĝia multjara prezidanto **Božidar Vančik**. Vančik naskiĝis en 1909 en Kaniža apud Slavonski Brod. Li estis juĝisto, anstataŭanto de ŝtata prokuratoro. Inter esperantistoj li havis internacian renomon kiel tradukanto de poezio kaj prozo. Esperantisto li fariĝis en 1928, kaj en 1958 li verkis lernolibron "Esperanto za škole, tečajeve i samouke", eldonitan ĉe la ŝtata eldonejo "Školska knjiga". Pro sia politika engaĝiĝo en la t.n. Kroata printempo, li estis publike malfavorata. Li forpasis la 23-an de majo 1970 kaj la societo prenis lian nomon. Post la frakaso de la Kroata printempo en 1971, lia nomo estis malpermesita, kaj ĝi estis redonita al la societo nur en 1997, kiam ĝi denove registriĝis post sendependiĝo de Kroatio.

En la funkciado de Esperanto-societo en Varaždine ekzistis periodoj de kresko kaj malkresko, kiujn markis unuopaj generacioj. Verŝajne plej grandan nombron da esperantistoj edukis **Zdenka (Antoŝ) Ivek**, profesoro



Božidar Vančik

de matematiko en la Gimnazio. Ŝi naskiĝis la 27-an de julio 1919 en Podgorač, gimnazion finis en Nova Gradiška, Matematikan-fizikan fakultaton en Zagrebo. Ekde 1948 ŝi laboris en Varaždin kiel gimnazia profesoro ĝis emeritiĝo en 1981. Profesorino Ivek esperantistiĝis en 1934, kaj membro de la varaždina societo ŝi fariĝis en 1948. Ŝi estis plujara prezidantino aŭ



Zdenka Ivek

vicprezidantino de la societo. Pro la malsano ŝi iom post iom forlasis la movadon kaj mortis en julio 2001. Ŝia lernantino estis ankaŭ Spomenka Štimec.

Pri nova historio de Esperanto en Varaždin, ampleksanta proksimume la lastajn 50 jarojn, oni nepre devus fari ampleksan studon, sed tio estas temo por iu alia artikolo.

TIEL AKTIVAS BJELOVARANOJ!



Josip Pleadin

Kroataj esperantistoj septembron jam tradicie rezervas por viziti Bjelovaron! Ne senkaŭze! Per sia aranĝo **“Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo”** la tieaj esperantistoj regule kontribuas al la festado de Tago de la urbo. Kaj la urbo reciprokas ilin ĉiasence kiel siajn fidindajn partnerojn.

Por la ĉi-jara aranĝo, kiu okazis la 19-an kaj 20-an de septembro, la organizanto (**Bjelovara esperantista societo - DEB**), kiel partneran landon elektis Ĉeĥion, kaj kiel partneran organizaĵon **Klubon de Esperanto-amikoj en Svitavy**. Por tia elekto ekzistas nekontestebaj argumentoj: en Bjelovar kaj ĝia regiono vivas forta ĉeĥa minoritato, aganta en en la societo **Česká obec**, kiu ankaŭ grave kontribuis al la ĉi-jara esperantista programo.

En la **Popola biblioteko “Petar Preradović”** por la aranĝo estis organizitaj eĉ tri ekspozicioj, kune titolitaj **“Tri en unu”** (*Tri u jedan*), ĉiuj starigitaj jam la 11-an de septembro. Du el ili estis dediĉitaj al ĉeĥoj, kiel ĉefa temo de la aranĝo. Sub la titolo **“Rido ne estas peko”** (*Smijeh nije grijeh*) oni prezentis ekspozicion de Esperantaj karikaturaj de la praga karikaturisto

TRI U JEDAN



Češka, 1911, “Humoristka”

SMIJEH NIJE GRIJEH
Izložba karikatura
Pavla Raka iz Praga (Češka)
Organizatori:
Društvo esperantista Bjelovara i
Esperantski klub Svitavy (Češka)

ČESI U BJELOVARU
Organizatori:
Društvo esperantista Bjelovara
i Česká obec Bjelovar





KAD SE MALE RUKÉ SLOŽE
Izložba dječjih likovnih radova
Organizatori:
Društvo esperantista Bjelovara
i Osnovna škola Mate Lovraka
Veliki Grđevac

**Narodna knjižnica “Petar Preradović”
Bjelovar, 11. - 26. rujna 2015.**

kaj esperantisto **Pavel Rak** (1939), konata kiel ilustristo ankaŭ de pluraj Esperantaj eldonaĵoj. La dua ekspozicio **“Ĉeĥoj en Bjelovar”** (*Česi u Bjelovaru*) estis preparita kunlabore kun **Raduška Malek** kaj **Ana Sedlaček** el **Česká obec**. La ekspozicio skizas la migradon de ĉeĥoj al bjelovara regiono kaj prezentas objektojn pri ilia laboro. En la unua etaĝo per ilustraĵoj por la Esperanta eldono de porinfana romano **“La trajno en la neĝo”** (de **Mato Lovrak**) prezentiĝis lernantoj de **Elementa lernejo Mato Lovrak** el **Veliki Grđevac** en la ekspozicio **“Se infanaĵ manoj kunas”** (*Kad se*



male ruke slože). En la pretigo de la ilustraĵoj helpis ilin la instruistinoj-mentorinoj **Marija Čičak** kaj **Anita Res** kun subteno de la lerneja direktorino **Ivana Pavlečić**.

Tre grave evento okazis sabate la 19-an de septembro, kiam kunvenis la ĵus elektita direktoro de la **Urba muzeo de Bjelovar** s-ro **Milan Pavlović** kaj la muzea kustoso s-ro **Tomislav Matić** kun la kustoso de la **Urba muzeo en Senta** (Vojvodino, Serbio), s-ro **Atila Pejcin**. La kunvenon krome partoprenis s-inoj **Erzsébet Sekelj** (Szeged, Hungario), **Ljiljana Sekelj-Milenković** (Beograd, Serbio), estraranoj de **Bjelovara esperantista societo Franjo Forjan** kaj gvidanto de **Dokumenta Esperanto-Centro** el Đurđevac **Josip Pleadin**. En la kunveno estis akceptita la ideo (iniciatita de bjelovaraj esperantistoj), ke en oktobro 2016 la du muzeoj kunorganizu ekspozicion de etnografia kolekto de **Tibor Sekelj**, troviĝanta en la Urba muzeo de Senta. Reprezentantoj de ambaŭ muzeoj insistis pri la neceso agnoski la Esperantan agadon de **Tibor Sekelj**, kiel nedisigebla parto de lia vivo. La ekspozicio kaj la ekspozicia katalogo estos prezentitaj dulingve, kun aparta prelegprogramo pri Tibor en la Muzeo de Bjelovar. Oni lanĉis la ideon, ke la ekspozicio porokaze migru ankaŭ al aliaj kroataj muzeoj. Post la kunveno, akompanitaj de la muzea direktoro kaj kustoso, oni trarigardis la Urban muzeon de Bjelovar.

Dum kelkhora posttagmeza sabata vizito pluraj DEB-anoj kaj iliaj gastoj konatiĝis kun **Veliki Grđevac**, la naskiĝvilaĝo de la verkisto **Mato Lovrak**. Antaŭ la Elementa lernejo havanta la verkistan nomon, salutis ilin la komunuma reprezentanto s-ro **Drago Troščan**. La ĉiĉeronino **Jasna Piščević** gvidis la gastojn tra la **Elementa lernejo Mato Lovrak** (en kiu oni vizitis la memorĉambron de la verkisto) kaj konigis al la gastoj la **Centron Mato Lovrak**.



Je la 19h00 samtage en la **Kafejo kaj dolĉaĵejo "Zagorje"** okazis malfermo de pentraĵekspozicio **"Pejzaĝoj"** (*Pejzaĝi*) de la ĉefdevena pentristino **Slavica Rukavina** el Daruvar. La ekspozicion malfermis la vicurbestrino **Jasna Višnjević**, kaj la gastojn regalis per dolĉaĵoj kaj trinkaĵoj la posedanto de la galerio s-ro **Božidar Zagorac**, kiu transprenis la donacitan pentraĵon de s-ino **Slavica Rukavina**.

La ĉefa parto de la aranĝo okazis dimanĉe, la 20-an de septembro. Kvankam esperantistoj estis malpli nombraj ol dum pasintaj jaroj, kolektiĝis ĉirkaŭ 100 personoj. La programo komenciĝis en la **Popola biblioteko "Petar Preradović"** per salutparoladoj de la biblioteka reprezentantino **Irena**

1
Reprezentantoj de urbaj muzeoj de Bjelovar kaj Senta intertraktas pri la ekspozicio de Tibor Sekelj.

2
Bjelovaraj esperantistoj kaj iliaj gastoj vizitis la naskiĝvilaĝon de Mato Lovrak - Veliki Grđevac - kaj faris komuna foton antaŭ la loka elementa lernejo, ornamita per sceno el "La trajno en la neĝo".

3
Prezidanto de DEB Franjo Forjan, la vicurbestrino Jasna Višnjević kaj la posedanto de la galerio Božidar Zagorac dum la malfermo de la ekspozicio de Slavica Rukavina.



Hlupić-Rašo kaj la vic-urbestrino **Lidija Novosel**, post kiuj la ĉeestantoj trarigardis la ekspoziciojn. Al la ĉeĥa etoso kontribuis ankaŭ la ekspozicio pri **Franz Kafka**, organizita de la biblioteko mem en la dua etaĝo.

En la dua etaĝo okazis kelkhora programo, kiu komenciĝis per salutfilmo de la **Klubo de amikoj de Esezpranto** el **Svitavy** kaj per speciala, Esperante dublita turisma filmo "**Svitavy - malferma kaj movoplana urbo**".

Per muzika programo kontribuis gelernantoj **Lorena Radičević** kaj **Luka Baranešić**, el la **Muzika lernejo Vatroslav Lisinski** el Bjelovar, ludante per violonoj la melodion de **Jacques Féréol Mazas Duo 1., Op. 36, 1. st. Allegro maestoso**. La violonistojn trejnis profesorino **Vanda Novoselec**.

Sekvis la **3-a Deklam-konkurso**, kunorganizata de **Bjelovara esperantista societo** kaj **Unuiĝo de prelegantoj de Esperanto** el Zagrebo, en kiu la deklamantoj prezentis originalan Esperantan kaj tradukitan kroatan poezion. La konkurson gvidis profesoro **Zdravko Seleš**, kaj la ĵurio, konsistanta el **Grozdana Grubišić-Popović**, **Radenko Milošević** kaj **Franjo Forjan** decidis, ke la plej sukcesaj deklamantoj estis: 1. **Antonio Vrbanič** (Ďurđevac) kun la poemo de Josip Pupačić "**La maro**", 2. **Marija Vešnik** (Zagreb) kun "**Balado el antaŭurbo**" de Dobriša Cesarić kaj 3. **Tajana Kudumija** (Bjelovar), kiu recitis "**Kaskadon**" de Dobriša Cesarić.

Post duonhora kafpaŭzo, ludante per klarnetoj **Extreme** de Ilio Volante, prezentiĝis **Ema Henc**, **Ana Grujić** kaj **Karla Glazer** el la **Muzika lernejo Vatroslav Lisinski**, kiujn trejnis profesoro **Mladen Novoselec**.

En la programo estis prezentitaj du novaj libroj en Esperanto. La libron "**La trajno en la neĝo**" de **Mato Lovrak**, kiun ĉi-jare kuneldonis **Bjelovara esperantista societo** kaj **Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj** kun la financa helpo de **Departemento Bjelovar-Bilogora** kaj la **Komunumo Veliki Grđevac**, prezentis profesoro **Zdravko Seleš** kaj la tradukinto **Josip Pleadin**. En la prezento helpis la lernantoj el Veliki Grđevac, kiuj kune kun sia instruistino **Anita Res** en Esperanto kantis "**Se infanaj manoj kunas**" (Kad se male ruke slože), kanton el la filmo "**La trajno en la neĝo**". Tiu kanto, kiu fariĝis himno de infana kooperativismo, plej bone respiegulas la idealojn de la verkisto **Lovrak**. Al la junaj ilustristoj de la libro, s-ro



Malfermo de la programoj en la Biblioteko



Lorena Radičević kaj Luka Baranešić muzikas



Antonio Vrbanič - la plej sukcesa deklamanto



La infanoj kaj instruistinoj el Veliki Grđevac antaŭ sia ekspozicio

Radenko Milošević donacis ekzemplerojn de "Zagreba Esperantisto" n-ro 1/2015, sur kies frontpaĝo ili pozas. Li ankaŭ legis la leteron de la prezidentino de Kroatio s-ino **Kolinda Grabar-Kitarović**, kiu salutis la eldonon de la verko, kiun ŝi mencias kiel "*karan memoraĵon el la junaĝo*", kies "*eterna mesaĝo pri la forto de unueco estas la mesaĝo, kiun ni devas ĉiam memori*". Aparte kortuŝan leteron al la junaj ilustristoj sendis s-ino **Jagoda Hodak**, nepino de **Mato Lovrak**. La leteron tralegis la instrustino **Marija Čičak**, kaj aparte laŭde pri la eldon- kaj kunlabor-projekto parolis la nova lerneja direktorino de Veliki Grdevac, s-ino **Ana Nakani**, kiu disdonis donacojn al kunlaborantoj en la projekto.

La dua libro prezentita en Bjelovar estis la plej nova eldono de Dokumenta Esepranto-Centro "**Tra la lando de kanguruoj**" de **Tibor Sekelj**. Ĝi estas la dua komuna tradukprojekto, realigita de DEC, en kiu partoprenis: **Mila Bečka**, **Marijan Benc**, **Mihaela Cik**, **Davor Grgat**, **Dimitrije Janičić**, **Marija Jerković**, **Zlatoje Martinov**, **Zdravka Metz**, **Radojica Petrović**, **Josip Pleadin**, **Zdenka Polašek**, **Stanko Rukelj** kaj **Zdravko Seleš** kiel tradukantoj, kaj **Tomasz Chmielik**, **Erzsébet Székely** kaj **Nicole Else** kiel provlegantoj. La eldonon per sia financa helpo ebligis aŭstralia esperantisto **Daniel Kane** kaj **Melburna Esperanto-Asocio**. Pri la libro parolis prof. **Zdravko Seleš** kaj la redaktoro de la eldono **Josip Pleadin**, kiu prezentis kelkajn el la tradukintoj, kiuj troviĝis en Bjelovar. La ĉeestantojn alparolis ankaŭ la vidvino de la aŭtoro, s-ino **Erzsébet Sekelj**, kiu rememorigis ilin, ke precize antaŭ 27 jaroj, la 20-an de septembro 1988, mortis la verkisto **Tibor Sekelj**, kies libron oni prezentas.

Proksimume duono el la ĉeestantoj partoprenis komunan fotadon en la urba parko (realigita de **Berislav Rubčić**), kaj poste oni vizitis la ekspozicion "Pejzaĝoj" de **Slavica Rukavina** en la Kafejo kaj dolĉaĵejo "Zagorje", kie oni faris unuhoran paŭzon.



La publiko en la Biblioteko

La dua programparto okazis en la ejo de **Česká obec**, kiu afable gastigis nin. Tie estis organizita komuna tagmanĝo, servita de la firmao "**MAT**". Dum la tagmanĝo la ĉeestantojn regalis per pomoj kaj natura pomsuko esperantisto **Martin Mihaldinec** el Virje, kiu per tio memorigis pri la **Monda tago de pomoj**, okazanta ĉiujare la 20-an de oktobro, kaj poste sekvis tre bela danc- kaj kantprogramo, prezentanta la ĉeĥan nacian folkloron kaj kantojn, kiujn flegas **Česká obec**. Pri la laboro de **Česká obec** parolis s-ro **Josip Sodomka**, kiu tralegis ankaŭ salutleteron de **Petro Chrdle**, posedanto de la eldonejo **KAVA-PECH** en Prago, kiu afable donacis ĉeĥlingvajn librojn por la biblioteko de **Česká obec**.

La rezultojn de la 3-a deklamkonkurso proklamis **Groz-dana Grubišić-Popović**, kaj la medalojn kaj librojn al la laŭreatoj transdonis la prezidanto de DEB **Franjo Forjan**.

Gravas mencii, ke la ĉi-jaran aranĝon, kiel kutime, finance helpis la **urbestraro de Bjelovar**. Ĉe la starigo de ekspozicioj helpis ankaŭ **Damir Matašin** kaj **Ivanka Mihaljević**, kaj la tutan aranĝon filmis **Nenad Margetić**. Transportis ekspoziciaĵojn **Grozdana Grubišić-Popović**, kiu ankaŭ bakis kukojn por la tagmanĝo en Česká obec. Organizajn aferojn gvidis **Franjo Forjan**, **Zdenka Polašek** kaj **Josip Pleadin**, financojn gvidis **Zdenka Polašek**, pri grafikaj laboroj, katalogoj kaj afiŝoj zorgis **Josip Pleadin**. Medalojn kaj afiŝojn sponsoris "**Čvor**" **Bjelovar**, pri la tekniko manipulis s-ro **Goran** el la Popola biblioteko, ktp. Kontaktojn kun Ĉeĥio peris **Peter Chrdle** kaj **Matej Narožny**, filmsaluton el Svitavy pretigis **Dvoržakova**. Ne eblas mencii ĉiujn unuopulojn, sed ni dankas al ĉiuj kiuj helpis, ke la arango ankau chi-jare estus sukcesa.



La koruso de Česká obec kantas por siaj gastoj

RAPORTO PRI LA LITERATURA KONKURSO "IVO ROTKVIĆ 2015"

En 2014 Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj renovigis la Literaturan konkurson "Ivo Rotkvić", kiu estis sukcese organizita ankaŭ en 2015. Ĝia tasko estas daŭrigi la tradiciojn de la antaŭa samnoma konkurso de Zagreba Esperanto-Ligo, kaj ĝi okazas en kvar branĉoj:

- 1) originala poezio
- 2) originala prozo
- 3) tradukoj el la kroata
- 4) tradukoj el aliaj lingvoj

En 2015 la limdato por sendi konkursaĵojn estis la 31-a de oktobro, post kiam la konkursa jurio, konsistanta el **Zdravko Seleš** (prezidanto), **Jozo Marević** kaj

Zlatko Hinšt (membroj) tralegis la ricevitaĵojn, markitajn per pseŭdonimoj, kaj decidis, ke:

En la branĉo "**Originala poezio**", la plej bonaj konkursaĵoj estas:

1. "Ĉi-nokte" de **Suso Moinhos (Hispanio)**
2. "La doloro" de **Dimitrije Janičić (Serbio)**
3. "2010" de **Suso Moinhos (Hispanio)**

En la branĉo "**Originala prozo**", la plej bonaj konkursaĵoj estas:

1. "Familia sekreto" de **Suso Moinhos (Hispanio)**

2. "Salato kaj pilafo" de **Suso Moinhos (Hispanio)**

3. "Hurtigruten" de **Kerstin Rohdin (Svedio)**

En la branĉo "**Tradukoj el aliaj lingvoj**", la plej bonaj konkursaĵoj estas:

1. Friedrich Nietzsche: "Delica kanzono" - tradukita de **Evgenij Leonidoviĉ Georgiev (Kazahio)**

2. Panda: "La lasta flugo de Karlson" - tradukita de **Evgeny Tikhonov (Rusio)**

3. Albert Giraud: "Por Kolombina" - tradukita de **Stéphane Brault (Kanado)**

En la branĉo "**Tradukoj el la kroata**" la premioj ne estas aljuĝitaj pro manko da konkursaĵoj.

Ĉiuj laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn, kaj iliaj verkoj aperas en ĉi tiu numero de "Zagreba Esperantisto".



Suso Moinhos (Jesus Moinhos Pardavila) naskiĝis en 1970 en Vigo, Galegio, nordokcidenta Hispanio. Li lernis Esperanton en 1986 per koresponda kurso. En la Universitato de Santiago de Compostela li studis Galegan Filologion, kaj tie li

instruis Esperanton dum du jaroj en la Instituto pri Lingvoj. Li studis ankaŭ en Lisbono, kie li ofte ĉeestis la kunvenojn de Portugala Esperanto-Asocio. Poste li estis Esperanto-instruisto en Vigo, ĉe privataj lingvolernejoj. En 2013 li instruis Esperanton dum kvar

monatoj en Mazara del Vallo, Sicilio. Nuntempe li okupiĝas pri la redaktado de la literaturaj temoj de la ret-kurso por E-instruistoj RITE, de Katalin Kováts. Al la revuo Beletra Almanako li kontribuas per originaloj kaj tradukoj kaj estas ĝia redaktoro. En 2014 li unuafoje

ĈI-NOKTE

Ĉi-nokte mi bezonas vian bruston subvange
 por fuĝi el la nigraj stratoj,
 la travivitaj urboj,
 la sezonoj pendantaj el la arbobranĉoj,
 glitantaj el fenestroj avenuaĵoj kaj ĉemaraj.
 Io de mi defalis,
 ion mi dissemadis espercele
 inter la palmoj de Sebto, sur la vojoj de Mazara,
 en la noktoj humidaj kaj silentaj de Lisbono —
 sed ĉio estis vane senspiriga.
 Doloras la cikatroj de la tempo,
 vi scias,
 la spuroj de la ligoj al la masto,
 kaj mi emas la velojn ekmalhisi.
 Ĉi-nokte mi ne volas pinti sur la jaroj,
 mi volas survali vin, krocigi al la nuno
 per la hela tempo de vilaĝa bubo
 tenanta kontraŭvante sian kajton.

2010

akcepti la krizovintron postulis
 vigili vestible kun vakaj manoj

kalkuli la tagojn per kalendaro
 el tranĉaĵoj de falsa ŝinko

promenadi tra la placoj laŭtakte
 mezurante la paŝojn por forblovi la ombrojn

oficiale bedaŭri

kontempli la sunsubiron el niaj bunkroj,
 imune kontraŭ l'espero de la rikolto

ĉiun aŭronon timi, ĉar futuro
 jam lavangas aŭdeble sur la altaj pintoj

anheli en la kirasoj ekostoskeletaj de niaj pleŭroj

silenti, ĉar senbuŝe, ne skribi, ĉar manstumpe

provi ekstreme la sternumon levi
 dum la piedojn inundas la propra ŝlimo

kaj allasi la tempon kuri tra la ĉambroj serĉante dion

partoprenis la Belartajn Konkursojn de UEA, en la branĉo poezio, kaj ricevis la unuan premion. En septembro 2014 li komencis la postgradajn Interlingvistikajn Studojn ĉe la Universitato Adam Mikiewicz en Poznano, Pollando.



LA DOLORO

Iam ni kune songiŝ pri aliaj bordoj
 dum viaj ĉielkoloraj okuloj
 al mi malpermesis dormadi.
 Nun vi ne estas ĉi tie,
 vi ekvojaĝis al bordo sen reveno
 kaj mi povis malsovaĝigi vortojn
 por fina respondo
 kvankam ĝi ne ekzistas.
 Se ni estas akvo
 nur fonto restas eterne juna
 kaj rivero neniam sama.
 En mi kreskas silento,
 kreskas malluma nokto,
 kreskas doloro sen vundoj.
 Dolorigas min, ho kiel forte
 tia malplena seĝo en la manĝejo.
 Dolorigas min senpaŭze,
 neĉifita kuŝejo sur via parto de la lito.
 Dolorigas min tiu malsonora
 trankvilo de la vivoĉambro,
 kiu sufokas ĉiujn sonojn de tago.
 Dolorigas min per sia sekreto
 netraleigita libro
 sur via nokta tableto.
 Nokto estas en mia buŝo,
 via rideto ne portas al mi
 helon de belaj vortoj.
 Dum urbo kvietiĝas
 en nokto de mia turmento
 la steloj malaperadas
 timigitaj per silento.



FAMILIA SEKRETO

Mi heredis tion de miaj prauloj. Miaj geavoj, kaj ĉiuj iliaj prapatroj sur la tempa linio apartenis al la sama gento. De kiam la epokoj perdiĝis en la memoro, mia familio estis profunde ligita al la maro. Ni venas de longa tradicio de maristoj. Ni konstante lokas nin sur la tero rilate la distancon ĝis la maro, kaj se iam ni devas tro apartiĝi de marbordo, ke ni ne kapablas flari la salon en la vento, ni komencas ne plene spiri, kaj abisma sento kreskas en ondoj ĝis la angoro iĝas neeltenebla.

Jam kiel knabo mi lernis manierojn kaŝi tion: mi evitis ekskursojn kun aliaj mezlernejanoj en la montaron, eĉ al Piana degli Albanesi, Monreale aŭ aliaj proksimejoj de Palermo. La timo, ke iu povus malkovri tion, pli kaj pli regis mian konduton preskaŭ ĝis obsedo: mi komencis forfuĝi drinkadon kun kolegoj, amindumojn kaj similajn amuzojn, kiujn oni atendas ĉe junuloj. Ŝajnigo ekstis por mi ordinara ingredienco en la vivo, kvankam ĝi venis manĉe-mane kun soleco. En mia familio ni preferas ne tuŝi la temon, ne trovi kialon por mencio, eĉ susure.

Dimitrije Janičić naskiĝis la 9-an de novembro 1935 en la vilaĝo Broćanac en Montenegro. Li finis porinstruistan mezlernejon kaj studon pri ĵurnalistiko. Li estas emerita ĵurnalista de Jugoslaviaj fervojoj, vivanta en Beogrado (Serbio). Montenegrano, konanta la rusan kaj Esperanton, kiun li eklernis en 1959. Ĉefredaktoro de "Jugoslavia stelo" en la jaroj 1984-1988. Li publikigis multajn artikolojn en "Monato", "Sennaciulo", "La ondo de Esperanto", "Esperanto" kaj aliaj periodaĵoj. Redaktoro de "Beograda verda stelo" (ekde 2006), aŭtoro de la plej ampleksa Esperanta-serba vortaro (Beogrado, 2013). Li verkas originalan Esperantan poezion. Laŭreato de pluraj Esperantaj poeziaj konkursoj (ekz. "Liro"). En 2012 li publikigis propran poemaron "Maturaj meditadoj".



La sekreto nin unuigas per fortaj nevideblaj ŝnuroj, kaj plifirmigas nian komunon samsangan, izolante nin de la ekstera mondo.

Ĝis hodiaŭ. Marina abrupte eniris la banĉambbron kaj vidis min torsonuda. Miaj brankoj ritme malfermiĝis dum spirado kaj dum kelkaj sekundoj lasis ŝin vidi la ruĝan, freŝan internon. Mi paralizigis kaj firme tenis ŝian rigardon. La razilo glitis el miaj fingroj sur la pelvon kaj sekve ŝi mute foriris post pordofrapo. Ŝi la unua vidis tion. Verŝajne ŝi neniam suspektis. Eĉ ne kiam en la lastaj printempaj vesperoj mi foriris kaŝe, tute sola kaj veturis per mia Vespino al Mondello aŭ al Isola delle Femmine, ankoraŭ senaj je la invado de turistoj. Tiam mi serĉis vojon inter la pufaj stakoj da sekaj pozidonioj kaj avide plonĝis en

mian maron, en la maron de la miaj. Mi revenis post noktomezo, kiam la rimorsoj pli pezis ol la konstanta alvoko de la ondoj, ja laca sed kun granda sato en la brusto.

Ŝi ankaŭ nenion diris pri mia fiksa dieto, ampleksanta preskaŭ nur marestaĵojn. Al la vendohalo Vucciria mi ĉiam alvenas inter la unuaj klientoj, kiam la fiŝoj ankoraŭ odoras je marakvo. Aliflanke, tio montriĝis la plej efika maniero ne vekti atenton de aliuloj: temas nur pri rapida interŝanĝo inter mia fidela vendisto, kiu nomas min *profissù**, kvankam verdire li ne multon scias pri mia vivo, kaj mi. Rapide, senhezite. Nul demandoj. Post hejma matenmanĝo ekas mia laboro en ne tre konata advokatejo, kies nomon, se vi permesas, mi ne volas malkaŝi.

Ĝuste tiu diskreteco de Marina, tiom laŭa al miaj vivbezonoj, forte altiris min al ŝi. Kelkfoje mi havas la impreson, ke tiu trajto de ŝia karaktero, certe propra al insulano kreskinta en Favignana ĝisadoleske, iĝis kruca kaj esenca en mia elekto. Samtempe mi konscias, ke la pago por ŝia silento povas esti risko, sed mi pretis cedi – Marina senvorte, eble sinvenĝe, postulis sam-nivelan anonimecon.

Ni konatiĝis hazarde, ses monatojn antaŭ ol ni komencis kunloĝi en mia apartamento. Mi unuafoje vidis ŝin en ĉina restoracio najbara al la kajoj kaj la Botanika

* Profesoro.

Ĝardeno, en urboparto pluretna de antaŭ ne pli ol jardeko kie homoj ariĝas laŭ haŭtkoloroj. Estis dimanĉo kaj vasta ĉina familio festenis per ekstermenuaj, grandaj haliojtoj, palinuroj kaj kortobirdaj pladoj. Mi bone memoras, kio vekis mian atenton kiam ŝi envenis mezen de la homamaso en sia blanka robo: Ŝi turniĝis montrante la dorson kaj sian nigran, longan hararon, kaj ŝi mirinde similis la senvizaĝan virinon en tiu pentraĵo de Renato Guttuso pri Vucciria. La vesto estis iom loza en la dorso, sed bone konturis ŝian larĝan kokson, kiu tuj allogis min. Nu, tio, kaj la fakto ke ŝi estis sola en iom aparta kvartalo. Post kelkaj kompleksaj kulinaraj demandoj mi donis al ŝi mian poŝtelefonan numeron kaj de tiam ni decidis renkontiĝi por kunmanĝi. Post du semajnoj ni jam estis paro kaj ni metis la fundamenton de la reguloj kiuj devus aksi nian rilaton. Ŝi faris silentan decidon, ne paktitan inter ni, sed pro kiu mi restas tre danka – ne paroli pri miaj kutimoj al fremduloj. Tiel, dum nia monato da kunvivado, ŝi lernis zigzagi scivolemajn demandojn de aliaj personoj, forgesi neoportunajn komentojn kaj rigardojn kaj konstante apudi min. Ŝi preferis nian kultivatan, forcatan senton ol esploradon de la neklaraj kaj vualitaj partoj de mia personeco. Ŝi baldaŭ familiariĝis kun mi. La skvamojn sur mia nuko ŝi trovis normalaj kiam ŝi karesis min sub la protekto de nia hejmo, kaj ŝi mem helpis al mi apliki kuracajn kremojn kaj ŝmiri mian haŭton per la oleo, kiun mia familio regule sendas al mi el Catania. Ni klopodis varti nian komunan historion inter la muro de mia sekreto kaj ŝia muta mistero. Ĉu vera amo? Mi ne scias kaj, verdire, neniam formulis al mi tiun demandon. Nun mi konscias, ke de ŝi mi neniam aŭdis difinon de niaj emocioj.

– Marina, revenu! – mi iom senespere ekkriis post kiam ŝi fermis la pordon. Mi ne volis perdi

ŝin, sed tre timis, ke ŝi foriros por ĉiam post la hodiaŭa incidento. La senfinaj sekundoj de la vido de mia torso, kiuj estus normalaĵo por mi kaj la miaj, sendube konsistigis por ŝi tre bizaran spektaklon. La viro, kiun ŝi elektis por fondi familion, antaŭmetis al ŝi sian veran naturon, ne tute viran, ne vere homan. Certe ŝi povis nun kompreni multon. Eksplikoj trois.

Unu-du minutojn poste mi reagis. Mi survestis uzitan ĉemizon, elhejmiĝis lasante malordon en la banĉambro kaj ekserĉis ŝin. Mi tiom rapidis sur la Vespino tra Via Maqueda, ke la friska aero dolorigis al mi la brankojn kaj la nazon. Nelonge post mia ekiro mi venis al granda tumulto sur la placo Giuseppe Verdi, apud la Teatro

Massimo. Mi senzorge faligis la motorciklon kaj trabreĉis la homamason cirkle starantan. En la centro etendiĝis ŝia korpo senmova, senspire dislipa, ankoraŭ eleganta sur la pavimo. Sango likis el la kapo kaj enfluis en flakon rondan. Sur la dorso, tra ŝiraĵo en la robo, sin montris minacaj vicoj da suĉiloj sur tri tentakloj.

La ŝoseo estas fenestro sur Mediteraneo. Ĝi sekvas la kaprican konturon de la marbordo, kelkfoje laŭ terstrio inter vertikalaj krutaĵoj kaj la ondoj. La buso portas min okcidenten. Malantaŭ mi restas Palermo, mia laboro, mia tuta vivo. Mi ankoraŭ ne decidis, kie estos mia fina haltejo, kie mi rekomencos de nulo. Mi certas nur, ke ĝi denove estos ĉe la maro.



SALATO KAJ PILAFO

"Hugs from Singapore" tekstis la bildo sur la poŝtkarto. Reverse, la adreso de la hotelo kie mi laboras kiel kelnero en Stone Town, Zanzibaro, kaj ŝia promeso reveni. Sed verdire mi ne volas renkontiĝi kun ŝi.

Mia nomo estas Ahmed kaj mi konatiĝis kun Roswitha,

la sendinto de la poŝtkarto, la tagon kiam oni promociis min al barestro. Tiun vesperon, post kiam mi telefonis mian familion por transdoni la bonan novaĵon, mi eliris kun du amikoj por festi. Ni iris al la ĉiama trinkejo, oftata de eŭropanoj. Kelkfoje mi amindumas kun turistinoj. Nenio grava, nur etaj kisoj kaj kunglua dancado, ĉar mi atendas la veran, mian ontan edzinon. Tamen kun Roswitha estis alie. Ŝi ne estis aparte bela kun tiuj mincaj lipoj kaj agla nazo, sed ŝi ekspluatis sian ĉarmon tre lerte, kaj krome disradiis sinceron kaj bonkorecon. Aldone, ŝi surhavis lozan ĉemizon, kio donis al ŝi tre diskretan kaj decan aspekton. Kiel mi, ankaŭ ŝi ne drinkis, kontraŭe al ĉiuj eŭropaninoj, kaj tiu simpla trajto absolute ravis min.

Roswitha venis al Tanzanio, al vilaĝo ĉe la piedoj de Kilimanjaro, kun help-organizo Hugs for the world – Brakumoj por la Mondo. Ŝi rapide kontaĝis sian simpatian al la lokanoj, instruis la multiplikan tabelon en la svahila al infanoj kaj organizis kudro-atelieron por virinoj. Tiun unuan vesperon ŝi elrakontis sian tutan vivon al mi.

Al Zanzibaro ŝi vojaĝis en kvartaga ekskurso, ŝi estas senedza kaj laboras tage kiel kontistino, نکته kiel dancistino en unu el la ĉefaj diskotekoj de Berlino. Mi perfekte povis imagi ŝin, sur dancopodio, sub laseroj kaj lumoj, kiel en la usonaj filmoj, kvankam mi devas agnoski, ke tiun ideon ni ne trovas vere plaĉa. Ŝi tiom kontentis pri sia agado en tiu norda vilaĝo, ke ŝi planis iri al Azio du monatojn poste, por plu volontuli. Nenian sekreton ŝi havis. Aŭ almenaŭ tion mi kredis.

La duan tagon ŝi venis al la hotelo por longe paroli kun mi kaj gustumi suko-koktelojn. Ŝi mendis vespermanĝon – salaton kaj pilafon – kaj foriris por dormi. Sekvint-matene mi faris decidan paŝon kaj prezentis ŝin al miaj gepatroj kaj kvar fratinoj, kiuj varme akceptis ŝin. Nur vespere, post mia deĵorado, ŝi invitis min al sia ĉambro kaj tie malkovris sian sekreton. Roswitha volis danci por mi. Ŝi eniris la banĉambrojn kun eta kofro por pretiĝi. Mi rimarkis, ke sur la lavabo kuŝis du dentobrosoj kaj mi petis al Dio, ke ŝi ne trompu min kun alia. Jam alifoje mi renkontis eŭropanojn, kiuj afektas senedezecon nur por sin amuzi kun tanzanoj. Sed kun Roswitha certe estus alie. Eksonis kanto de Swedish House Mafia kaj Roswitha aperis

el la banĉambro en ruĝa kapoto. Ŝi eligis manon, mallaĉis la longan veston kaj dismontriĝis tuta. En arĝente glimanta t-ĉemizo ŝi skuis siajn kvar brakojn. Mi retrosaltis sur la liton kaj klopodis regi min por ne pensi, ke antaŭ mi disvolviĝis kreitaĵo de Dio kaj ne diablo. Ŝi plu dancis senĝene, turnante kaj ondumante la brakojn, movante ilin jen samtempe, jen aparte aŭ sinsekve, ĝis la muziko venis al la fino.

– Bedaŭrinde ĉi tie mi ne disponas dancostangon, – ŝi asertis kun apenaŭ kredebla aplombo kaj trankvilo; videble ŝi kutimas dismontri sian strangajon – alie vi povus vidi miajn ekvilibrajn movojn kaj miajn kap-al-terajn turniĝojn.

Ŝi tiel nature kaj serene parolis, ke ŝiaj kvar brakoj ekŝajnis al mi tute normala afero, plia kaprico de la naturo, kun kiu mi povus facile kunvivi. Nur la dancado en diskotekoj ne plaĉis al mi, ĉar kontraŭa al la Korano. Mia familio neniam aprobus tion. Se mi iam translokiĝus al ŝi en Berlino, ŝi devus cedi kaj ĉesigi sian noktitan laboron kompanse al mia elmigro, kaj nur tiam ni ekparolus pri edziĝo.

Miajn meditojn abrupte tranĉis pordefrapo. Estis mia kolego Ismail kun la vespermanĝo por ŝi: denove salato kaj pilafo. Mi sukcesis

eviti, ke li enrigardu, tamen post lia foriro mi konstatis, ke Roswitha evidente ruĝiĝis de honto.

– Kio okazas? Ĉu ĉio en ordo kun la pladoj? – mi demandis al ŝi, kaj atente aŭskultis la sekvan densan silenton. Sed mi sciis, ke ne temas pri la pladoj. Mi perceptis, ke Roswitha ne diris al mi la tutan veron pri ŝi. Plu stare, ŝi enrigardis miajn okulojn kaj konfesis.

– Jes... mi tre ŝatas salatojn. La pilafo estas por ŝi.

Kaj ŝi levis la t-ĉemizon per la suba brakoparo kaj montris buŝon sur la ventro, ĝuste super la umbiliko. Ĝiaj lipoj estis eĉ pli fajnaj ol la vizaĝaj, kaj rizograjnoj ankoraŭ sidis inter la dentoj.

– Rizon! – postulis per obtuza voĉo la dua buŝo de Roswitha. La tuto ŝajnis al mi naŭza kaj mi instinkte forkuris kiel venenita muso. Dum mi hastis tra la koridoro mi aŭdis malantaŭ mi kaj ploron kaj krion petantaj, ke mi revenu. Mi ĵurus, ke ili fontis el du malsamaj gorĝoj.

De tiam mi ne plu sciis pri ŝi ĝis nun, kaj cetere miaj gepatroj trovis por mi fianĉinon, Amina. Laŭ mia propra decido, mi nun laboras en alia hotelo kiel simpla kelnero.

Pilafon mi neniam plu remanĝis.

HURTIGRUTEN

1. Ekde la komenco de la jaro ni planis, ni mendis, ni preparis "la vojaĝon de la vivo", la vojaĝon al unu el la plej belaj lokoj de la mondo, la vojaĝon laŭ la longa norvega marbordo. La vojaĝo unue celis la iaman kaj gravan komercarbon – iaman Hansa-urbon en la fama mezepoka Komerca Ligo, la urbon Bergen. Ni ekflugis de Stokholmo en bela, suna vetero, ni volis kiel Nils Holgersson vidi la

montojn sub ni. Ni atendis vidi la montojn de Hardangervidda oriente de Bergen, sed ofte en Norvegio la lando vestas sin en dikaj, grizaj vestoj, plenaj da pluvo. Ni vidis nenion de la pintaj montoj, kovritaj de "eterna" glacio. Surtere Norvegio bonvenigis nin per pluvo kaj grizo, tiel ke ni ne dubu, ke ni alteriĝis en la ĝusta lando.

Ni promenis en la miljara urbo Bergen, interalie la hejmurbo de Edvard Grieg. La stratetoj kelkloke mallarĝaj je unu metro salutis nin de praaj tempoj. La plurkoloraj

iamaj komercistaj domoj levas sin ĉe "Bryggen" (la jeteo, ponto) sub "La Sep Montegoj". Ĉu vi vidas la montegojn kaj la fjordojn en la leĝeraj tonoj de "Matena etoso" aŭ la nigrajn pezajn sonojn de "La Maljunulo de Dovre Montaro"? Grieg kreis tiun muzikon en la lastaj jardekoj de la 19-a jarcento en la norvega naturo kaj memore al ĝi. Travivu la mildan klimaton miksitan kun la sovaĝeco de Dovre Maljunulo. La lasta hejmo de Edvard Grieg nomiĝas "Troidhaugen" (la altaĵo de la troloj). La troloj salutis



vin malantaŭ multaj rokoj. La troloj aperas en la kulturo de Norvegio, la gigantoj regas sur la montegoj kaj en iliaj kavoj. Tage kaj nokte la ondoj de Atlantiko karesas la rokojn ofte dividitaj en fjordoj.

La granda, moderna ŝipo "Midnatsol" (meznokta suno) akceptas nin inter siaj brakoj kaj malavare dividas la belecon de Norvegio kun ni turistoj el multaj landoj kaj urboj. La krepusko de frua nokto ĉirkaŭas nin, dum ni ĝuas la tradiciajn manĝaĵojn de Vestlandet (la sudokcidenta Norvegio). La krepusko malheliĝas en nigran nokton kaj nun la kreskantaj ondoj lulas nin en dolĉan endormiĝon.

2. La ŝipo "Midnatsol" malrapide kaj solene glitas norden. Ĝi haltas tiel longe en kelkaj urboj, ke eblas ilin iom ekkoni. Ålesund, kies lignaj domoj grandparte forbruliĝis dum la 19-a jarcento. Ĝi estis rekonstruita komence de la 20-a jarcento en la tiam moderna stilo Jugend aŭ Nova Arto. Kia mirakla laboro krei tutan malnovan urbon en la nova stilo. La domoj "pompos" en ornamaĵoj de floroj kaj diversspecaj serpentumoj. Tre ĉarma sceno por vespera promenado.

En Trondheim, dum historia tempo la plej grava urbo de la lando, ni promenis dum suna antaŭtagmezo. La klimato tie estas milda, kun multaj arboj de pli sudaj regionoj, "folioarboj" – fagoj, tremoloj, betuloj, kverkoj, arbustoj kaj buntaj floroj ankoraŭ en oktobro. La urbo estas pli ol miljara. Grava batalo por la "naskiĝo de Norvegio" okazis en Stiklestad, proksime al la nuna urbo. Olof, kiu ricevis la aldonan nomon "la sanktulo" falis en la batalo kaj estis entombigita en 1031 en la preĝejo, la estonta katedralo. Trondheim ludis rolon kiel pilgrimejo por Norvegio kaj granda parto de Skandinavio dum pluraj jarcentoj. Ankoraŭ gvidas padoj laŭ la montoj plurloke al la grandioza, impona katedralo. Apud ĝi situas unu el la plej malnovaj



Kerstin Rohdin naskiĝis en 1937. Ŝi estas svedino vivanta en Brandbergen. Kun Esperanto ŝi renkontiĝis dank' al siaj patro kaj onklo Nils kaj Olle Olsson, sed lernis ĝin en kurso ĉe la Popolaltlernejo de Helsingör. Ŝi estis aktivulino de TEJO ekde 1960-aj jaroj kaj estrarano de Sveda Esperanto-Federacio ekde 1980-aj ĝis 1992. Dum sia riĉa esperantista vivo ŝi organizis multajn aranĝojn kaj prelegvojaĝojn de eksterlandaj esperantistoj en Svedio, kaj mem prelegvojaĝis en diversaj landoj. En tradukado ŝi elprovis siajn kapablojn tradukinte "Emilo en Smolando" kaj "Fratoj Leonkoro" de Astrid Lindgren. Dum 20 jaroj ŝi kunvivis kun konata Esperanta teatra verkisto Harold Brown, kun kiu ŝi realigis diversajn projektojn. Lastatempe ŝi verkas mallongajn originalajn prozaĵojn, ĉefe pri siaj rememoroj kaj vojaĝoj.

lignaj domoj de Skandinavio. Ĝi nun apartenas al la eklezio. Tamen Trondheim ankaŭ portas spurojn de grava komerca urbo kun sia bona situo apud la oceano kaj ĉe la granda rivero Nidelva (la rivero Nida), multe prikantita en populara kanto.

Iun posttagmezon ni haltis en Tromsø ĉe la Arkta Maro. Ĝi jam en la 13-a jarcento estis vilaĝo kun preĝejo kaj ankaŭ ludis komercan rolon en la nordo. En 1794 ĝi ricevis urbajn rajtojn. Ankoraŭ ĝi estas grava urbo ĉe la Arkta Maro kaj aspektas kiel malnova komerca urbo, kiu respuguliĝas en la verkoj de Cora Sandel pri la vivo de Alberte dum la malhelaj vintraj tagoktoj, sed kie la ŝipoj de la mondo alboriĝas. Post duonhora promenado sub ventego kaj pluvo sur longa ponto ni atingis la faman, novkonstruitan "Arktan

Katedralon". Ĝi estas grandioza pordego al Arktio surborde de la fjordo sub la montegoj kun vualo da novfalinta neĝo. Kiam ni poste rerigardis al ĝi de la ŝipo, ni preskaŭ perdis la spiron kiam ĝi videbliĝis kiel luma juvelo en la falanta krepusko kaj nigriĝantaj montoj kaj ĉielo, sur kiu ekvideblas la steloj kaj la lunserpo. La novneĝo surkape de la gardantaj montoj. En 1968 estis fondita univesitato en Tromsø, certe la plej norda en la mondo.

Ni pasis preter Hammerfest, la plej norda urbo de la mondo, kiel mi lernis en la lernejo.

3. La grandega ŝipo malrapide antaŭenglitas inter blukoloraj montoj. La ĉielo travideblas super la ĉifiĝintaj ŝeroj sur la vasta, griza akvosurfaco, de

kie la ondoj eskapis. Ĉio senmove serena. Fone aŭdeblas tonoj de piano-ludado. Eta fiŝista vilaĝo sur insuleto. La fiŝista boato de Rörvik direktiĝas maren. Kiamaniere oni povas vivteni sin tie ĉi en la nuntempa mondo? Irante norden, la altaj montoj ŝanĝiĝas en rokojn. Serene, sensone, pace! La ŝeroj ruliĝas kiel grizaj, senmovaj balenoj. Alia fiŝista vilaĝo sur insula bordo. Al kiom da homoj Atlantiko donas manĝon? Malrapida glitado per la boato surakve similas al migrado sur la montoj altebenaĵoj. Maraj birdoj flugas proksime al la akvosurfaco. Mirakle ke troviĝas tia sereneco en la mondo. Rokodorso montras sin super la akvosurfaco. La ondo ĝin karesas per blankaj manoj. En la ŝipo troviĝas multaj artaĵoj. Ŝajnas, ke ĉio estas tre bone planita kaj farita. La ĉielo malfermiĝas kaj ĵetas helan lumon super la insuletojn. La montoj malaltas kaj bluas pli kaj pli. La blua horo brakumas la mondon, metas sian trankviligan manon super ĝian loĝantaron. Saliko ripozas en fora angulo.

4. Henrik Ibsen (plej fama norvega verkisto, 1828-1906) kie vi estas? Kie kuras Peer Gynt (ĉefrolanto en fama teatraĵo de Ibsen)? Kie vi kuras inter la montoj? Kie vi parolas kun la troljoj sur la altaj montoj, en la mallarĝaj valoj? Kien vi kuras fluge, scivole? Kien vi kuras en Trolldaugen, kie vivas la feliĉaj troljoj? La troljoj dancas, ridas, kantas. "Kial"? – vi demandas. "Ĉar ni vidas alie ol vi", respondas la troljo. "Ankaŭ mi volas vidi alie. Ankaŭ mi volas kanti kaj esti feliĉa", Peer kuraĝe diris. "Facilas. Ni nur faros etan tranĉon en via okulo, kaj vi kantos, dancos, feliĉos, vidos alie". "Bone mi tion volas". La saĝa troljo konsilas: "Bone pripensu Peer, ĉar ne eblas retranĉi, ke vi denove vidu kiel nun". Peer aŭdas en la foro la kanton de Solveig, la kanton de ŝi, kiu sopiras lin, la kanton de ŝi, kiu amas

lin, la kanton de ŝi, de kiu li forkuris al la montaro. Peer pripensas: "Mi preferas esti malfeliĉa, soleca kaj vidi kiel kutime". La du grandaj animoj en la norvega kulturo kreis Peer Gynt, Henrik Ibsen, kiu verkis la tekston kaj Edvard Grieg, kiu kreis la muzikon. Krome la naturo, en kiu ili ambaŭ vivis.

La Dio de la Maroj aperas surŝipe. Li volas oferojn. Jes mi volonte oferas al li. Mi oferas, por ke la fadenoj en la vivo plektiĝu. Mi oferas, por ke la fadenoj en la ŝipo estu fortaj. Mi oferas al vi, Dio de la Maroj, glacio-pecojn en la Arktan Maron. Mi oferas, por ke la plej bela vojaĝo al la nordo, al Arkta Maro donu novan vidkapablon, ke la sopirata vojaĝo donu amon al la vivo. Ĉu tiu amo malaperu en tro varma, glacia maro inter akrepintaj montoj? Ĉu troljoj tranĉu la okulon aŭ ne?

5. Nigraj montoj ĉirkaŭas la ŝipon, ne tiuj de Peer Gynt, sed tiuj de ekkrepuskanta vespero post sune belega tago en oktobro. Nubaj figuroj surĉiele. Krepusko tiras sian grizetan vualon ĉirkaŭ la nigraj montoj. La suno briligas la neĝon surmonte. Kiu sagao fermas tiun ĉi tagon? La maljunaj turistoj, anstataŭ sidi enhejme, gustumas la restadon ĉe 60 gradoj norde – trairas la pordegon al la norda lumo aŭ mallumo? La krepusko – la blua lumo pli kaj pli konkeras la mondon. La maljunaj turistoj estu lulitaj de la noktaj ondoj. Kantu la lulkanton! La blanka vosto de la ŝipo postsekvas nin. La troljoj de la nokto vekigiĝas. La troljoj surmetas la violkolorajn noktajn vestojn. Kantu ili inter la nigraj montoj, blanka neĝo kaj ŝaŭmantaj ondoj. "Kiam la patrino trolino enlitigis la dekunu trolidojn kaj nodis iliajn vostojn, tiam trolpatrino kantas al dekunu trolidoj la plej belajn vortojn, kiujn ŝi konas 'Ho aj aj buff, Ho aj, aj buff, buff' bonan nokton".

6. La ŝipo plugas vojon de Harstad tra ŝaŭmo blanka, kiu verdiĝas je la flankoj, kiuj

malaperas en la nigra vasteco de la Arkta Maro. Montoj leviĝas bluaj, nigraj, fine griziĝas. Sunbrilo kreas arĝentan lagon. Insula monto similas al Mårran en la libro de Tove Jansson. Ŝi staras fikse, nemoviĝante, neparolante, fermita, tamen bonkora profunde en sia koro. La grundo koloras kiel tiu de la montaraj altebenaĵoj aŭtune. Kelkaj el la glaceroj naskas idojn en la Arkta Maro. Kial homoj kreas siajn loĝlokojn en tiaj "malkomfortaj" regionoj? Ili donas al ni manĝon el la akvo, manĝon el la aero. En pli fruaj tempoj la homoj tie forte laboris dum eterna "batalado" kun la severeco de la Naturo, kontraŭ maro kaj vetero. Nun la posteuloj kiel emeritoj "ĝuas" la naturon, "ĝuas" la tradicion lokan manĝon laŭ la longa marbordo, nun en oktobro 2014 dum neordinare suna, varma vetero. Vespere, ĝuante la Trollhaugajn tonojn de Grieg, ni aŭdas kaj komprenas, kion diras la insulaj montoj kaj la maraj ondoj laŭ la bordo de Norvegio.

7. Dum la vojaĝo per Hurtigruten de Bergen al Kirkenes ni vizitas 34 havenojn. Ni pasas 100 fjordojn kaj eniras unue en Hjørundfjord en la sudo. Kiam ni eniras ĝin, altaj muroj ĉirkaŭas nin, rokaj muroj diverskoloraj, diversformaj, kun diversaj fendoj, kun altaj, akraj, montaj pintoj. La suno brilas, eĉ varmiĝas. Marbirdoj ŝvebas inter la muroj. Ni mallaŭte interparolas dum ni gustumas bongustan *Irish coffee*. La giganta ŝipo ege malrapide turniĝas en la roka ĉambreto. Nuboj kolektiĝas, elverŝas iom da pluvo. La sankta momento en Hjørundfjord ne plu daŭras. La ŝipo eliras al pli malfermaj akvoj.

Iun malhelan, malfruan vesperon la ŝipo vizitas la ege mallarĝan Trolldfjordon. Ĵetlumoj dancas super la proksimaj rokaj muroj, viviĝas la koloroj – ruĝa, nigra, blanka, griza, ĉiuj miksitaj. Kelkloke oni vidas kvazaŭ la rokoj estus oblikve puŝitaj per la forta praa

glacio. Diversaj fendoj en la rokoj flugigas la fantazon kaj en la menso kreas belajn artaĵojn. Inter la rokaj muroj sonas verkoj de Grieg. Oni povus resti tie kiel ajn longe, sed la giganto turniĝas kaj malrapide elglitas la mallarĝan fjordon, kiu estas parto de la magiaj Lofotoj, kie iam vikingoj vivis kaj kie homoj vivtenis sin per la riĉeco de la maro kaj de la aero. Aliaj vesperon ni eĉ vidis iom de la norda lumo, kiu per verdaj flugiloj superkuris la nigran ĉielon.

Ni atingas Honningsvåg, la "havenon" de Nordkabo. Per buso ni veturis tra malfekunda lando, al "la fino de la mondo", kie staras la

arta terglobo, kiel monumento de nia reala. Sur la ebenaĵo 300 metrojn super la Arkta Maro Saliko celebras sian 75-jaran datrevenon. La vivo turniĝas ĉirkaŭ tri kvaronoj de la jarcento. La vivo estas plenigita per multaj travivaĵoj, sed ankoraŭ ne ĝisfine plenigita. Restas ankoraŭ multaj belaj travivaĵoj. Ĉirkaŭirante sur la altebenaĵo kun etaj, etaj, apenaŭ videblaj floroj super la Arkta Maro, plenigas la animo per sentoj da danko, da sankteco, da humileco da pensoj, ke ni devas pli bone zorgi pri nia mondo kaj ĝiaj enloĝantoj, ĉar ĉio estas donita kiel "tuta mond' al ĉiuj ni".

Sur la venta altebenaĵo

staras monumento, kiu parolas al ni pri infanoj de la mondo kaj pri paco de la mondo. Ĉu la infanoj sukcesos pli bone ol ni?

Post kiam la animo plenigis per pensoj sur la altebenaĵo inter ĉielo kaj maro inter "himmel og hav", ni per buso revenas al pli ĉiutaga mondo. Postan tagon ni flugas de Kirkenes kaj la vizito ekster la ĉiutaga vivo finiĝas.

*"Ja vi elsker dette landet, som det stier frem, furet vejrblitt over havet med dess tusind hjem"**.

* La unuaj linioj de la norvega nacia himno: "Jes, ni amas ĉi tiun landon, kiel ĝi aperas fendita de la vetero, super la maro kun miloj da hejmoj".

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj

Literatura Konkurso "Ivo Rotkvić" 2015

1-a premio en la kategorio TRADUKOJ EL ALIAJ LINGVOJ

Evgenij Leonidoviĉ Georgiev (Kazahio)

por Friedrich Nietzsche "Delica kanzono"

Zagrebo, la 15-an de decembro 2015

Zbrenko Štepec, prezidanto de la konkurso ĵurio

Evgenij Leonidoviĉ

Georgiev naskiĝis la 19-an de februaro 1987 en Karaganda (Kazahio). Li estas introvertulo, luktanta kontraŭ la ordinareco, lingvohelpanto de "Lernu", reta Esperanta lernoloko. Esperantisto ekde 2008, kunlaboranta en la revuoj "Kontakto", "Sennaciulo", "Esperantista Tribuno" kaj "Literatura Foiro". Profesie li estas komputila inĝeniero, kaj liaj ĉefaj ŝatokupoj estas literaturo kaj Esperanto.

Friedrich Nietzsche

DELICA KANZONO

Ho, hom'! Danĝer'!
 El densnokt' flustras la aer':
 "Dormadis mi,
 Sed vana estas song-barier', –
 Mond' frustras min,
 Fantomas ja la tagaper'.
 Marĉigas ĝin
 Dolor', sed belas en fajneĉ'
 La ĝoja sin', –
 Por veno de la eterneĉ',
 Profunda densa eterneĉ'!"

Panda

LA LASTA FLUGO DE KARLSON

Etulo sidis ĉe la fenestro. Lia humoro hodiaŭ estis tute aĉa. Kiu kreteno elpensis tiujn stultajn naskiĝtagojn? Baldaŭ venos gastoj kaj li devos ĝoji, sed li tute ne volas ĝoji... Etulo malame piedbatis la pluŝan hundon, kiun ĉi-matene liaj frato kaj fratino donacis al li.

– Kion do mi faru pri ĝi laŭ ilia opinio? – li pensis ofendite. – Ĉu mi kunprenu ĝin en la liton? Ĉu karesu ĝin? Ĉu laŭ ili mi ludu kun pluŝaj hundoj kiel infano?

Li ankoraŭfoje piedbatis la ludilon kaj komencis legi novan libron, kiun li trovis en la formetejo antaŭ nelonge. Subite li ekaŭdis ian zuman sonon. Etulo distris sin de la libro kaj streĉis la aŭdon.

– Ĉu la paĉĝo razas sin? Li ja matene faris tion jam, – Etulo miris kaj tuj komprenis, ke la sono venas ne de la paĉĝa elektrorazilo, sed el la malfermita fenestro.



Etulo kure venis al la fenestro kaj rigardis eksteren. Komence li nenion rimarkis, sed poste la zumado iĝis pli laŭta, kaj iu dika hometo kun helico malantaŭ la dorso flugis preter la fenestro kriante "E-he-hej" kaj afable svingante la manon al Etulo. Etulo miris.

– Hej vi, sur la fenestrobreto! – la dikulo kriis, flugante preter la fenestro la duan fojon kaj ree svingante la manon. – Akceptu la surteriĝon!

– Jes, jes, certe, mi akceptas la surteriĝon, – Etulo laŭte kriis. – La vento estas flanka, kvin metroj sekunde, la aerpremo estas sepcent tridek tri, komenco de la glisvojo...

Etulo pense taksis la surteriĝon kaj rezultigis, ke la kontraŭa domo ne permesos ĝuste fini la flugon. Li denove rigardis eksteren kaj kriis:

– Hej! Kiel vi surteriĝos: ĉu aeroplane aŭ helikoptere?

– Mi surteriĝos karlson! – la dikulo kriis responde, enflugante tra la fenestro. Li kelkfoje ĉirkaŭflugis la ĉambron, surteriĝis sur la sofona, ekstaris, klinis sin, ĝentile movinte la piedon.

– Karlson, – li prezentis sin. – La plej bona en la mondo, certe. Kaj kiel vi nomiĝas?

– Etulo, – Etulo respondis.

– Do, ni konatiĝis, – Karlson diris kaj medite ĉirkaŭrigardis la ĉambron. Li penseme staris kelkajn sekundojn kaj subite surdige kriegis: "Vekiĝu!" Etulo timiĝis.

– Kio okazis? – li demandis timeme.

– Al mi ŝajnis, ke vi ekdormis, – Karlson diris.

– Tute ne, – Etulo respondis.

– Kial do vi ne kuras freneze al la kuirejo por regali la karan gaston? – Karlson demandis indigne. – Mi povas diri, ke mi preskaŭ mortis pro la malsato...

Karlson konsumiĝinte falis en la fotelon, fermis la okulojn kaj ŝajnis mortanta.



Evgeny Tikhonov naskiĝis en 1975 en Novosibirsko (Rusio). Li studis matematikon en la novosibirska ŝtata universitato kaj nun laboras kiel programisto. Li eklernis Esperanton en 1992 kiel memlernanto, sed ekuzis ĝin praktike en 2002, kiam li trovis, ke eblas babili en Esperanto rete. Por lerni Esperanton li tradukadis. Li tradukis (subtitolis) kelkajn filmojn, kelkajn rakontojn kaj almenaŭ unu grandan romanon. En la rusan li tradukis "Vojaĝo al Kazohinio", por kiu li serĉas eldonejon.

– Oj! – Etulo konfuzite saltis. – Tuj! Ni havas nur knelojn. Ĉu kneloj savos vin?

– Kneloj? – Karlson malfermetis unu okulon. – Bone, estu almenaŭ viaj kneloj.

Etulo portis el la kuirejo teleron da kneloj. Karlson saltis el la fotelo, kaptis tuj du knelojn kaj ŝovis ilin en la buŝon.

– Bonvolu diri, – Etulo singene demandis, – kiel vi flugas?

– Ĉu vi ne vidas? – Karlson balbutis kun la plena buŝo. – Mi havas helicon sur la dorso.

– Interesege! – Etulo miris. – Sed pardonon! Vi ja flugis kun la pozitiva tangaĝo.

– Kun kio? – Karlson malfermis la buŝon pro la surprizo kaj apenaŭ misglutis la knelon.

– Nu... Vi ja flugis kun la kapo supren iom kliniĝinte antaŭen. Tial la helico devis tiri vin supren kaj malantaŭen. Kial do vi flugis antaŭen kaj ne malen?

Karlson, ne aŭskultante Etulon, kun intereso pririgardis la bretojn de la ŝranko. Subite, unu

rafinita aparato, staranta sur la plej supra breto, ekinteresis lin.

– Mi flugos malantaŭen kiam mi finmanĝos la knelojn, – li diris distriĝe. – Estas maldece tuj ĉesigi la viziton. La mastroj povas pensi, ke mi venis nur por manĝegi.

– Kaj tamen min ege interesas via helico... Oj! – Etulo jetis sin al Karlson, sed malfruiĝis. Karlson prenis la rafinitan aparaton kaj faligis ĝin. La rompaĵoj disŝutiĝis en la tuta ĉambro.

– Vi... vi frakasis mian maŝinon! – Etulo ekploris. – Mi mem faris ĝin kaj vi...

Karlson singene movis la piedon.

– Ne affiktiĝu, Etulo, – li diris. – La okazo ja estas banala. Hejme mi havas mil tiajn maŝinojn! Mi donacos al vi unu novan, kaj eĉ du.

– Ĉu mil? – Etulo miregis. – Kaj ĉu ĉiuj funkcias?

– Ĉiuj, – Karlson certigis lin. – De mateno ĝis vespero la tuta milo estas funkcia, zumanta, siblanta – belege!

– Terure! – Etulo kom-
pate rigardis al Karlson. – Ĉu via
intestaro estas tiom malsana?

– Intestaro? – Karlson ne
komprenis.

– Jes. Tiu maŝino ja estas
aerfreŝigilo. Ĝi absorbas hidrogenan
sulfidon kaj aliajn gasojn... nu,
tiujn, kiuj aperas pro... – kaj Etulo,
ruĝiĝinte, flustris ion al la orelo de
Karlson.

– Ĉu? – Karlson kompren-
nis. – Verdire, mi intencis forjeti ilin
ĉiujn. Mi tute ne bezonas ilin. Sed
forjetonte, mi donacos al vi paron
aŭ eĉ tri.

– En ordo! – Etulo ridetis
kaj liaj okuloj momente sekigis. –
Ĉu mi rajtas rigardi vian helicon?

– Certe. – Karlson turnis
sian helicon al li.

– Belege! Ĝuste tion mi
suspektis, – Etulo diris, rigardinte la
helicon.

– Ĉu la helico estas bona?
– Karlson demandis kontente.

– Mi ĝuste suspektis,
ke tio ne estas helico, – Etulo
respondis. – Helico ne povus tiel
funkcii, ĉar via dorso ŝirmus la
grandan parton de la aera flukso, kaj
la tuta energio estus malŝparata por
turbulado.

– Hej, kion vi? – Karlson
paŭtis. – Ĝi estas la plej bona helico
en la mondo!

– Ne koleru! Certe, ĝi
estas mirinda helico! – Etulo diris
rapide. – Sed ĝi ne estas vera helico.
Ĝi havas tre interesan mekanismon,
turnantan la padelojn. La vektoro de
la rezulta forto kuŝas en la revolua
ebeno, kaj la punkto de apliko de
tiu forto troviĝas maldekstre de via
centro. Do la levoforto estas direktita
de la piedoj al la kapo, laŭlonge
de la dorso kaj ne perpendikulare,
kion mi pensis komence. Kaj la
punkto de apliko de la levoforto
situas maldekstre, ĉar ĝi rezultas
nur de tiuj padeloj, kiuj ĉi-momente
moviĝas malsupren...

– Kial vi sakras? –
Karlson ofendiĝis. – Spertulo, – li
aldonis malkonfide.

Li ekstaris kaj ŝajnis
sian foriron.

– Pardonu min, – Etulo
timiĝis. – Bonvolu ne foriri.

– Nu bone, mi ne foriros,
– Karlson denove falis en la fotelon.
– Kaj kion ni faru? Mi proponas
ludi!

– Bone! – Etulo ĝojis. –
Kaj kion?

– Ekzemple fabeladon.
Vi rakontos al mi fabelon kaj
mi aŭskultos ĝin, – kaj Karlson
prepariĝis aŭskulti.

– Fabeladon? Sed mi ne
memoras fabelojn!

– Ĉu? Ĉu vi tute ne
memoras? Nu almenaŭ pri la
ruĝkufolino?

Etulo kapneis.

– Kaj pri la kato en botoj?
Kaj pri la flutisto Hamilton?

– Jes, certe! – Etulo frapis
sian frunton. – Mi provis pense
modeli vian flugadon helpe de la
mekaniko de Lagrange. Sed ŝajnas,
ke la Hamiltona mekaniko ĉi tie
estas pli trafa. Gravas ĝuste skribi
hamiltonianon, kaj poste...

– Ŝajne vi intencis rakonti
al mi fabelon! – Karlson ree paŭtis.

– Nu jen, vi ankoraŭfoje
ofendiĝis! – Etulo diris triste. –
Al mi ŝajnas, ke tia helico, kiel
la via, nepre kaŭzos aldonan
turnan momenton. Vi ja ne
havas malantaŭan helicon, kiel
helikopteroj. Kaj vi estos direktata
flanken de la celo. Mi neniel povas
kompreni, kiel vi kompensas tiun
momenton. Ĝi devas turni vin
kaj post iom da tempo vi nepre
komencos ŝraŭbfali.

Etulo kaptis la morman
rigardon de Karlson kaj ĉesis.

– Ne estas interese kun
vi, – Karlson diris malgaje. – Bone,
mi vizititis vin, estas la tempo por
foriri. *Ciao!*

Kun tiuj vortoj Karlson
venis al la fenestrobroto, ŝaltis la
helicon kaj saltis eksteren.

– E-he-hej, Etulo! Adiaŭ!
– li kriis, ŝvingante la manon al
Etulo.

– Atendu! Mi komprenis!
Mi ĉion komprenis! – Etulo kriis,
ĵetante sin al la fenestro. Karlson
lerte turniĝis kaj revenis al la
fenestro.

– Nu, kion vi komprenis?
– Karlson demandis, falinte sur
la sofona. – Ĉu ke la gastoj estu
amuzataj kaj la mastroj ne diru
stultaĵojn?

– Mi komprenis, kiel vi
kompensas tiun momenton! – Etulo
kriis. – Flugante vi ĉiam ŝvingas
la manon. La aerfluo puŝas tiun
elstarantan manon kaj kompensas
la turniĝon. Por flugi vi nepre devas
ŝvingi la manon.

Karlson ege koleriĝis.

– Vi ree gurdas la samon!
– li diris morne. – Mi devas nenion
por iu ajn! Mi ŝvingas la manon kaj
krias "E-he-hej", ĉar mi estas gaja
kaj afabla viro en la apogeo de la
vivaj fortoj. Sed al tiaj teduloj, kia
vi estas, mi eĉ ne ŝvingos la manon.

– Se mia hipotezo estas
vera... – Etulo komencis, sed
Karlson jam elflugis tra la fenestro.

Etulo vidis, ke Karlson,
pliigante la rapidon, reflekse tiris
la dekstran manon, sed bridis
sin. Li tuj estis direktita flanken.
Li klopodis rektigi la flugon kaj
denove preskaŭ ŝvingis la dekstran
manon, sed tuj kaptis ĝin per la
maldekstra kaj premis al la korpo.
Karlson estis misdirektita pli multe
kaj subite li estis turnita flanken al la
direkto de la flugo. Li kapitulacis kaj
malespere eksvingadis la manon,
sed malfruiĝis. La aera torento
renversis lin kaj, baraktante en la
aero, Karlson impetis malsupren.

– Merdu-u-u-u-ulo!!! – la
lasta krio de Karlson atingis Etulon
kaj li vidis Karlsonon kolizii kontraŭ
la betona fosto kun granda rapido,
ruliĝi sur la tero kaj senmove sveni,
etendinte la manojn kaj la piedojn.
Ĉirkaŭ lia kapo aperis granda sanga
makulo.

Etulo suspiris kaj revenis
al la libro. Sed ankaŭ nun oni
malhelpis al li legi.

– Etulo! – li aŭdis la
paĉjan voĉon. Etulo turnis sin al la
paĉjo.

– Etulo, ĉu estis vi, kiu
prenis la libron pri hidrodinamiko
de Landau kaj Liŝic? – la paĉjo
kviete demandis, enirante la ĉam-
bron. – Ĝi staris sur la breto kaj

Konkurse

ŝirmis la makulon sur la tapeto, kaj nun ĝi forestas.

– Jes, mi. Mi metis ĝin sur la tablon, – Etulo flustris. – Mi ne sukcesis remeti ĝin sur la ĝustan lokon.

– Ho Etulo, Etulo, – la paĉjo tenere karesis la kapon de Etulo. – Por kio do vi prenas tiajn librojn? Vi ja tutegale ankoraŭ ne kapablas kompreni ilin. Kaj bildoj en ĝi preskaŭ tute forestas.

– Jes, mi nenion komprenis, – Etulo mensogis.

– Certe vi ne komprenis. Por kompreni ĝin oni ja devas multe lerni, dekomence en lernejo, poste

en universitato, kaj vi dume nur komencis lerni en la unua klaso. Vi prefere rigardu, kiu venis al vi, – la paĉjo diris, enlasante en la ĉambron Kristeron kaj Gunilan, la amikojn de Etulo.

– Krister! Gunila! – Etulo ĝoje eksklamaciis. – Mi ege ĝojas vidi vin!

La paĉjo tenere rigardis al Etulo kaj kviete foriris.

– Etulo! – Krister diris, donante al Etulo ian volvaĵon.

– Ni gratulas vin okaze de via naskiĝtago kaj volas donaci al vi tiun nebulkameron.

– Ĉu nebulkameron? –

La okuloj de Etulo ekbrilis. – Tio estas superba! Mi delonge revis pri ĝi! Kaj kia estas ĝia koefficiento de vapora saturoco?

Etulo sincere ĝojis, sed tutegale Krister kaptis la tristajn nuancojn de lia voĉo.

– Kio okazis, Etulo? – li demandis. – Ĉu vi malkontentas pri io?

Etulo morne suspiris kaj sopire fermis la libron "La sekretoj de vivisekcio", restiginte ĉe iu paĝo paperon.

– Mi ne ricevis hundon donace.

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj

Literatura Konkurso "Ivo Rotkvić" 2015

3-a premio en la kategorio TRADUKOJ EL ALIAJ LINGVOJ

Stéphane Brault (Kanado)

por Albert Giraude "Por Kolombina"

Zagreb, la 15-an de decembro 2015



Albert Giraude (1860-1929)

POR KOLOMBINA

Pala floro de plenumo
Kiel rozo lakteblanka,
Malhelido somernokta,
Nur teni vin en la mano!

Kvietig' de l' misfortuno:
Laŭ Lete' serĉad' senfina
De l' pala flor' de plenumo
Kiel rozo lakteblanka.

Silentig'os la rankoro
Nur se de l' ĉiel' kolera
Venas volupto ĥimera:
Bruna felo, petalpluvo,
Kaj pala flor' de plenumo.

Stéphane Brault estas Kanadano, naskiĝinta en Montrealo, Kebekio, sed nun loĝanta en Gatineau. Li laboras kiel tradukisto kaj interpretisto. Denaske li estas francparolanta, sed interesiĝas pri fremdaj lingvoj. Li esperantiĝis en 2007.

PREMIO "DEGENIO VELEBITA" NULIGITA

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE) per reklamartikolo en *Zagreba Esperantisto* anoncis konkurson por Premio "Degenio Velebita" por la plej bona kunlaboranto de la portalo www.zagreba-esperantisto.hr kaj

la gazeto *Zagreba Esperantisto* en 2015.

Ĉar la menciita jaro estis la plej malfacila periodo de UZE ĝis nun, dum la tuta jaro aperis nur tri numeroj de la gazeto, kaj ankaŭ la portalo neregule publikigis la

informojn. Inter la kunlaborantoj ĉefe aktivis membroj de la redakcioj, kiuj ne rajtas ricevi la menciitan premion. Pro tio UZE kaj la redakcio de *Zagreba Esperantisto* decidis **ne atribui** la Premion "Degenio velebita" por la jaro 2015.



ILEI? NE, DANKON!

 Zdenka Polašek

"Mi estas impresita de la alta nivelo de profesieco. (Pardonu se mi ripetas ĉi tion kaj sonas troige pri io tute normala en la cetera mondo, sed mi simple devis konstati ĝin ĉar ne tiom ofta en Esperantujo". Tiel en sia retmesaĝo la 22-an de januaro 2015 skribis Radojica Petrović, estrarano de ILEI pri konferencoj, komentante la labormanieron de kelkaj kroatiaj Esperanto-societoj.

Nur kvin tagojn antaŭe (la 17-an de januaro), la ricevintoj de ĉi tiu retmesaĝo akceptis en Vrbovec la proponon de ILEI, ke ili organizu en Kroatio novtipan pedagogian alternativan festivalon PAFO. Tiu festivalo, kiun oni planis organizi en Bjelovar, poste ricevis la nomon ILEI-FEST.

La ideo pri ILEI-arango en Kroatio ne estas nova. Ankoraŭ en 2013, en la ILEI-konferenco okazinta en Herzberg, Marija Jerković transdonis al Mirejo Grosjean, prezidantino de ILEI, la interkonsenton de tri kroatiaj societoj (subskribitan la 2-an de marto tiujare en Sisak), kiu estis intencletero por inviti la ILEI-konferencan al Kroatio. La kvara societo, kiu aliĝis al tiu interkonsento, estis Bjelovara Esperantista Societo, ĉar ĝi ofertis la plej favorajn kondiĉojn por organizi la konferencan en sia urbo, ricevinte konsenton de lokaj kaj regionaj aŭtoritatoj pri aŭspicio. La Departemento Bjelovar-Bilogora eĉ financis la reklamilon *Kroatia kandidatiĝo por ILEI-konferenco*, kiun oni distribuis dum la UK en Bonaero kaj dum la ILEI-konferenco en Montevideo.

Konforme al la *Konkurso por elekto de organizanto de la 49-a ILEI-konferenco en 2016*, la 10-an de oktobro 2014 la kvar kroatiaj societoj sendis detalan, 23-paĝan kandidatiĝproponon de Bjelovar. Malgraŭ la pli frua intencletero ŝajnas, ke la kandidatiĝo de Bjelovar surprizis la Estraron de ILEI. Evidentas, ke la 49-a konferenco jam antaŭ la diskonigo

de la *Konkurso*, estis promesita al Hungario. Tian decidon certe almenaŭ parte kaŭzis la problemoj de la du ekzistantaj (konkurencaj) ILEI-sekcioj en Kroatio, respektive la kontraŭstaro de Marija Belošević, kaj la konferenc-rilataj malveroj lanĉitaj de KEL-prezidantino Judita Rey Hudeček. Tamen ne eblis ignori la bone preparitan kandidatiĝon de Bjelovar, kaj ILEI mem proponis al la kvar societoj, ke anstataŭ la konferenco ili organizu la festivalon, kio estis akceptita en Vrbovec la 17-an de januaro 2015.

Malgraŭ la intensaj preparoj de Bjelovara Esperantista Societo, eĉ kvar monatojn post la decido el Vrbovec, flanke de ILEI ne eblis ricevi konkretajn kaj sufiĉe kvalitajn decidojn. Ekzistis nur provizoraj ideoj kaj imagoj, sen bezonataj decidoj. Pro tio la lokaj organizantoj invitis la estraron Radojica Petrović por viziti ilin kaj surloke pritrakti detalojn. Radojica Petrović venis la 11-an de majo, kaj tiam estis formita Loka festivala komitato (LFK), kaj difinitaj du gravaj taskoj de la estraro Petrović. Li devis senprokraste: **1) pretigi tekstojn kaj bezonatan kotiztabelon por la festivala reklamilo, kiu eldoniĝus je kosto de Urbo Bjelovar, 2) interkonsenti kun UEA, ke la reklamilo estu senpage distribuata pere de la kongresaj sakoj en Lillo.**

Sekvis nova unumonata senfrukta silento, kiu daŭris ĝis la 10-a de julio 2015, kiam la lokaj organizantoj, konsciaj pri la nesufiĉa tempo por religi la interkonsentitan, sendis al ILEI-estraranoj *Malfermitan leteron*, atentigante pri la tempomanko. La silento de ILEI kaŭzis grandajn problemojn al la lokaj organizantoj, ĉar la urbaj kaj departementaj instancoj postulis konkretajn agadkaj financajn planojn, por ke la festivalo estu planita en iliaj buĝetoj ktp. Ĉion ĉi ILEI ignoris sen klaraj argumentoj.

En la momento, kiam estis skribita *Malfermita letero*, la

LFK jam havis la informojn, ke la reklamiloj devus atingi Oostende kaj Roterdamon ĝis la 16-a de julio, aŭ Lillon ĝis la 23-a de julio, por esti enmetitaj en la konferencajn-kongresajn sakojn. Tio estis praktike neebla misio, ĉar la limdato por transdoni la laboron al (senpaga) profesia dezajnisto pasis la 6-an de julio. Intertempe la LFK aĉetis domajn kaj rezervis servilon por la festivala retpaĝaro de la festivalo kaj trovis aspektigiston, kiu atendis la reagon de ILEI.

Nenio el la planitajoj realiĝis, sed anstataŭe, komence de julio 2015, ILEI informis, ke la decido pri la festivalaj kotizoj povos okazi nur aŭtune, kio estis unuflanka ŝanĝo de la interkonsento farita en Bjelovar la 11-an de majo, neniel akceptebla por la lokaj organizantoj.

Ok tagojn post la *Malfermita letero*, la 18-an de julio 2015, la Estraro de ILEI decidis, ke ILEI rezignas pri organizado de la Festivalo en Kroatio, sed tiu informo nur post plurfoja insistado de la LFK, atingis Kroation la 6-an de aŭgusto, do tri semajnojn poste! En tiu mesaĝo de Mirejo estis aludite, ke eble ILEI tamen povus aŭspicii la Festivalon, kion la LFK ankaŭ tuj akceptis, sed poste (la 19-an de aŭgusto) sekvis denova rifuzo flanke de ILEI, eĉ malpermeso uzi la siglon ILEI-FEST.

La lokaj organizantoj opinias, ke pro la malrespondeca rilatado al la kunlaborantaj organizaĵoj en Kroatio, kaj ĉefe al Bjelovara Esperantista Societo, ILEI faris gravan kaj nemezureblan damaĝon al la reputacio de Esperanto en la medio, kiu cetere estas tre favora al ĝi. Tio estas mahonorinda ago de ILEI kiel internacia organizaĵo, kiu implicas, ke ILEI fakte neniam sincere intencis organizi la festivalon en Kroatio, kaj ni demandas: *kial ĝi do proponis, ke la kroatoj organizu ĝin.*

Kaj nun, se iu demandus nin, ĉu ni volus denove kunlabori kun ILEI, la respondo certe estus: **ne, dankon!**

STARIGITA BUSTO AL PASTRO ŠKOBALJ

Davor Grgat

Kadre de la 14-a Kultura somero de Dugi Rat, sur la Placo de Poljica, estis malkovrita busto al pastro Ante Škobalj. Tiukaze en la loka kinejo "Dalmacija", antaŭ parencoj, amikoj kaj multnombra publiko, parolis d-ro sci. **Gracijano Kalebić** el la Universitato de Split, kiu memorigis la ĉeestantojn pri la suferoj de **Ante Škobalj** post la dua mondmilito. Kiel homo, li elstaris per sia fruktodona pastra agado. Li estis sciencisto kaj elstara socia aktivulo, batalinta por homaj liberecoj kaj granda bonfaranto. Li elprovis sin kiel skulptisto, pentristo, scenaristo, reĝisoro, historiisto, arkeologo, aŭtoro de multaj libroj kaj sciencaj artikoloj, verkisto kaj poligloto. Krom la malnovan slavan lingvon, li bone parolis la greka, latina kaj la Internacian Lingvon Esperanto.

En la urbocentro, kie troviĝas lia busto, antaŭ multaj loĝantoj kaj turistoj, sian poemon pri la pastro laŭtleĝis **Ante Tomaš**, kaj pri vivo kaj verko de la karmemora pastro parolis ĵurnalisto **Davor Grgat**. Grgat diris, ke ni memoras lin kiel bonan amikon, nekutiman homon kaj pastron, kiu bone parolis Esperanton. Iam li estis membro de IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista), korespondis kun esperantistoj el Japanio, Brazilo kaj aliaj landoj.

La buston malkovris la urbestro de Dugi Rat, inĝ. **Jerko Roglić**.

Dum siaj lastaj tagoj la pastro Ante tre ŝatis paroli Esperante, salutante per "Laŭdinda la Dio" kaj kantante: "En la mondon venis nova sento ...



IAMAJ BRIGADANOJ VIZITIS SPLIT

Davor Grgat

Post la 100-a Universala Kongreso de Esperanto, el Lillo (Francio) al Split (Kroatio) venis du esperantistoj, kiuj antaŭ 30 jaroj partoprenis en la konstruado de la Astronomia centro en Split. Temas pri s-ino **Jolanta van Holstein** el Hago (Nederlando), kiu venis kun sia 20-jara filino **Nicole** kaj s-ro **Murat Özdizdar** el Istambulo (Turkio). Precize dirite, la Astronomia centro estis konstruita sur monto Mosor apud Split, je alteco de 700 metroj. La konstruado komenciĝis en 1985. Inter la unuaj konstruintoj estis 28 esperantistoj el 17 landoj, membroj de Internacian esperantista laborbrigado, kiuj dum du semajnoj konstruis la fundamenton.

– Nuntempe tiu konstruaĵo estas moderna, bela kaj instrua loko por multaj vizitantoj – diris s-ro **Zoran Knez**, konstanta laboranto

de la Astronomia centro kaj nia gastiganto – ĉar dum someraj kaj vintraj monatoj regule venadas multaj ekskursoj.



La restado sur Mosor (la centro de iama Respubliko de Poljica, kiu ĉi-jare festis sian 1000-jariĝon), estis tre agrabla kaj sukcesa dank' al lokaj esperantistoj (**Esperanto-societo "Split"**, s-ro **Zdravko Budiša**, kiu estis nia veturiganto kaj zorganto pri nia manĝado, **Marijan Drnasin**, prezidanto de la societo, kiu akceptis nin en la haveno kaj zorgis pri ekskursoj tra Kaštela kaj Trogir, kaj **Marijan Cević**, la plej grava persono de ĉi tiu vizito, kiu instigis la renkontiĝon de la brigadanoj kaj zorgis pri la ekskurso al insulo Ŝolta).

Tagon post nia alveno, ni vizitis la urbon Omiš. Vizitinte la malnovan urboparton, ni estis akceptitaj ĉe la vicurbestro s-ro **Ivan Tomasović**. Dum agrabla duonhora babilado, s-ro **Tomasović**, kiu estas bone informita pri Esperanto, interesiĝis pri la monda lingva problemo kaj pri la manieroj, kiel esperantistoj solvas ĝin. Post la vizito, ni pasis tra la urbocentro, informiĝinte pri ĝiaj riĉa tradicio kaj historio. Sekvis kelkhora sunumado, naĝado en la maro kaj vespermanĝo

en Priko, la nova urboparto. Ĝis noktomezo ni observis la ĉielon el la teraso, kaj s-ro **Knez** montris al ni Grandan kupolon, kie li demonstris al ni la funkciadon de la teleskopoj, pere de kiu ni ĝuis la noktan ĉielon kun Venuso, Saturno ... Kompreneble, ni eksciis kiuj steloj estas plej brilaj, kiel oni trovas la Nordan poluson ktp. Dum ni observis la ĉielon, je norda flanko preterpasis la Internacia kosma stacio, sur kiu troviĝas tri rusoj, du usonanoj kaj unu japano. S-ro **Knez** informis nin, ke la ĉielon kun multaj gravaj objektoj oni povos plej bone observi dum morgaŭa vespero, kiam videblas Perseidoj, ĉe kroatoj konataj kiel *Suze svetog Lovre* (Larmoj de sankta Laŭrenco).

La postan tagon, akompanitaj de **Davor Grgat**, ni vidis la malnovan urboparton de Split, respektive la ĝardenon, la monumenton al **Grgur Ninski**, la Peristilon kun du pordegoj, tra kiuj oni eniras la Palacon de Diokleciano. Ni pasis tra la plej mallarĝa strato de Split, kaj plenaj de entuziasmo pro la dumiljara urbo,

ni venis al la preĝejo de Sankta Dujė (la romia imperiestro). Poste ni vizitis la lokan Radio-stacio, kie ni estis gastoj de ĵurnalist-redaktoro **Mladen Vuković**.

La trian tagon, la esperantistoj vizitis Kaštela kaj Trogir, kaj la kvaran tagon ili ŝipe vojaĝis al la insulo Ŝolta, kie ilin gastigis **Marijan Cević**. Dum dutaga restado sur Ŝolta ili vizitis ĉiujn vidindaĵojn kaj banis sin en la maro. La lastan tagon pramŝipe ili revenis al Split, tranoktis en Kaštela kaj la sekvan matenon adiaŭis nin ĉe la flughaveno de Split. S-ro **Özdizdar** daŭrigis la vojaĝon al Lagoj de Plitvice kaj poste aviadile al Istambulo.

Ĉe la fino ni dankas al la Astronomia centro sur Mosor pro la belaj impresoj. Por niaj gastoj ĉi tiu parto de la mondo estas neforgesebla, kaj ili esprimis sian entuziasmon kaj la intencon denove viziti la belan kaj ĉarman urbon Split, pri kiu oni kantas, ke "Split estas la plej bela urbo en la mondo". Venu kaj vidu!

MONUMENTO POR JOSIP VRANIĆ

Davor Grgat

La 23-an de septembro 2015, okaze de la 24-a datreveno de morto de **Josip Vranić**, la unua soldato-maristo pereinta dum la

Patrolanda milito, apud la strando de Kaŝjuni en Split estis inaŭgurita nova memormonumento. Dum la inaŭguro parolis la urbestro de

Split **Ivo Baldasar**, anstataŭanto de la departementestro **Ante Ŝoĉić** kaj patro de Josip, **Roko Vranić**. La malnova monumento estis tre difektita kaj ne reprezentis la eventon kaj la rolon de la pereinta soldato.

Aŭtoro de la monumento estas **Velimir Barić** el Solin kaj financis ĝin la urbaj instancoj de Split.

La pereinta **Josip Vranić** estis membro kaj sekretario de Esperanto-societo "Fratego kaj Unueco" en Split. Pli detale pri li ni skribis en "Zagreba Esperantisto" n-ro 16, paĝo 68-69 kaj n-ro 18, paĝo 159.



FORPASIS LA STELULINO DE ESPERANTO-BALO

Josip Pleadin



Lucija Borčić en sia zagreba loĝejo en Nodilova strato n-ro 4 (supre maldekstre). ● Junulino Lucija vestita per "Esperanta robo" en la jaro 1949 (supre dekstre). ● Lucija Borčić en sia laborĉambro. En la fono videblas la manuskripto de ŝia granda Esperanto-kroata vortaro (sube maldekstre). ● La aŭtorino skribas dediĉojn en la presitaj grandaj vortaroj Esperanto-kroataj kaj kroataj-Esperantaj (sube dekstre).





Podšpilje sur la insulo Vis, la naskiĝvilaĝo de Lucija Borčić (supre) ● La dekstraj fotoj de supre malsupren: 1. Lucija Borčić (staranta la unua maldekstre) kun koleginoj el Esperanto-societo "Bude Borjan" dum iu ekskurso en 1951; 2. Lucija Borčić (meze de la foto) kun sia patro, esperantisto Ante Borčić (kun okulvitroj) dum la vizito de bulgaraj esperantistoj al Zagrebo; 3. Lucija Borčić kun la busto de Zamenhof en la ejo de zagreba Esperanto-societo "Bude Borjan" en Amruševa strato n-ro 5.



Podšpilje estas vilaĝeto sur la malproksima adriatika insulo Vis, iam izolita kaj nefacile vizitebla pro la surinsulaj bazoj de Jugoslavia Popola Armeo, kaj sekve longe nekonata de turistoj. Pri tiu vilaĝo malmultaj scias, eĉ mi mem ne sciis, se ĝi ne estus la naskiĝvilaĝo de Lucija Borčić, la nestoro de Esperanto en Kroatio.

Ŝia patro Ante Borčić (1894-1970) estis progresema homo, kiu iniciatis kooperativismon en Vis kaj en aliaj lokoj de Dalmatio. Li estis esperantisto ekde 1918, membro de Esperanto-societo en Split kaj kunorganizinto de la 2-a sudslava Esperanto-kongreso (Split, 1924). Kiel delegito de UEA li aktivis en Komiža (sur la insulo Vis). De sia patro Lucija heredis la senliman inklinton al Esperanto.

Lucija Borčić naskiĝis en Podšpilje la 26-an de julio 1921, sed preskaŭ la tutan vivon (almenaŭ ĝian aktivan parton) ŝi pasigis en Zagrebo. Profesie ŝi estis librotenisto kaj administratoro. Ŝi laboris en la Plastikarta asocio de Kroatio.

Kvankam pri Esperanto ŝi eksciis ankoraŭ kiel infano, efektive ŝi esperantistiĝis kiel 19-jarulino en Zagrebo en 1940, vizitinte kurson en Esperanto-societo "Bude Borjan". Poste dum jardekoj ŝi estis unu el la ĉefaj aktivuloj de tiu societo, plenumante diversajn funkciojn: komitatano, kasisto, sekretario, prezidanto.



En la societo ŝi gvidis multajn diversnivelaĵajn (porkomencantajn, progresigajn, konversaciajn) kursojn laŭ la propra rekta metodo. Pro sia granda lingvoscio, ŝi gvidis ankaŭ lingvajn kursojn, prelegis, aktoris kaj provlegis tekstojn. En Kroatia Esperanto-Ligo kaj Jugoslavia Esperanto-Federacio ŝi plenumis la funkciojn de dua sekretario kaj membro de la Ekzamena komisiono.

Grandan organizan kontribuon ŝi donis en 1953 kiel LKK-ano de la 38-a Universala Kongreso de Esperanto en Zagrebo.

Unu jaron antaŭ la Universala Kongreso en Zagrebo, ŝi komencis traduki Esperanten la kroatan prozon kaj poezion, kaj al tiu aktiveco ŝi restis fidela preskaŭ ĝhis la lasta vivmomento, tiam jam vivante en la Hejmo por maljunuloj. Ŝi tradukadis ĉiutage, havante striktan planon pri nombro da tradukotaj paĝoj, kaj tio rezultis per

trideko da libroj, kiujn ŝi tradukis aŭ kuntradukis (vidu la liston ĉe la fino de ĉi tiu artikolo).

Lucija estas konata ankaŭ kiel originala Esperanta poetino, sed pri verkado de poezio ŝi ekokupiĝis nur en 1977, do 25 jarojn post la unuaj tradukaj provoj.

Ŝiaj unuopaj originalaj kaj tradukitaj poemoj aperis en la periodaĵoj *La Suda Stelo*, *Tempo*, *Voĉo*, *Velo*, *Kroata esperantisto*, *Monato*, *Fonto*, *Literatura foiro*, *Esperanto en Skotlando*, *Sennacieca revuo*.

Kvankam literatura agado konsumis plejparton el ŝia tempo, ŝi verkis ankaŭ multajn artikolojn por diversaj gazetoj kaj revuoj, ekz. *La Suda Stelo*, *Tempo*, *Voco*, *Velo*, *Esperanto*, *Heroldo de Esperanto*, *El Popola Ĉinio* ktp.

La multjara traduka laboro donis al ŝi la necesan sperton en la gramatika kaj leksika kampoj, por kio ŝi redaktis la lingvokonsilajn

rubrikojn en *Voĉo* kaj *Tempo* kaj provlegadis literaturajn tradukojn kaj artikolojn por *Voĉo*, *Tempo* kaj *Kroata Esperantisto*.

Post la morto de Marinko Gjiivoje ŝi finredaktis la *Leksikonon de aktivaj jugoslaviaj esperantistoj* (1985), kaj tradukis kelkajn turismajn prospektojn pri Zagrebo.

La ununura originala poemaro de Lucija Borčić *Pulsas la viv'* aperis en 2001, sed anticipis ĝin la poezia premio "Clelia Conterno" en 1985.

Unu el ŝiaj plej malfacilaj tradukaj taskoj certe estis la komedio de *Onklo Maroje* de Marin Držić por la speciala eldono okaze de la 500-jariĝo de la aŭtoro (2008), en kiu troviĝas tradukoj en 18 lingvoj.

Kvankam ŝia traduka kaj verka agado estis treege ampleksaj, ŝi vivoverko estas la du grandaj vortaroj: Esperanta-kroata kaj kroata-Esperanta, eldonitaj

Literatura konkurso "Ivo Rotkvić"

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE), konforme al sia laborprogramo, en 2014 renovigis la *Literaturan konkurson "Ivo Rotkvić"*, lanĉitan de la iama *Zagreba Esperanto-Ligo*, kun la celo stimuli ĉiaspecan literaturan kreadon en Esperanto, malkovri literaturajn talentulojn kaj konigi iliajn verkojn en Esperantujo per premiado kaj publikigo en "Zagreba Esperantisto" aŭ libroforme.

UZE anoncis ĉi tiun konkurson okaze de *Zamenhofa tago*, kiu dekomence estis konsiderata *Tago de Esperanta libro*.

UZE invitas ĉiujn literaturemulojn de Esperantujo partopreni en 2016 en la jenaj konkursaj branĉoj:

1) *Originala prozo*. (inkluzive de teatraĵoj). Maksimuma longo de konkursaĵoj nefiksita, sed preferataj mallongaj prozaĵoj.

2) *Originala poezio*. Maksimuma longo nefiksita, sed preferataj mallongaj poeziaj formoj.

3) *Tradukaĵoj el la kroata*. Maksimuma longo nefiksita, sed preferataj mallongaj prozaĵoj aŭ poeziaĵoj de aŭtoroj mortintaj antaŭ pli ol 70

jaroj aŭ de tiuj kiuj donis skriban permeson traduki kaj senpaga publikigi iliajn verkojn.

3) *Tradukaĵoj el aliaj lingvoj*. Maksimuma longo nefiksita, sed preferataj mallongaj prozaĵoj aŭ poeziaĵoj de aŭtoroj mortintaj antaŭ pli ol 70 jaroj aŭ de tiuj kiuj donis skriban permeson traduki kaj senpaga publikigi iliajn verkojn.

Konkursi povas nur la ĝis nun nepublikigitaj verkoj, aŭ la verkoj kiuj aperis en interreto. Ĉiu konkursaĵo estu aparta *word* aŭ *pdf*-dokumento, subskribita per pseŭdonimo kaj alrokita al la retmesaĝo, en kiu estu skribita la vera nomo de la aŭtoro/tradukinto kaj lia/ŝia retadreso. UZE elektos la ĵurion kiu prijuĝos la ricevitaĵajn konkursaĵojn. Laŭreatoj estos premiitaj per diplomoj kaj libropremioj. UZE retenos dum unu jaro la ekskluzivan rajton publikigi ĉiujn premiitajn (kaj nepremiitajn) konkursaĵojn en "Zagreba Esperantisto" aŭ en apartaj libretoj.

Konkursaĵojn oni sendu antaŭ la 30-a de oktobro 2016 rete al

zagreba.esperantisto@gmail.com



de Kroata Esperanto-Ligo kaj Sveučilišna knjižara en 2008, respektive 2009. Ŝia privortara laboro estas ankoraŭ pli respektinda, se oni scias, ke la vortarojn ŝi komencis verki kiel 80-jarulino, tajpante ĉiujn paĝojn per mekanika tajpmaŝino, ĉar komputilojn ŝi neniam regis, nek uzis. Nun, preskaŭ unu jardekon post la apero de tiuj vortaroj, kun plena certeco oni povas konfirmi ilian kvaliton kaj esprimi dubon, ke iu ajn verkos pli

bonan kaj pli ampleksan vortaron por kroatoj.

Ŝia lasta traduko estas *Jaša la Dalmato – vicreĝo de Guĝerato* de Ivana Brlić-Mažuranić, tradukita en 2013, sed ankoraŭ neeldonita libroforme.

Pro siaj multaj servoj al la Movado, Lucija Borčić en 2001 estis proklamita Honora membro de UEA ekde 2001.

Figurfraze ni konkludu, ke Lucija Borčić estis stelulino de nia

Esperanto-balo. Nian firmamenton ŝi forlasis en la respektinda aĝo de 94 jaroj la 14-an de novembro 2015. La lastan kuŝejon ŝi trovis la 17-an de novembro 2015 en la familia tomo en la zagreba tombejo Miroševac, apud sia patro, kiu interesigis ŝin pri Esperanto.

Nome de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj la entombigon ĉeestis la prezidanto Radenko Milošević.

LA VERKOJ DE LUCIJA BORČIĆ

TRADUKOJ:

- 1953: *Jugoslavio kaj ĝiaj popoloj* (kuntradukinto)
 1983: *Kroatia poezio* (kuntradukinto)
 1984: Zora Heide: *Kantoj de l' silento* (kuntradukinto)
 1985: Antun Šimunić: *Elprovado de l' amo*
 1985: Stjepan Planić: *Loĝkulturo*
 1986: Edvard Kardelj: *Socialisma memmastrado*
 1987: Ante Vladislavić: *Vestokulturo*
 1988: Ivo Andrić: *Soifo* (kuntradukinto)
 1988: Marjorie Boulton: *Unutra i vani*, en: *Sve dugine boje* (traduko el Esperanto en la kroatan)
 1989: *Moderna bosnia-hercegovina novelo* (kuntradukinto)
 1992: *Poemaro de kroatoj en Hungario* (kuntradukinto)
 1993: Mile Prpa: *Reĝo de l' eonoj - Kralj vjekova - Il rei dei secoli*
 1993: *Izolulo* (poemoj de kroataj poetoj tradukitaj el Esperanto en dek kvin lingvojn - kuntradukinto)
 1994: Yüksel Söylemez: *Amo estas taso da kokidsupo* (el la angla)
 1995: Mile Prpa: *Elementoj de l' elementoj*
 1995: Pero Ĉimbur: *Mi resanigis PPPetron*
 1997: *Antologio de kroataj unuaktaj dramoj* (kuntradukinto)
 1998: *En tiu terura momento* (kuntradukinto)
 1998: *Barkoj el akvo - elektitaj kroataj noveloj* (kuntradukinto)
 1999: Vesna Parun: *La bluoj*
 2006: Siniša Glavašević: *Rakontoj el Vukovar*
 2006: *Poemaro de la burglandaj kroatoj*
 2007: *Poezio de molizaj kroatoj* (kuntradukinto, kune kun Zora Heide)
 2008: Šimun Ŝito Ĉorić: *Nokta gardisto – Nije sve što oči vide* (kuntradukinto kun Zora Heide)
 2008: Ivan Ŝpoljarec: *Pupoj vivas* (trilingva eldono: angla, kroata, Esperanta; Esperanta traduko de Lucija Borčić)
 2008: Marin Držić: *Onklo Maroje* (en la 18-lingva eldono)
 2009: Ivan Golub: *Lumo kaj ombro - Svjetlo i sjena* (kuntradukinto, kune kun Zora Heide kaj Marija Belošević)
 2011: Ljubica Kolarić-Dumić: *Ususret svojoj zvijezdi - Renkonten al sia stelo*
 2013: Ivana Brlić-Mažuranić: *Jaša la Dalmato - vicreĝo de Guĝerato* (nepublikigita)

ORIGINALAJ POEMOJ:

- 1990: En: *Jubilea versgirlingando*
 1991: En: *Kroatia Esperanto-poemaro*
 2001: Lucija Borčić: *Pulsas la viv'*



LISTO DE DONACINTOJ 3

Dokumenta Esperanto-Centro en Đurđevac estas la landa Esperanto-arkivo en Kroatio, kiu kolektas ĉiaspecajn materialojn rilatantajn al Esperanto. Listojn de donacintoj DEC publikigis en sia Ipernity-paĝaro, kaj en 2013 ĝi publikigis specialan paperan broŝuron. Por konstante listigi ĉiujn donacojn, "Zagreba Esperantisto" publikigas specialan rubrikon.

– La 25-an de julio 2015 **Nikola Golić** el Veliki Grđevac donacis al DEC la libron *Poštmarkoj el Esperantujo* (poezio de Steven D. Brewer, 2010) kaj *Afero de espero* (Heidi Goes, 2007).

– La 25-an de julio 2015 **Jovan Mirković** el Lendava (Slovenio) donacis al DEC la lernolibron *Mednarodni jezik Esperanto za železničarje in druge* (Gvozden Sredić kaj Karlo Kovač, 2014).

– La 10-an de aŭgusto 2015 **Zdravko Seleš** el Đurđevac donacis al DEC listojn de kursanoj de liaj kursoj en la jaroj 1987-1990, la gazetletondaĵon *Svjetski kongres umjetnog jezika* el 2001, 8 daŭrigojn de la felietono *100 godina esperanta* de Spomenka Štimec, aperinta en 1987 en *Večernji list*, la artikolon *Mit Hilfe von Esperanto unterwegs uberall viel Unterstutzung gefunden*, kiu aperis en *Bohmezeitung/Soltauer Kreiszeitung* la 3-an de julio 1987, *Un tour d'Europe pour l'esperanto*, kiu aperis en *Sud Ouest, In search of a common language* (1987), Unuan bultenon de la 88-a UK Gotenburgo, junularan gazeton *Mrav* (n-ro 1 1989/90, Đurđevac), plurajn reklamilojn de Esperanto, invitilojn por dekjarigo de Esperanto-klubo *Koko* Đurđevac (1990), teksteton *Esperanto en nia lernejo* de Slavica Matoničkin, filatelan poŝtkarton pri la 4-a kongreso de kroataj esperantistoj (4 ekz.), 14 Esperanto-bildkartojn pri Berlino.

– La 15-an de aŭgusto 2015 DEC ricevis specialan bildkarton de la 100-a UK el Lillo, kun speciala franca poŝtmarko, kiun subskribis pluraj kongresanoj.

– La 21-an de aŭgusto 2015 **Julia Sigmond** el Rumanio sendis donace la libron de sia frato István Sigmond *Konsilo de ateisto: kredu je dio*.

– **Nijolė Petrųtė** el Šiauliai (Litovio), dum sia persona vizito al DEC la 31-an de aŭgusto 2015 donacis 6 ekzemplerojn de *Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio*, la vortaron *Esperanto lietuvių kalbų žodynas* (Gediminas Degėsys, 2015), la broŝuron *La Estona Liberarea Muzeo* (Merike Lang, 2000), *La doktrino de Karl Marks kaj kelkaj aspektoj de la socialisma konstruado de USSR* (Andropov, 1983), *60 jaroj de Unio de Sovetaj Socialismaj Respublikoj* (Andropov, 1982), *Deklaro de Ĝenerala Sekretario de CK de KPSU, Prezidanto de Prezidio de Supera Soveto de USSR* **Jurij Andropov** (1983), *Konservi la pacon por la nunaj kaj estontaj generacioj* (Andropov, 1983), flagetojn de Esperanto-klubo de Tallin, Esko, aranĝo *Esperanto kaj naturo* (1987) kaj AE - estona filio, butoninsignoj pri BET-22 (1985) kaj Amatorarta konkurso *Kannel* kaj 5 estonajn Esperanto-bildkartojn pri Tallinn.

– La 4-an de septembro 2015, donace de **Tomasz Chmielik** el Pollando ni ricevis la libron *Historio de la Esperanta literaturo* (Minnaja-Silfer, 2015).

– La 19-an de septembro DEC aĉetis de KAVA-PECH el Prago (Ĉeĥio) jenajn mankantajn librojn por sia kolekto: *Ĉeĥa-Esperanta vortaro*, *Esperanto-ĉeĥa vortaro*, *Desegnita humuro de Pavel Rak*, *Profesia uzo de Esperanto*, *R.U.R.*, *Ŝvejk* kaj *UEA en konscio de esperantistoj*.

– La 10-an de septembro 2015 UEA el Roterdamo sendis al DEC la 25-an numeron (2015:2) de *Esperanto en Afriko*.

– La 10-an de septembro 2015 **Ionel Oneț** el Roterdamo (Nederlando) sendis al DEC la broŝuron *ABC de Esperanto* (Eldonejo BERO, 1994), la 278-an numeron de *Fonto* (speciala numero: rumana literaturo, 2004), reklamilon rumanlingvan *Despre o anume speranță* kaj sian vizitkarton.

– La 29-an de septembro 2015 neesperantistino, kiu prezentis sin kiel **Srebrenka** el Vinkovci, sendis al ni tri ekzemplerojn de nacilingva krucvorteningma periodaĵo *Pitalica* n-ro 53, sur kies 16-a paĝo estas menciita Esperanta eldono de *Slavonia arbaro* de Josip Kozarac el 1999.

– La 29-an de septembro



2015 **Terezija Kapista** el Beogrado (Serbio) sendis al ni la libron *En la ombro de Alberto Ejnštejno*.

– La 29-an de septembro alvenis la libroj ricevitaj de la **Biblioteka apogo Bachrich**, kiun al DEC atribuis Universala Esperanto-Asocio el Roterdamo. La sendaĵo konsistas el: *La arto labori kune* (Festlibro por Humphrey Tonkin; UEA, 2010), *Pri homoj kaj verkoj* (UEA, 2012), *Pesme iz Srbije /Kantoj el Serbio* (2014), *La libro de la mirindaĵoj* (Marko Polo, UEA, Serio Oriento-Okcidento 34, 2001), *Zbornik Mali jezici – bogato književno stvaralaštvo – Almanako Minoraj lingvoj – riĉa literatura kreado* (Hrvatski esperantski savez, 2013), *Testamente* (Edwin de Kock, 2015) kaj *KD Testamente* (Edwin de Kock, 2004).

– La 8-an de oktobro 2015 la sekretario de DEC engaĝis specialan transporton por transpreni la arkivon (kune kun granda ŝranko) de la **Esperanto-societo "Božidar Vanĉik"** el Varaždin, kiu estis malfondita la 23-an de septembro 2015. Estis transprenita, kaj sukcese transportita al DEC la tuta biblioteko, dokumentoj kaj aliaj materialoj, pri kio ankoraŭ ne estas farita kompleta inventarado.

– La 13-an de novembro 2015 **Tomasz Chmielik** sendis al DEC manuskripton de la tradukita romano *La bankedo en Blitvo* de fama kroata verkisto Miroslav Krleža.

– La 16-an de oktobro 2015 **Vjekoslav Vrbaneć** el Varaždin donacis al DEC tri

portretfotojn de sia patro Eduard Vrbaneć, kiu estis tre aktiva multjara esperantisto.

– Dum novembro 2015, **Gesellschaft für Interlinguistik el Berlino** (Germanio) sendis al ni la libron de Hermann M. Ölberg *Aufsätze zur Interlinguistik und Esperantologie*, la periodaĵon *Interlinguistische Informationen* n-ro 96-97 kaj la germanlingvan kompilaĵon *Die Plansprachenbewegung rund um den Ersten Weltkrieg* (Beiträge der 24. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 21.-23-November 2014 in Berlin).

– La 30-an de novembro **Tomasz Chmielik** el Ŝwidnik (Pollando) donacis al DEC la librojn *UEA en konscio de esperantistoj* (Galor kaj Pietiläinen), *Gvidlibro tra Esperantio* (Aleksandro S. Melnikov), *Sinjoro Tadeo* (Adam Mickiewicz, Serio Oriento-Okcidento n-ro 22, 4-a eldono) kaj kompaktdiskon *Malsato de Espero* de Zuzanna Kornicka.

– La 1-an de decembro 2015. **Reinhard Haupenthal** el Francio sendis al DEC 21 kajorojn de diversaj Esperanto-gazetoj, kiuj mankis en la kolekto de DEC.

– La 4-an de decembro 2015 la eldonejo **Čvor** el Bjelovar sendis al DEC *Pučki kalendar Bjelovarsko-bilogorske županije* por la jaro 2016, en kiu troviĝas 4 artikoloj pri Esperanto.

– La 13-n de decembro **Zdenka Polašek** el Bjelovar transdonis al DEC ekzempleron de *Bjelovarac* n-ro 3395 (de la 5-a de novembro), en kiu troviĝas

granda artikolo pri bjelovara esperantisto Željko Saks.

– La 13-an de decembro 2015 **Nenad Margetić** el Bjelovar disponigis al DEC lumdiskon kun fotoj pri la aranĝo *Esperantistoj de Bjelvoar al sia urbo* (2015).

– La 23-n de decembro 2015 venis sendaĵo de **Ana Maričić** el Novi Vinodolski, kiu enhavis specialan bildkarton eldonitan okaze de la Dua sudslava kongreso de Esperanto en 1924. La bildkarton, kiun al siaj parencoj franclingve skribis la kongresano de tiu kongreso n-ro 50, s-ro Robert Adan el Gand (Gent, Belgio), DEC aĉetis kelkajn tagojn antaŭe en interreta aŭkcio.

– La 23-an de decembro 2015 **Barica Bahun** el Koprivnički Bregi sendis al DEC karteton kun presita portreto de fervojista esperantisto Ilija F. Puhalo. La sendaĵo alvenis sen adreso, sed kun nura indiko "Esperanto-muzeo en Đurđevac".

– La 3-an de januaro 2016 en interreta aŭkcio DEC aĉetis de neesperantisto **Zlatko Palajsa** el Sukošan originalan dokumenton (leteron) de la 11-a de septembro 1926 pri Esperanto en Vinkovci

– La 9-an de januaro 2016 **Marija Jerković** el Zagrebo donacis al DEC *Internacian pedagogian revuon* n-ro 4/2015.

– La 10-an de januaro 2016 **Tomasz Chmielik** el Pollando disponigis al DEC la manuskripton-tradukon de la romano *Ruta Tannenbaum* de kroata verkisto Miljenko Jergović.

Koran dankon al ĉiuj donacintoj!

RIDO NE ESTAS PEKO

Ekspozicia katalogo

*Karikaturekspozicio en Popola biblioteko "Petar Preradović Bjelovar
11-a - 26-a de septembro 2015*

La aŭtoro de ĉi tiuj karikaturaj, **Pavel Rak**, naskiĝis la 24-an de novembro 1939 en Prago (Ĉeĥio). Kvankam li studis precizan mekanikon kaj optikon, tre frue ĉe li venkis la amo al desegnado. Li admiris la majstrojn de animado **Jiří Trnka**, **Walt Disney**, **Albert Dubout**, **Jean-Jacques Sempé** kaj aliaj. Dum pluraj jaroj li larobis en la studio por animita filmo de **Jiří Trnka** en Prago, interalie pri la filmo "La mano" (1965), kiun la Usona filmakademio proklamis la kvina plej bona animita filmo en la historio. Per animado kaj desegnado Rak okupiĝis preskaŭ 40 jarojn, kiel li mem diras: "vivigante figuretojn por plezurigi infanojn".

Krom la intereso pri animita filmo, Pavel Rak elstaris ankaŭ kiel karikaturisto kaj ilustristo de diversaj eldonaĵoj por ĉeĥaj kaj slovakaj eldonistoj. Liaj spritaĵoj kaj karikaturaj ape-radis en ĉeĥaj periodaĵoj, kaj plej konata li fariĝis pro la konstantaj kontribuadoj al la iama karikaturgazeto "Dikobraz" (1945-1989). Longas la listo de libroj ilustritaj de Rak. Krom pri la humuraj desegnaĵoj, li okupiĝis ankaŭ pri ilustrado de aliaj temoj. Interalie, Rak estas ankaŭ esperantisto kaj li ilustris plurajn



Pavel Rak

Esperanto-librojn, ekz. "Sociologia esploro de sintenoj al Esperanto" (1981), "La laŭta vekhorloĝo" (1988), "Najbaroj kaj boroj" (1989), "Fonetika interpunkcio" (1991), "Tendaraj tagoj" 1, 2, 3 (1991-1997), "Rakontoj ne nur ŝercaj" (2002), "Kantoj por ĝojo" (2003), "Rapide pasis la temp'" (2003), "Intimaj temoj en la Esperanto-beletro" (2005), "Arne, la ĉefido" (2005) kaj aliajn. Okaze de lia 70-a naskiĝdatreveno en 2009, la Esperanta eldonisto KAVA-PECH el Prago publi-kigis la libreton "Desegnita humuro de Pavel Rak", kaj la Esperanto-muzeo en Svitavy havis konstantan prezenton de liaj verkoj

La karikaturaj, kiujn ni havis la eblecon vidi en lia ekspozicio en Bjelovar, estas karakterizitaj per simplaj desegnaĵoj, parte kolorigitaj, per profunda pripensado, sed simpla kaj facile komprenebla maniero prezenti sociajn kaj familiajn kutimojn kaj eventojn, saturitajn per delikata, modera kaj facile akceptebla humursenco, kiu ofendas neniun, kaj elvokas neniajn negativajn emociojn.

